# Tamen ★ Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, JANUARO 2007/ JARKOLEKTO 26
Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019
esperantobob@iprimus.com.au
Disponeblas ankaŭ surrete ĉe la retejo de Esperanto en Sudaŭstralio:http://sa.Esperanto.org.au

*Trinkas teon s-ino Jones ĉe s-ino Steele.*

*S-ino Jones: "Nun estas tre senbrue ĉe viaj najbaroj, ĉu ne? Antaŭ nelonge ili eĉ tre bruegis!"*

*S-ino Steele: "Jes, estas ĉiam la sama afero ĉe ges-roj Linnane. Unue ili ĵetas porcelanon en la vizaĝojn unu de la alia. Poste ili sidas senbrue ĝin kungluante!"*

## Edukado



**Se vi vere deziras lerni kiel senerare – kaj senĝene – uzadi nian belegan lingvon, tiam trastudu, pli ol nur unu fojon, "Lingvaj Resondoj", la elstaran verkon de nia eminenta esperantologo, Marcel Leereveld, la nemalhavebla ĉefekzamenisto, kiu ĉiam instruas en niaj Somerkursaroj kaj aktivas en niaj Kongresoj. Lian verkon mendu ĉe 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur $ 22,00!**

***Hieraŭ ni provis nian novan elektran manĝaĵmiksilon. Ni unue plenigis ĝin per framboj, tiam ni ekfunkciigis ĝin. Hodiaŭ ni refarbos la kuirejon!***

## Gravaj Esperanto-eventoj:

**De la 7a ĝis la 19a de januaro okazos la 22a Aŭstralia Esperanto-Somerkursaro kaj Kongreso en la Universitato de Tasmanio, College Road, Sandy Bay, Tasmanio 7005.**

**De la 3a ĝis la 5a de februaro okazos Kongreso de Novzelanda Esperanto-Asocio. Ekskurso okazos dum la Waitangi-tago la 6an de februaro.**

**Merkredon la 7an de februaro 2007 “Esperanto en Sudaŭstralio” komencos siajn regulajn kunvenojn en Clarence Park ekde la 18a horo.**
**De la 24a de februaro ĝis la 3a de marto 2007 okazos Familia Studsemajno en Sudfrancujo.**

*Diris la edzo al sia edzino: “Ĉu vi scias, razinte min en la mateno mi sentas min 20 jarojn pli juna.”*
*Diris la edzino al sia edzo: “Ĉu vi ne povus razi vin en la vespero?”*

## Familia Studsemajno en Sudfrancujo

**De la 24a de februaro ĝis al 3a de marto 2007, do dum ankoraŭ frostas en via regiono, - se vi ne loĝas en Aŭstralio - venu al Mediteraneo, kie floras mimozoj kaj migdalarboj. Vin atendas amika, familia atmosfero. Matene vi lernos en tri nivelaj kursoj, dum iuj prizorgos viajn infanojn. Posttagmeze vi mem aranĝos viajn programojn; studado, promenado, familia vivo ĝis la vespero, kiam estos animado. La studejo estas komforta hotelo, “Le Renouveau” en Agay, ĉe Saint-Raphael. Restado kaj manĝoj por la tuta semajno: 280 eŭroj, infanoj malpli ol 14-jaraj nur 140 eŭroj. Aliĝo al la kurso, 55 eŭroj. Familia aliĝo nur 100 eŭroj.**

**Informoj kaj aliĝoj”Monique Prezioso, 92 impasse Jean Moulin, F- 83700 Saint-Raphael. prezmoni@hotmail.com (33)4 94 83 06 88.**

*Filozofias maljunulo: “Du virinoj malbonigis al mi la vivon. La unua forlasis min, kaj la alia ne…”*

## 23a Internacia Festivalo

**Pasigu la jarfinajn tagojn en la tradicia Internacia Festivalo ĉijare okazonta en komforta domo en Saarbrücken, Germanujo. Ofertotaj estas 2-, 3-, kaj 4-litaj ĉambroj, ĉiuj kun duŝejo kaj necesejo. La kotizoj inkluzivas loĝiĝon, programon, ĉiujn manĝojn inkluzive de la jarfina bufedo kaj balo, kaj la novjara matenlunĉo.**

**Okazos aŭtobusa ekskurso al la franca urbo Strasburgo. Dumtage ĝuu niajn prelegojn kaj kursojn pri multaj malsamaj temoj, kiel ankaŭ niajn vesperajn programojn, i.a. koncertoj kun Esperanto-Desperado, JoMO el Francujo; magia vespero kun la konata magiisto Trixini kaj interkona vespero kun la rusa bardo Mikaelo Bronstejn.**

**Jam aliĝis 118 personoj el 16 landoj. Por pli da detaloj bonestu vidu niajn interretajn paĝojn kaj informiĝu detale pri la Internacia Festivalo kaj ĝia atmosfero.**

**HDP@internacia-festivalo.de interreto:www.internacia-festivalo.de**

***Direktoro al sia edzino dum feriado: "Kiel mi malstreĉiĝu dum mi bone scias ke precise tion nun faras mia personaro?"***

# Elradikigi malsaton en la mondo

**Kio okazis dum la pasintaj 10 jaroj post la monda ĉefkonferenco pri nutrado?**

**Kion oni lernas el tiu stadia raporto de NAO dediĉita al la bilanco de dek jaroj da penoj por redukti la malsaton en la mondo?**

**Ke 854 milionoj da homoj ankoraŭ suferas pro misnutrado!**

**Tiom, kiom en 1982, je la fondiĝo de MSM! Ja la monda loĝantaro kreskis ekde tiam, sed la relativa redukto de la malsato ne estas nombrebla nur per procentaĵoj, kompareblaj kun la vertiĝa kresko de la armadaj elspezoj. Ĉu la homaro vere intencas sin mem detrui, aŭ ĉu fine ĝi deziras unuiĝi por elradikigi siajn plagojn?**

**Organizaĵoj kiaj MSM havas kiel celon malfondiĝi, kiam ne plu estos unu homo suferanta pro malsato.**

**Sed verŝajne tio neniam okazos! Tio signifas, ke iu(j) devas labori! Labori por ĉiuj! Kune!**

*El "Outlook Express*

**Frenezulo ĉiam trovas eĉ pli grandan frenezulon lin admirantan.**

*Nicolas Boileau-Despreaŭ*

## La gorilo kaj la kolomboj

**La kolomboj longe vivis timante la morton de Esperanto. Ili kreis asocion, kiu iomete helpis la disvastiĝon de Esperanto. Ili foje sukcesis aperigi artikolojn en gazetoj, kreis radioelsendojn, eldonis kelkajn librojn, havis somerkursaron ktp. Kaj tiel Esperanto ja sukcesis pluvivi. Tamen la asocio ne prosperis, ĝi ne tro bone fartis. Tiam alvenis gorilo, kiu volis regi la pacamajn kolombojn. Diris la gorilo.”Kial vi ŝatas tian vivon, en kiu vi timas la morton de Esperanto? Se vi elektus min kiel vian estron, mi disvastigos Esperanton tra la tuta mondo kaj vi ne plu bezonos timi.” Fidante lin la kolomboj elektis lin prezidanto de la asocio. Sed tuj kiam li fariĝis la estro, li komencis ordoni al la kolomboj, ke ili faru tion, kion li volas, la kolomboj ofte estis insultitaj, se ili malkonsentis kun la gorilo, ili ne plu povis partopreni en la decidoj. La gorilo antaŭ ĉio malrespektis la maljunajn kolombojn. “Vi taŭgas por nenio”, li diris. Post iom da tempo li eĉ eksigis unu kolombon ĉiun monaton el la asocio.**

**“Ni meritas tion, ni ne devus esti fidantaj lin”, diris unu el la kolomboj, kiu ankoraŭ ne estis eksigita”.**

**Moralo: Iuj kuracrimedoj malbonas pli ol eĉ la malsano.**

***Verkinto nekonata***

***La buso estis eĉ tre plenplena, kiam eniris ĝin tre dikega sinjorino. Rigardinte siajn kunpasaĝerojn ŝi levis la voĉon dirante:***

***“Ĉu neniu sinjoro povas oferti al mi sian sidlokon?”***

***Starigis sin malgranda kaj maldikega sinjoro. Tre amike li diris:***

***“Ĉu eble mi rajtas iomete kontribui?”***

## Gloron kaj gratulojn al Dominic

**Merkredon la 6an de decembro pasintan jaron, dum ceremonio solena ricevis premion Dominic, la filo de nia estiminda Nicole Else, pro sia elstara sukceso en la ŝtata ekzameno pri scienco. Okazis tri diversaj ekzamenoj: unu pri biologio, unu pri fiziko kaj unu pri ĥemio. Dominic kompreneble sukcese trapasis la ekzamenon pri fiziko kaj**

**ricevis bronzan premion. Li estas la tria plej bona en Novsudkimrujo.**



**Antaŭ ol disdoni la premiojn d-ro Colin Taylor, direktoro de "Aŭstraliaj Sciencaj ennovigoj", paroladis iomete pri la ŝatokupoj de la lernantoj. Pri Dominic li i.a. diris, ke tiu pasintan jaron prenis parton en Somerkursaro en Kianinni por plibonigi sian scion pri la internacia lingvo, Esperanto.**

**Krome, Dominic estas invitita preni parton venontan jaron en dusemajna kurso pri fiziko en Kanbero. Proksimume 25 lernantoj el diversaj ŝtatoj aŭstraliaj ĉeestos. Ok el ili estos elektitaj por preni parton en la Azia fizika olimpika konkurso en Ĉinujo. Kvin partoprenos en la internacia olimpika konkurso en Irano.**

***Furioza domluanto telefonas al la domluiganto dirante: "Pluvas en la domon tutan semajnon, kiom longe tio devas daŭri?"***

***"De kie mi devus scii tion? Pli bone estas telefoni al Meteorologia Instituto!"***

## Defendi la jam fositajn sulkojn

**Esperantujon skuas minacanta malfondo de la Esperanto-redaktejo de Pola Radio, kies sorto eble jam estas sigelita de la nova direktistaro. La obskure dekstra kaj makartisme paranoja ŝtata regantaro akaparas la oficialajn informkanalojn kun decidaj paŝoj. Al la Esperanto-redaktejo oni imputas komunisman influon. Ĝia estrino ja estis dungita dum la socialisma reĝimo kaj pluraj tiamaj mohikanoj plu asistas ŝin.**

**Ne estus perdo ne plu aŭdi propagandon de registaro, kiu estas unu el la plej mallumaj en Eŭropo kaj honto por**

EU, kiu kokete lekcias al aliaj pri demokratio kaj esprimlibereco. Esperige ja estas, ke poloj mem ekhontas pri siaj estroj, kies populareco jam multe falis. Se la registaro tamen ne stumblos je internaj kvereloj, ŝanco pervoĉdoni pli bonan aperos nur post kelkaj jaroj.

Tamen nur parte la programoj estas registara laŭtparolilo. Ili ĉiam havis ĉefe kulturan enhavon kaj konsiderindan porcion dediĉis al Esperanto-temoj, pro kio Varsovio fariĝis la plej populara stacio inter esperantistoj. Ordinara esperantisto ja volas aŭdi en Esperanto nur pri Esperanto, ĉar pri ĉio cetera onian scivolemon saturas la nacilingvaj komunikiloj. Iom da politika liturgio estas eta ĝeno, kiun oni akceptas kiel naturan prezon. Aŭdi ne postulas aŭskulti.

Koincide kun la minaco en Varsovio konvulsias <u>*Ĝangalo*</u> kaj ĝia *Internacia Televido.* Kompetentaj observantoj dekomence ne promesis al ili longan vivon, ĉar la ambiciaj celoj de ilia posedanto tro malkongruis kun la deziroj de esperantistoj. Ili povis pli vaste kaj rapide sekvi la Esperantan mondon per la ŝtata Pola Radio ol per la entreprenoj de Flavio Rebelo, kiu esperis vivi el la poŝoj de esperantistoj. Rebelo mokante ignoris ĉiujn, kiuj trovis Esperantujon tro eta merkato por liaj ambicioj. Al niaj bezonoj bone respondas la pli modestaj informservoj kaj televidoj, kiujn diversaj retfervoruloj jam starigis. Eble iu el ili kreskos al io pli granda laŭ natura evoluo kaj sen monavida sintrudo.

Roman Dobrzyński trafe diris en *Libera Folio* pri la krizo en Varsovio: "Ni devas defendi la jam fositajn sulkojn". Ni vere eniris stadion, en kiu ni defendu niajn atingojn kaj ne malŝparu fortojn por aŭdacaj konkeroj. Pri tio ŝajnas konscii Buller, laŭ kiu la malapero de *Fonto* estas pli serioza afero ol tiu de *Ĝangalo.* Corsetti laŭte ekmobilizis siajn rotojn kontraŭ la planoj en Varsovio. Jen bonaj signoj, sed la sulkojn devas defendi UEA, kiu estas mil membrojn malpli forta ol antaŭ kelkaj jaroj. Eble la freŝaj batoj komprenigas al ĝiaj gvidantoj, ke streboj plifortigi la

**pozicion de Esperanto ekster la propraj vicoj ne sukcesos, se la propraj vicoj ŝrumpas. Landaj asocioj degeneras, decaj landaj kaj fakaj revuoj malmultiĝas, libroservoj iĝas raraĵo. Ĉu pri tio diskutas la estraro aŭ ĉu ĝi plu revas konkeri EU? Komitatanojn la veraj problemoj ne interesas; anstataŭe ili faris komikan diskuton, kiel "malfermi UK eksteren". Restas ĉiam malpli por montri eksteren.**

***La Ondo de Esperanto, 2006. N-ro 12***

***Svensson rakontis al siaj amikoj, ke li estis en Stokholmo, kie li la unuan fojon en sia vivo vizitis la operejon.***

***"Estis vere impone", li diris. "Subite surcigne englitis la scenejon ulo, nomata Lundgren,".***

***"Ĉu Lundgren?" demandis la amikoj, "ĉu vi ne volas diris Lohengrin?"***

***"Jes, se mi parolus germane", diris Svensson.***

## Pligrandiĝo. Unu jaron poste

**"Hodiaŭ Multlingvismo estas kerna parto de la Komisiona taskaro kaj la Informo hodiaŭe adoptita estas kontribuo al la Unia multlingva sistemo kaj ties demokratia legitimeco", - diris Ján Figel', EU-Komisionano respondeca pri multlingveco, edukado kaj kulturo. Post pligrandiĝo de EU pli ol 60 mil paĝoj atendis tradukon pro manko de kapabloj. Kelkaj ŝtatoj laŭte plendis, specife ĉar novaj EU-leĝoj ekvalidos nur post la tradukado en ĉiujn 20 oficialajn lingvojn.**

**Laŭ Figel', la Komisiono nun likvidis la tradukmalfruecon kaj sukcese integris la dek novajn lingvojn. "Danke al serio de gravaj praktikaj rimedoj adoptitaj dum la lasta jaro, la Komisiona tradukkapablo kreskis kaj la Komisiono kapablas plenumi la leĝajn devojn laŭ la Traktato ", - diris Figel'.**

**Rimedoj por plibonigi la tradukkapablon inkluzivas la dungiĝadon de 440 novaj tradukantoj, kontraktadon kun eksteraj firmaoj, kaj ankaŭ la limigon de la longeco de tradukendaj dokumentoj. La meza longeco de oficiala**

**"Informo" de la Komisiono estis reduktita de 37 ĝis 15 paĝoj.**

**Inter aŭgusto 2004 kaj majo 2005, la Komisionaj tradukservoj tradukis ĉirkaŭ 1 milionon da paĝoj en ĉiujn 20 oficialajn lingvojn. Meze estis tradukitaj ĉirkaŭ 39 mil paĝoj al ĉiu nova lingvo.**

**Spite al la laŭtaj proklamoj de la Komisiono pri plibonigo de la tradukservoj, plendoj fariĝis pli gravaj kaj oftaj. Ĉefe oni nun plendas pri malbona kvalito de la tradukoj. "Kvalito estis defio por eksteraj tradukantoj, laborantaj en la novaj lingvoj. Kaj ni devis multe uzi eksterajn liberajn tradukantojn", - agnoskis Juhani Sormunen de la Eŭropa Komisiono.**

**Pro la kreskanta graveco de la angla, en kiu nun pli ol 70% de ĉiuj Komisionaj dokumentoj estas unue skribitaj, estas plilarĝigita la denasklingva lingvokontrolservo.**

**La Komisiono, spite al la kriza etoso en Bruselo, antaŭvidas ankaŭ plian plilarĝigon. "Ni dungos 20 kontraktajn dungitojn en 2006 kaj lanĉos konkursojn ĉiaŭtune por po 60 novaj bulgaraj kaj rumanaj tradukantoj, kiuj eklaboros la 1an de januaro 2007", - diris Sormunen.**

**Ĉu la Komisiono antaŭvidas ankaŭ apartajn servojn por la kroata, bosnia kaj serba lingvoj?" Estas tro frue por komenti tion", - agnoskis Frédéric Vincent, porparolanto por la Komisiono.**

**Alia grava problemo estas la manko de konscio pri la efektiva kosto de la tradukado. La kosto daŭre estas mistero por multaj oficistoj, kiuj petas tradukadon de plej neutilaj dokumentoj. Kiom kostus, ekzemple, tradukado de unu sola paĝo? "Mi tutsimple ne scias", - agnoskas Vincent.**

***Dafydd ap Fergus el la Ondo de Esperanto, 2005, n-roj 8-9***

***"Kiom kostas la hundo?"***
***"500 dolaroj".***
***"Tro multekoste. Kio pri la duono?"***
***"Kion diable vi volas kun duona hundo?"***

# Tamen ★ Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, FEBRUARO 2007/ JARKOLEKTO 26
Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019
esperantobob@iprimus.com.au
Disponeblas ankaŭ surrete ĉe la retejo de Esperanto en Sudaŭstralio:http://sa.Esperanto.org.au

*"Kion vi plej facile povus malhavi – vinon aŭ virinojn?"*
*"Tio dependas de ilia aĝo!"*

## Edukado



Se vi vere deziras lerni kiel senerare – kaj senĝene – uzadi nian belegan lingvon, tiam trastudu, pli ol nur unu fojon, "Lingvaj Resondoj", la elstaran verkon de nia eminenta esperantologo, Marcel Leereveld, la nemalhavebla ĉefekzamenisto, kiu ĉiam instruas en niaj Somerkursaroj kaj aktivas en niaj Kongresoj. Lian verkon mendu ĉe 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur $ 22,00!


*Doganisto: "Ĉu vi havas alkoholaĵon kaj cigaredojn?"*
*Turisto: "jes, sed nur por persona uzado!"*

## La nova estraro de AEA

La nova estraro de Aŭstralia Esperanto-Asocio estas:

prezidanto: Igor; 1a vicprezidanto: Penny;





**2a vicprezidanto: John Abood;** **sekretario: Miranda;**






**vicsekretario: Gordon Coleman;** **kasisto: Stephen;**



**vickasisto: Jennifer;**



**“Esperanto en Sudaŭstralio” bonvenigas la estraron dezirante ke ĝi havu ĉiun sukceson en sia malfacila laborego por paco ne nur en la mondo, sed precipe en Aŭstralia Esperanto-Asocio!**

# Gravaj Esperanto-eventoj:

**De la 3a ĝis la 5a de februaro okazos Kongreso de Novzelanda Esperanto-Asocio. Ekskurso okazos dum la Waitangi-tago la 6an de februaro.**


**Merkredon la 7an de februaro 2007 “Esperanto en Sudaŭstralio” rekomencos siajn regulajn kunvenojn en Clarence Park ekde la 18a horo.**

**De la 24a de februaro ĝis la 3a de marto 2007 okazos Familia Studsemajno en Sudfrancujo.**

# *Politiko ne estas ekzakta scienco*

## Ĉefpastro disdonis Tinĉjon en Esperanto

**La ĉefpastro de la tibetaj budhanoj ĉijare transdonis la premion "Lumo de Vero" al fondaĵo Hergé pro la bildstria verko "Tinĉjo en Tibeto". Lige kun la ceremonio, oni disdonis al la ĉeestantaro ekzemplerojn de la Esperantlingva eldono de la verko. Ŝajne ne ĉeestis esperantistoj dum la ceremonio, sed laŭ neesperantista ĉeestinto, la Esperanta versio disdonatis "kun la espero, ke iam ni ĉiuj parolos la saman lingvon".**



**Ĉiujare disdonatas la premio "Lumo de Vero" de la Internacia Kampanjo por Tibeto. Ĝin ricevas personoj kaj institucioj, kiuj faris "signifajn kontribuojn al la tibeta batalo pro homaj rajtoj kaj libereco".**

**Ĉijare estis du premiitoj. Unu estis la sudafrika ĉefepiskopo Desmond Tutu, kiu ricevis la distingon pro sia strebado por fortigi la rajtojn de subprematoj, kaj pro sia klara subteno al la rajtoj de tibetanoj.**

**La alia premiito ĉijara estis la fondaĵo Hergé, kiu premiatis pro sia subteno al la heredaĵo de la forpasinta verkinto de *Tinĉjo en Tibeto,* Georges Remi (alinome Hergé). La franclingva versio de la verko estis publikigita en 1959, en la sama jaro, kiam ĉinaj trupoj komplete ekregis Tibeton kaj la ĉefpastro fuĝis al Barato.**

***Tinĉjo en Tibeto* estas unu el la plej popularaj verkoj en la mondfama bildstriserio pri la knabeca ĵurnalisto. La libro rakontas pri la amikeco inter Tinĉjo kaj la tibeta knabo Chang, kiu postvivis flugakcidenton en la montaro. Kiam Tinĉjo venas por savi sian amikon, li renkontas tibetajn monaĥojn kaj la mitan neĝohomon.**

**La premio, en formo de tibeta lanterno, kiu uzas klarigitan buteron anstataŭ oleon, estis akceptita de la vidvino de Hergé, Fanny Rodwell. Grava kialo de la**

**premiado estis la sinteno de Hergé en rilatoj kun ĉina eldonisto de Tinĉjo. Kiam la verko aperis en la ĉina, ĝi nomatis *Tinĉjo en ĉina Tibeto.* Hergé kaj lia eldonejo protestis, kaj la ĉinoj konsentis aperigi la verkon kun la origina titolo.**

**Ne nur dum la ceremonio oni disdonis ekzemplerojn de la verko al la ĉeestantoj, sed ankaŭ ekster la salono senpagaj Tinĉjo-libroj haveblis. Sed nur en Esperanto.**

**La premia ceremonio okazis en Bruselo jam en junio 2006 kaj pri ĝi raportis multaj mondaj amaskomunikiloj. Tamen ĝis nun ne estis vaste konate inter la esperantistaro, ke oni specife elektis ĝuste la Esperantlingvan eldonon por disdonado. La Esperanta eldono de *Tinĉjo en Tibeto* aperis ĉe la eldonejo Casterman en 2005.**

*www.liberafolio.org*

***"Ĉu la operacio estos tre multekosta, doktoro?"***
***"Ne maltrankviliĝu, viaj heredontoj pagos!"***

# Refoje Pri Pola Radio

**Zamenhoftagon, la 15an de decembro, la dissendoj de Pola radio ĉesis, sed verŝajne ne tute malaperos. Plej verŝajne la entuziasma esperantistaro daŭre povos aŭskultadi la disaŭdigojn per siaj komputiloj. Vidu http://www.polskieradio.pl/polonia/article.asp?tld=46143&j=7**

**La prezidanto de la Pola Radio, Krzysztof Czabański vendredon informis PAP-agentejon, ke Esperantlingvaj disaŭdigoj en Pola Radio ne malaperos, ili ne estos elsendataj de Radio Polonia, sed interrete.**

***"La abceso en via nuko ne danĝeras", diris la kuracisto al la malsanulo, "sed vi devas daŭre observi ĝin!"***

# Nepala Esperanto-Lernejo

**La 15an de decembro estis de aktivuloj nepalaj fondita lernejo nomata "Nepala Esperanto-Lernejo", aŭ NEL. Ĝia celo estas aktive informadi pri kaj instruadi Esperanton en Nepalo kiel ankaŭ eksterlande. Nepala Esperanto-lernejo aktivos en universitatoj, lernejoj kaj aliloke por ke oni almenaŭ eksciu pri la ekzisto de Esperanto. Krome ĝi aktive instruos nian lingvon.**

**Iuj el la taskoj de NEL estas: informadi tie, kie Esperanto ankoraŭ estas nekonata. Kuraĝigi gestudentojn verki ekz. tezojn. Pruvi ke Esperanto estas necesa kaj bezonata. Traduki nepalan literaturon Esperanten. Organizi seminariojn.**

**Jen la komitatanoj de NEL: Prezidanto: L.P. Agnihotry; direktoro: Mukunda Raj "Pathik"; Sekretario: Bharat Kumar Ghimire; kasisto: Parasar Rijal.**

**Ordinaraj membroj: Ajit Joshi (Katmanduo); Himlal Parajuli (Pokharo); Chol Nath Pokharel (Itaharo);**

**Konsilantoj: profesoroj Hori Yasuo (Japanujo) kaj Ammar Raj Joshi (universitato Trivuban).**

**Indas mencii, ke NEL sendependas, tamen kunlaboras kun NespA, NEJO, KAEM. UEA. TEJO. ILEI kaj ĉiuj aliaj internaciaj organizaĵoj laŭ sia ebleco.**

***Bharat Kumar Ghimire***

*Finas sian preĝon knabineto: "Kaj kara Dio, bonestu doni iom da varmigaj vestoj al la kompatindulinoj en la gazeto legata de mia patro!"*

# 33a Internacia semajno de Esperanto

**De la 18a ĝis la 25a de aŭgusto 2007 okazos la 33a Internacia semajno de Esperanto en Sete, Francujo. Nova grupo daŭrigas la laboron de Yvette Vierne kaj bonvenigos vin en granda parko distance nur 50 metrojn de la marbordo.**

**Por pli da detaloj rigardu http://perso.orange.fr.nikolao/esperanto.html. Kontaktu ankaŭ: Esperanto-Kulturo kaj Progreso, 10, impasse école J.**

**Ferry, FR-34290 Servian, tel/fakso: 33(0)4 67 39 16 30, rete: jf.passarella@free.fr**

***Knabeto kuniris kun sia patro al ĉevalaŭkcio. Mirante li demandis sian patron, kial ĉiuj rondiras palpante la ĉevalojn.***

***"Tio estas", respondis la patro, "ĉar eble ili aĉetos la ĉevalojn, oni nomas tiujn homojn 'interesitoj'.***

***Kiam la patro kelkajn tagojn poste revenis de sia laboro, la knabeto ploregante renkontis lin.***

***"Paĉjo, Paĉjo, vi ne vendu Panjon!"***

***"Ne kompreneble ne, neniam mi vendos Panjon, kial vi kredas tion?"***

***"Ĉar hodiaŭ venis iu interesito…"***

# Semajno de Internacia Amikeco

**De la 19a ĝis la 25a de februaro 2007**

**Antaŭ pli ol 36 jaroj nia altestimata samideano, Erik Carlén diris: "Ni ekbruligu la flamon de Amikeco trans la limoj. Ĝia lumo signifas justecon, fratecon kaj pacon inter ĉiuj homoj kaj popoloj.**

**Kaj por ke tiu flamo lumu pli klare en la mondo, ni laboras por la disvastigo de la neŭtrala, internacia lingvo, Esperanto. En la servo de la nobla tuthomara kulturo ĝi vivu, floradu kaj eligu la lumon de amikeco trans limoj".**

**Do la bela ideo pri "Semajno de Internacia Amikeco" estas jam iom malnova, ĉu ne? Ĝi jam fariĝis tradicio en Esperantujo. Al la originala ideo oni povas aldoni plurajn aliajn signifojn, laŭ propraj vidpunktoj kaj proponetoj de la medio, sed la ideo pleje respegulas la esencan fonon de nia lingvo internacia: Egaleco inter homoj kaj nacioj; solidareco inter ĉiuj gentoj kaj respekto al homaj rajtoj.**

**Tamen, malgraŭ la dekomenca sukceso inter niaj esperantistoj, iom post iom, tiu ĉi celebrado fariĝis ĉiam pli modesta, malmulte ekspluatita, preskaŭ forgesita. Ĉu vere estas tiel? Vi donu la respondon!**

**La plej agema kaj vigla grupo sendube ĝis nun estas tiu de Leuven (Loveno) en Belgujo, kiu ĉiujare organizas imponan aranĝon kun subteno de la urba Administracio. Petu sugestojn kaj informojn el la tieaj esperantistoj, ili estos kontentaj helpi vin.**

**Alia grupo, kiu ĉiam organizas ion elstaran estas tiu de Triesto (Italujo), kiu ĉijare dum tiu semajno prezentos la "Kurtfilman (mallongfilman) Esperanto-Festivalon" kiel ankaŭ la filmojn venintajn el Italujo, Ukrainujo, Litovujo, Kroatujo. Ĵurio kaj la publiko voĉdonos por la plej bonaj el ili. Rigardontoj, ankaŭ neesperantistaj, estos elkore bonvenaj.**

**Pluraj Esperanto-grupoj aranĝos komunan vespermanĝon aŭ sendos bildkartojn al malproksimaj geamikoj, iuj organizos ekskurseton, aliaj donacos librojn al fora(j) Esperanto-grupo(j), abundas la eblecoj ion fari, necesas nur iom da bona volo. Bona, eĉ bonega ideo estus kolekti monon por financi la partoprenon de junulo al TEJO-kongreso en Vjetnamujo aŭ al la universala kongreso en Japanujo.**

**Mi invitas vin ĉiujn preni parton en tiu ĉi celebrado: bonestu kontakti min – se vi emas – por peti informojn, proponetojn, indikojn, mi estas je via dispono. Kaj, se vi ion aranĝos, bonestu informi min kaj mi informos aliajn, kiuj povos imiti vin kaj ricevi instigon al simila agado.**

***Edvige Ackermann, Italujo. Komisiito de UEA por "S.I.A."***

***"Se vi neniam antaŭe vidis 14-dolaran bankbileton, kiel vi povas aserti, ke ĝi estas falsa?"***

## Lernas Esperanton kvarcent gejunuloj

**La 13an de januaro 2007 malfermiĝis Esperanto-kursoj por komencantoj en la Hanoja Ŝtata Universitato. Estos la unua fojo, ke tiaj kursoj okazos en tiu universitato. Precize en tiu universitato okazos, fine de junio 2007, la Internacia Junulara Kongreso de Esperanto (IJK63). Jam registriĝis 400 gestudentoj, kaj ni atendis nur ĉirkaŭ 150. La instruado**

**okazos laŭ la fama Zagreba Metodo. La instruistoj estos: Nguyen Thi Ngoc Lan; Luong Ngoc Bao; Lai Thi Hai Ly; Nguyen Van Ha;Thieu Quang Dieu kaj Nguyen Xuan Thu.**

**La kursoj daŭros tri monatojn. Poste ni organizos ekzamenojn. La dek plej bonaj lernintoj ricevos senpagan aliĝon al UJK63. La aliaj povos agadi kiel volontuloj - helpantoj de la kongreso. Ĉiuokaze, tio estas nova vento en la veloj de la movado, kaj varbo de novaj fortoj.**

**Tiuj kursoj estas rezulto de kunlaboro inter Vjetnama Esperanto-Asocio kaj la loka Universitata Junulara Organizo.**

**Menciindas, ke la direktoro de tiu Universitato estas profesoro Nguyen Van Loi, kiu samtempe estas prezidanto de Vjetnama Esperanto-Asocio.**

**Salutleterojn sendu al autuno32@yahoo.com**

*Nguyen Thu*

*"Nu, sinjoro Coleman, ĉu vi, laŭ via opinio, vivas normalan vivon?"*

*"Jes, doktoro, certe!"*

*"Nu, sinjoro Coleman, pli bone estus, se vi ĉesus tion dum iom da tempo!"*

# Radio Polonia

**Ekde la 9a de januaro oni refoje povas aŭskulti Esperantajn dissendojn el Pola Radio. Nun ĝi aŭskulteblas nur interrete, sed ĉiutage. La disaŭdigoj daŭras proksimume nur 20 minutojn.**

**La nova retadreso de la Esperanto-redaktejo estas www.polskieradio.pl/eo**

**Elŝutu el la paĝaro de Pola Radio per http://polskieradio.pl/podcast/39/podcast.xml aŭ el paĝaro de World Radio Network: http://www.wrn.org/listeners/stations/station.php"StationID=16**

**Eblas aŭskulti ankaŭ al http://www.republika.pl/viavento/aktuale/sonmaterialoj.htm**

*Lukasz Zebrowski*

# Tamen ★ Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, MARTO 2007/ JARKOLEKTO 26
Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019
esperantobob@iprimus.com.au
Disponeblas ankaŭ surrete ĉe la retejo de Esperanto en Sudaŭstralio:http://sa.Esperanto.org.au

*Vizitas maljunaj geedzoj muzeon en sia urbo. Ili admiras "Venuso de Milo".*

*"Antikvaĵoj ĉiam belas", diras la edzino.*

*Rigardante ŝin la edzo amare respondas: "Jes, sed ne ĉiam!"*

## Edukado



**Se vi vere deziras lerni kiel senerare – kaj senĝene – uzadi nian belegan lingvon, tiam trastudu, pli ol nur unu fojon, "Lingvaj Resondoj", la elstaran verkon de nia eminenta, ĉiame mankanta, sed nemalhavebla eksĉefekzamenisto, Marcelo Leereveld, kiu nun mankas al ni!!! Li ĉiam instruis en niaj Somerkursaroj kaj aktivis en niaj Kongresoj. Lian verkon mendu ĉe 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur $ 22,00!**

## Siajn kotizojn por 2007 al "Esperanto en Sudaŭstralio

**pagis jam Indrani Beharry-Lall; Trevor kaj Katja; Pat Palmer kaj Audrey kaj Bob.**

**Se vi intencas daŭrigi vian membrecon, bonestu pagi al nia kasistino, Indrani Beharry-Lall, 1/20 Fletcher Street, Woodville North, S.A. 5012. Eblas pagi ankaŭ en nia kunvenejo!**

*"Nu, 320 Linnane, ĉu vi ricevis vian uniformon?"*

*"Jes, s-ro Serĝento, sed nur unu vestaĵo havas la ĝustan grandecon.!*

*"Kaj kiu estas tiu?"*

*“La kravato, s-ro serĝento!”*

## Mummy, why can’t we all speak the same language”



**Legu ankaŭ la bonan libron “Mummy, why can’t we all speak the same language?” de Nicole Else. Ĝi estas angle verkita kaj celas ĉefe infanojn proksimume 10-jarajn. Ĝi enhavas 15 mallongajn partojn: 1. Languages of the world.**

**2. Similarities between languages. 3. How languages differ by their grammar. 4. How languages differ by their alphabet. 5. Chinese writing. 6. Japanese writing. 7. Writing numbers in different languages. 8. Different ways of writing English: Braille, Morse, shorthand. 9. Phonetic and simplified English spelling. 10. Languages in Australia. 11. Why is translating so hard?**

**12. The need for a common language. 13. Why can’t everyone learn English? 14. What is Esperanto? 15. Why is Esperanto easier to learn?**

**La libro kostas nur $6,95 + afranko $1,95 ene de Aŭstralio. Ĝin donacu al ĉiuj viaj junaj neesperantistaj geamikoj, al bibliotekoj, lernejoj ktp. Mendu ĝin rekte de la verkinto: Nicole Else, 1/359 Pacific Highway, Asquith NSW 2077 aŭ perrete nicole@cryogenic.net. Por pliaj informoj vidu http://members.iinet.net.au/~nicolee/bookad.html**

**Se vi deziras konsili al neesperantistoj lernadi kelkajn vortojn en Esperanto per ludoj, jen alia grava adreso: http://members.iinet.net.au/~nicolee/game.html**

***Steele sidas mallaboreme ĉe sia skribotablo. Subite lia estro staras antaŭ li dirante: “Ĉu vi ne havas laboremon hodiaŭ, Steele?”***

***“Jes, sed mi scias regi min!”***

## Gravaj Esperanto-eventoj:

**Merkredon la 7an de marto ni renkontiĝos en Clarence Park ekde la 18a horo.**

**Merkredon la 21an de marto ni renkontiĝos en Clarence Park ekde la 18a horo.**
**La Studotago de "Esperanto en Sudaŭstralio" okazos iun sabaton en aprilo, kiun ni poste anoncos.**
**Sabaton la 28an de aprilo okazos teatraĵoj ĉe Pat ekde la 18a horo.**
**Sabaton la 26an de majo okazos kantovespero ĉe Indrani ekde la 17a horo.**
**Sabaton la 23an de junio okazos boatekskurso en Adelajdhaveno. La horoj aperos iom poste.**
**NASK okazigos sian Somerkursaron en Sandiego, Kalifornio, de la 9a ĝis la 27a de julio.**
**La 92a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 4a ĝis la 11a de aŭgusto en Jokohamo, Japanujo. http:www.k4.dion.ne.jp/~uk2007/;http://www.k4.dion.ne.jp/~uk2007/**
**Sabaton la 25an de aŭgusto okazos ekskurso al la nacia parko Cleland. La horoj aperos poste. Enirprezo $ 23.**
**Sabaton la 22an de septembro ni ekskursos al "Platformo 1". Horoj kaj enirpago aperos poste.**
**Iun sabaton en oktobro ni okazigos distraĵojn ĉe Katja kaj Trevor.**
**Iun tagon en novembro ni renkontiĝos ĉe Gloria Bristow.**
**Zamenhofa Vespero okazos la 5an de decembro en Clarence Park. Eniro senpaga!**
**La Universala Kongreso de Esperanto okazos en 2008 en Roterdamo, Nederlando.**

***"Kiom da filoj havis Jakobo?"***
***"Dek du."***
***"Kaj kio ili nomatis?"***
***"La fratoj Jakobson!"***

# Transloĝiĝis NASK

**La kalifornia universitato en Sandiego anoncas la starigon de oficiale aprobitaj Esperanto-kursoj. Tiuj kursoj okazos somere kaj estos malfermitaj al la tutmonda esperantistaro.**

**La universitato, konata ankaŭ kiel UCSD (www.ucsd.edu), estas unu el la plej konataj kaj prestiĝaj universitatoj en Usono, kaj inter ĝiaj profesoroj troviĝas ok Nobel-premiitoj. Ĝi situas apud la pacifika marbordo en Sudkalifornio, proksime al la landlimo inter Usono kaj Meksikio.**

**La kursaro daŭrigos la tradicion de la Nordamerika Somerkursaro (NASK), okazinta dum 30 jaroj en Sanfrancisko kaj dum la ĵus pasintaj jaroj en Vermonto. Honore al tiu tradicio, la nova kursaro en Sandiego ĉisomere pritraktos i.a. la verkaron de la ĵus forpasinta verkanto William Auld, la unua instruisto en NASK en Sanfrancisko. La instruista grupo en la somero 2007 konsistos el Paul Gubbins, kiu gvidos la superan kurson, kaj Lee Miller, kiu gvidos kurson por progresantoj. Grant Goodall, profesoro en la universitato kaj direktoro de ties lingva fako, estros la kursaron.**

**Ĉijare la kursaro okazos inter la 9a kaj 27a de julio. La universitato bonvenigos ĉiujn interesiĝantojn al siaj somerkursaroj, sendepende de antaŭa universitata studado.**

**Por intervjuoj kaj pli ampleksaj informoj pri la oficialigo kaj starigo de la kursoj: Grant Goodall goodall@ling.ucsd.edu**

**Por informoj pri registriĝo, stipendioj, ktp.: Ellen Eddy eddyellen@aol.com**

### *Ju pli alte oni situas, des pli fortege oni falas*

***Tri estraranoj devis mezuri la flagstangon antaŭ Esperanto-domo. Ili staris sur la ŝultroj unuj de la aliaj, kaj preskaŭ falis. Rigardis ilin ordinara membrino. Iom poste tiu konsilis:***

***"Ĉu ne estus pli facile, se vi kuŝigus la flagstangon?"***

***"Ni mezuras la altecon, ne la longecon, vi stultulino!" estis ilia respondo.***

## Nova DVD aĉetinda

**DVD "Esperanto elektronike" estis eldonita en la pasinta julio de la junulara organizaĵo E@I en la kvanto 9000! Danke al kunlaboro kun asocioj kaj unuopuloj oni atingis antaŭmendojn por 8.650 ekzempleroj, kio ebligis presi ĝin malmultekoste kaj vendi al la mendintoj kontraŭ nur 2 eŭroj por unu ekzemplero.**

**Dum nur unu monato ĉiuj 9.000 diskoj estis elĉerpitaj, verŝajne la plej granda eldonkvanto en Esperantujo, kaj samtempe ĝia plej rapida forvendo!**

**Aldono:**

**Oni faris alpreson kaj ĉe la mendo de minimume 50 ekzempleroj promesis havi la 2-eŭran prezon. www.esperantodvd.net - estas la ret paĝo, de kie ni povus havi pliajn informojn.**

**Ĝis antaŭ kelkaj semajnoj neniu aŭstraliano mendis la diskon. Mi scivolas pri ĝi kaj ŝatus havi 2 – 3 ekzemplerojn de ĝi. Ĉu ankaŭ iu alia? La DVD povus esti malmultekosta, sed informplena donaco aŭ varbilo ankaŭ por vi. Mi pretas kolekti la mendojn kaj aranĝi la pagon.**

***K. Steele***

***Ĉiuj en la urbo kompatis kompatindan Gordon. Li estis inventinta kontraŭŝtelalarmilon kaj estus fariĝinta riĉega, se iu ŝtelisto ne estus ŝtelinta ĝin!***

## Okazis io revolucia

**Kiel diris humoristo: "Estas tre malfacile antaŭdiri ion ajn, precipe la estontecon". Estas same malfacile antaŭdiri kio ekde nun okazos al Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj la plej multaj el ĝiaj membroj. Dum la jarkunveno, la 11an de januaro 2007, la membroj voĉdonis favore por registri Aŭstralian Esperanto-Asocion kiel "Kompanion Limigitan per Garantio". Voĉdonis 'por' 65 rajtigitaj voĉdonantoj, kontraŭis 19 kaj nur 4 sin detenis.**

***"Vi do kredis, ke vi pafis al alko, ĉu ne?"***
***"Jes, s-ro policisto."***
***"Kaj kiam vi komprenis, ke ĝi ne estas alko?"***
***"Tuj kiam ĝi komencis pafi al mi!"***

## Mi ŝatis en la Somerkursaro…

**Forlasi la ĉiutagaĵojn kaj por kelkaj tagoj enmergiĝi en la Esperanto-mondon estas en si mem ripetinda sperto. Mi pasigis sep tagojn en Hobarto kadre de la ĉijara Somerkursaro kaj jen kion mi tie pleje ŝatis:**



1. **La lokon, kie nia aranĝo okazis. Ni loĝis kaj aktivis en universitataj konstruaĵoj sur unu el la montetoj. Tage kaj nokte ni povis admiri la luksan panoramon "sub" ni: la riveron Derwent, la imponan Tasman-ponton, la insuletojn, velŝipojn kaj ĉion, kio ĉirkaŭas la urbon.**
2. **La ekskursojn. Unu privatan al bela-premiga Port Arthur kun halto en pitoreska Richmont, kaj la komunan perbusan al la monto Wellington.**
3. **La grandan grupon de infanoj (13), kiuj ĉeestis la kursaron kaj la evidente serioze interesiĝantajn junulojn – pluraj el kiuj estis komencantaj esperantistoj.**



4. **Kaj tute ne laste, la abundon de manĝaĵoj, kiujn ni ne devis prepari, kaj kiujn mi povis manĝi nerapide, en agrabla societo de samideanoj.**

***Katja***

***"Ĉu vi estas certa, ke via edzino scias, ke mi kuniros hejmen kun vi por vespermanĝi?"***

***"Ho jes, ĉimatene ni kverelis tutan horon pri, tio!"***

## Triumfo por Sudaŭstralio



**Se juĝi laŭ la informoj de la platetoj sur la drama ŝildo kun la nomo de la donacinto, Herbert Koppel, Adelajdo respektive Sudaŭstralio ĝis nun neniam gajnis konkurson ĉe la kongresoj de AEA (troveblas la nomoj de Manly, Brisbano, Kanbero, ELOA {=Perto}, Melburno, Viktorio, FNSK).**

**Tiu situacio ŝanĝiĝis ĉe la kongreso (aŭ**

**somera kursaro) en Hobarto en 2007, kaj dufoje: nia grupo gajnis la kantokonkurson (niaj reprezentantoj estis Pat Palmer, Carol kaj Brendan Linnane) kaj la teatraĵkonkurson per la farso *La Promesita Lando* (verkita de Trevor Steele: konfesendas, ke la aktoroj estis ne pure adelajda grupo – ni havis helpon de japano, du novzelandanoj, melburnano kaj sidnejano).**



***Skribis Trevor, laŭ ordono de Katja***

***"Kion vi faras por vivteni vin?"***
***"Mi senpolvigas bombojn en la aerarmeo."***
***"Hu, ĉu ne estas danĝere, ili povas ja eksplodi."***
***"Tio ne koncernas min. Ili ne estas miaj bomboj!"***

## Refoje pri Radio Pola

**Dezirante ke la Esperanto-programo atingu vin podkaste, ts. ekzemple por aboni podkaston eblas uzi la paĝon: http://www.apple.com/itunes/overview/. La tie trovebla programo iTunes funkcias same sub Vindozo kiel ankaŭ sub MacOsX. Per tiu ĉi paĝo eblas ĝin elŝuti musumante sur la vorto "download". Sekvante proponatajn paĝojn la iTunes-programo instaliĝos en vian komputilon. Ĉe la menuo de la elŝutita programo necesas elekti "Advanced" kaj musumi ĝin por atingi la submenuon "aboni podkaston". Musumante sur ĝin sufiĉas nun englui la adreson: http://www.polskieradio.pl/podcast/39/podcast.xml Se tio ĝuste okazis, ekde nun la abonita Esperanto-programo mem ĉiutage aperos en via komputilo.**

**Krom la nombro da vizitoj al niaj paĝoj, t.e. la nombro da podkastaj programoj, daŭre gravas la korespondaj kontaktoj kun la redaktantaro. Samas la adreso: Esperanto@polskieradio.pl.**

***Renato Corsetti***

*En la vilaĝestraro diskutatis nova leĝo pri hejmbuĉado. Iuj proponis, ke devas esti devige anestezi la senhelpajn bestojn antaŭ ol buĉi ilin.*

*Iu el la ĉeestantoj petis parolpermeson:*

*"Laŭ mia opinio, ni buĉu la porkojn kiel ni ĉiam faris. Ili jam alkutimiĝis al tio!"*

## El Flandra Esperanto-Ligo

**Antaŭ unu jaro mi ricevis mesaĝon kun la peto enkasigi ĉekon por iu Ken Charles, kiu asertis, ke li estas novzelandano, plie: prezidanto de Novzelanda Esperanto-grupo. Li uzis la retadreson "esperantofamilio@yahoo.com. Li petis ankaŭ gastigadon pere de Pasporta Servo. (Tiel li havis mian adreson). Ĉar mi ne fidis lin, mi skribis al Novzelanda Esperanto-Asocio, kiu konfirmis mian suspekton: tie neniu konas lin, eĉ UEA ne konas lin.**

**Antaŭ unu semajno, amiko mia ricevis similan peton, ankaŭ tra Pasporta Servo. Ĉifoje temis pri iu Tony Brown el Britujo, kiu efektive sendis ĉekon petante enkasigi ĝin por per tio rezervi ĉambron en hotelo.**

**Tiun fojon li uzis la adreson: esperantoparolanto@yahoo.com**

**Karaj geamikoj, atentu, ĉar la ĉeko certe estas falsita! Imagu la konsekvencojn POR VI, se vi facilkredeme kaj bonvole irus al la banko kun falsita ĉeko! Zorgu ankaŭ ke niaj aliaj esperantistaj geamikoj ne falu en kaptilon de fraŭdisto.**

**La valoro de la falsita ĉeko estis 18.000 eŭroj. Se iu havas tiom da mono, li/ŝi povus ja MEM rezervi hotelĉambron ie ajn en la mondo. Do nepre atentu: ne fidu tiajn homojn!**

*Lode Van de Velde, sekretario de Flandra Esperanto-Ligo*

*"Je kioma horo vi foriris el via hejmo?"*
*"Je la unua horo, s-ro policisto."*
*"Sed la kolizio okazis ja kvaronon antaŭ la unua."*
*"Jes, ĝi okazis eĉ tre rapide!"*

# Tamen ★ Plu

**OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, APRILO 2007/ JARKOLEKTO 26**
**Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019**
**esperantobob@iprimus.com.au**
**Disponeblas ankaŭ surrete ĉe la retejo de Esperanto en Sudaŭstralio:http://sa.Esperanto.org.au**

***Dum sia vizito al Sovetujo fascinis Nixon nova telefono, kiu povas rekte konekti iun ajn kun Dio. Nixon parolis mallonge kun Dio, kaj la telefonvoko kostis al li 27 cendojn. Hejmen veninte li malkovris, ke tiu sama servo haveblas ankaŭ en Usono. Refoje li provis kaj ricevis fakturon de 12,000 dolaroj. Nixon estis surprizita.***

***"Kiel povas esti", li diris, "ke tiu sama telefonvoko kostas nur 27 cendojn en Sovetujo?"***

***"Nu", diris la telefonisto, en Sovetujo ĝi estas loka telefonvoko!"***

## Edukado



**Se vi vere deziras lerni kiel senerare – kaj senpene – uzadi nian belegan lingvon, tiam trastudu, pli ol nur unu fojon, "Lingvaj Resondoj", la elstaran verkon de nia eminenta, ĉiame mankanta, sed nemalhavebla eksĉefekzamenisto, Marcelo Leereveld, kiu bedaŭrinde nun mankas al Aŭstralia Esperanto-Asocio!!! Li ĉiam sukcese instruis en niaj Somerkursaroj kaj aktivis en niaj Kongresoj. Lian verkon mendu ĉe 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur $ 22,00!**

***Sperta stevardo en ŝipego instruis junulon pri tio, kiel agi en neatenditaj situacioj."Hieraŭ mi eniris kajuton, en kiu junulino survojis al la duŝejo. Senhezite mi min turnis kaj elirante diris: "Pardonu min, sinjoro!"***

*La saman posttagmezon, kiam la juna stevardo servis teon al la pasaĝeroj, li eniris kajuton, en kiu ĵusgeedziĝintoj kuŝis en la lito. Tuj li sin turnis kaj tre ĝentile demandis: "Ĉu iu el la sinjoroj deziras sukeron en sia teo?"*

# Samarkando

**En aŭgusto 2007 Samarkando oficiale kaj solene festos sian 2750-jariĝon subaŭspicie de UNESKO. Por celebri la gloran jubileon de la mondfama urbo, la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidareco kiel ankaŭ la loka Esperanto-klubo kolektas diverspecajn materialojn kiel ekz. gratulleterojn, vojaĝrakontojn, gazetartikolojn, librojn, broŝurojn, poemojn, kantojn, citaĵojn, fotojn, desegnaĵojn, dokumentojn ktp. pri Samarkando kaj samarkandanoj. Ĉio ajn pri la temo, inkluzive fotojn kaj/ aŭ informojn pri hoteloj, restoracioj, vendejoj, stratoj, komunumoj, firmaoj, varoj, librotitoloj, artaĵoj ktp. surhavantaj la nomon "Samarkand" aŭ ion similan. Eĉ viaj propraj eltrovaĵoj en Interreto estos TRE bonvenaj.**

**La projekto realigatas kunlabore kun la Samarkandaj Ŝtataj Muzeoj.**

**La plej interesajn materialojn publikigatos en nialanda gazetaro.**

**Ĉiuj ricevitaj kontribuaĵoj agnoskatos kaj eksponatos en la internacia ekspozicio en la Samarkanda Ŝtata Muzeo pri Historio kaj Kulturo kiel ankaŭ Artoj de Uzbekujo. Planata estas ankaŭ eldonado de speciala jubilea libro.**

**Anticipajn dankojn pro viaj kunlaboro kaj afabla subteno. Bonestu adresi viajn kontribuojn kiom eble plej baldaŭ al: Anatoli Ionesov, direktoro, Internacia Muzeo de Paco kaj Solidareco, P.O. Box 76, UZ – 140100 Samarkand, Respubliko Uzbekistan. Imps86@yahoo.com**
**http://www.aliaflanko.de/urbo/samarkand/muzeo.html**
**http://peace.museum.com**

*"Ĉe ni ĉiuj ses familianoj havas "aŭtomobilveturigpermeson!"*

***"Rimarkinde, kaj kiu do plej ofte havas la aŭtomobilon?"***
***"Johano Forĝisto, la aŭtomobilriparejposedanto!"***

# *Mummy, why can't we all speak the same language"*



**Legu ankaŭ la bonan libron "Mummy, why can't we all speak the same language?" de Nicole Else, nia popularа kaj aktiva samideanino! Ĝi estas angle verkita kaj celas ĉefe infanojn proksimume 10-jarajn. Ĝi enhavas 15 mallongajn partojn: 1. Languages of the world. 2. Similarities between languages. 3. How languages differ by their grammar. 4. How languages differ by their alphabet. 5. Chinese writing. 6. Japanese writing. 7. Writing numbers in different languages. 8. Different ways of writing English: Braille, Morse, shorthand. 9. Phonetic and simplified English spelling. 10. Languages in Australia. 11. Why is translating so hard?**
**12. The need for a common language. 13. Why can't everyone learn English? 14. What is Esperanto? 15. Why is Esperanto easier to learn?**

**La libro kostas nur $ 6,95 + afranko $1,95 ene de Aŭstralio. Ĝin donacu al ĉiuj viaj junaj neesperantistaj geamikoj, al bibliotekoj, lernejoj ktp. Mendu ĝin rekte de la verkinto: Nicole Else, 1/359 Pacific Highway, Asquith NSW 2077 aŭ perrete nicole@cryogenic.net. Por pliaj informoj vidu http://members.iinet.net.au/~nicolee/bookad.html**

**Se vi deziras konsili al neesperantistoj lernadi kelkajn vortojn en Esperanto per ludoj, jen alia grava adreso: http://members.iinet.net.au/~nicolee/game.html**

***"Ĉu vi devas sidi ĉiun vesperon en la drinkejo forvaporigante vian prudenton?"***

*"Ne, mi ne devas, tion mi faras eĉ tre volonte!"*

# Gravaj Esperanto-eventoj:

**Merkredon la 4an de aprilo ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Merkredon la 18an de aprilo ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**La Studotago de "Esperanto en Sudaŭstralio" okazos en Clarence Park sabaton la 21an de aprilo de la 11a ĝis la 16a horoj.**
**Sabaton la 28an de aprilo okazos teatraĵoj ĉe Pat ekde la 18a horo.**
**Merkredon la 2an de majo ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Merkredon la 16an de majo ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Sabaton la 2an de junio okazos kantovespero ĉe Indrani ekde la 17a horo.**
**Merkredon la 6an de junio ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Merkredon la 20an de junio ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Sabaton la 30an de junio je la 14a horo okazos boatekskurso en Adelajdhaveno. La horoj aperos iom poste.**
**Merkredon la 4an de julio ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**NASK okazigos sian Somerkursaron en Sandiego, Kalifornio, de la 9a ĝis la 27a de julio.**
**Merkredon la 18an de julio ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**La 92a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 4a ĝis la 11a de aŭgusto en Jokohamo, Japanujo. http:www.k4.dion.ne.jp/~uk2007/;http://www.k4.dion.ne.jp/~uk2007/**
**Merkredon la 8an de aŭgusto ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Merkredon la 22an de aŭgusto ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Sabaton la 25an de aŭgusto okazos ekskurso al la nacia parko Cleland. La horoj aperos poste. Enirprezo $ 23.**
**Merkredon la 5an de septembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**

**Merkredon la 19an de septembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Sabaton la 22an de septembro ni ekskursos al "Perono 1". Horoj kaj enirprezo aperos poste.**
**Iun sabaton en oktobro ni okazigos distraĵojn ĉe Katja kaj Trevor.**
**Merkredon la 3an de oktobro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Merkredon la 17an de oktobro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Merkredon la 7an de novembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Sabaton la 10an de novembro ni distros unu la aliajn en la hejmo de Katja kaj Trevor Steele, 9 Vicar Street, Gilles Plain, S.A. 5086.**
**Merkredon la 21an de novembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Zamenhofa Vespero okazos la 5an de decembro en Clarence Park. Eniro senpaga!**
**La Universala Kongreso de Esperanto okazos en 2008 en Roterdamo, Nederlando.**

***Maljuna Ashley diras al sia amiko Karlo: "Nun mi havas aŭdigilon, nun mi povas bone, eĉ bonege, ĉion aŭdi!"***
***"Bone", diras Karlo, "kaj kiom ĝi kostis?"***
***"Kvarono antaŭ la dua", respondas Ashley!"***

# Enigmo

**Parolas tri geamikoj pri Adamo, sed nur unu el ili scias la veron.**
**"Adamo inventis centojn da ludoj, diras Alfredo".**
**"Ne" diras Georgo, "li inventis malpli ol tiom".**
**"Li inventis almenaŭ unu ludon", diras Sofia.**
**Se nur unu el tiuj tri eldiroj veras, kiom da ludoj inventis Adamo?**
**La solvo de la problemo aperos en Tamen Plu en majo.**

*Nicole Else*

***"Ĉiam, kiam mi devas renkonti mian amikon, li havas barbostoplojn sur la mentono", diris la knabino, kun larmoplenaj okuloj, al sia patro. "Kion mi devas fari pri tio?"***
***"Provu renkonti lin je la akurata horo!"***

# Bona Volo

La Legio de Bona Volo (LBV), institucio fondita en Brazilo, de Alziro Zarur (1914-1979), kompletigis 57 jarojn la 1an de januaro 2007, kaj unu el ĝiaj originalaj iniciatoj estas la disvastigado de Kompleta ka Senlima Ekumenismo, favorante kongruiĝon de la tuta homa kaj spirita konoj en potencan forton je la servo de popoloj.

Ekde sia naskiĝo LBV klopodas ankaŭ por la pleja disvastigado de la internacia lingvo Esperanto, altvalora ilo por la interfratigo de la popoloj, konsiderante ke LBV estas la Esperanto de la religioj, samkiel Esperanto estas la LBV de la lingvoj.

En- kaj eksterlanda kresko de LBV okazas ĉefe pro la agemo de ĝia direktoro-prezidanto, José de Paiva Netto, kiu, kun la helpo de la socio, modernigadas kaj firmigadas la institucion ekde 1979, kiam li transprenis ties gvidadon, kio kreskigis ĝin je proksimume 15.000%, kaj transformis ĝin en unu el la plej grandaj manifestiĝoj de humanismo kaj socia solidareco.

Ekde 1994, LBV kunlaboras kun la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj (UN); la Institucio interrilatas kun la Departemento pri Publikaj Informadoj (DP) kaj havas statuson de ĝeneralaj konsultoj en la Konsilio pri Ekonomika kaj Socia Disvolviĝo (Ecosoc). Krom atesti la gravecon de tiu internacia laboro, tiuj konstatoj rajtigas LBV-on prezenti  proponojn kaj preni parton, per la povo de voĉdonado, en konferencoj kaj renkontiĝoj organizitaj de Unuiĝintaj Nacioj pri ĉiuj temoj, interesaj al la organizaĵo.

La rezulto de la klopodado de miloj da volontuloj, kontrubuantoj kaj kunlaborantoj sin montras per la miriga bilanco de asistoj de la Organizo. En 2005 LBV plenumis pli ol kvar milionojn da helpoj per pluraj sociedukaj agadoj en Brazilo. Temas pri lernejoj de elementa edukado, ekde suĉinfanetaĝo ĝis mezgrada lernejo, hejmoj por infanoj, gejunuloj kaj maljunuloj, komunumaj kaj edukaj centroj, kun pluraj kursoj pri profesiaj eduko kaj kapabligo, kaj neprokrasteblaj programoj pri batalado kontraŭ malsato

**kaj mizero, sociedukaj kampanjoj, kiuj indigas la vivon. Tiu laboro trapasas la landlimojn, ĉar ĝi okazas ankaŭ en Argentino, Paragvajo, Urugvajo, Bolivio, Portugalujo kaj eĉ Usono, kaj kalkulas je korespondantoj en la tuta mondo.**

**Por ke tiu grava socia, spirita kaj ekumena agado plikonatiĝu ankaŭ inter la tutmonda esperantistaro, ni, la anoj de Legio de Bona Volo, invitas vin, kara samideano, eniri retan paĝaron de la Institucio, kies adreso estas: www.bonavolo.com**

***Post gaja vespero juna esperantisto el Sidnejo devis iri hejmen per la lasta pramo. Kun teruro li rimarkis, ke la pramo estas jam tri metrojn for de la kajo. Kun kuraĝo de senesperulo li kuregis – kaj saltegis. Li sukcesis kaj surferdekiĝis kun grandega bruego. La subestro de la pramo alkuris kaj helpis la junan esperantiston stariĝi.***

***"Bone, eĉ bonege kamarado", diris la subestro, "sed kial vi ne atendis ĝis ni alkajiĝos?"***

## Veterana Esperantista Klubo (VEK)

**La kriterio por membreco en VEK estas minimume kvardekjara esperantisteco; tia membro nomatas veterano. Membro kun minimume kvindekjara esperantisteco nomatas jubileano kaj membro, kiu esperantistiĝis plej frue estas la dojeno de VEK.**

**Kvankam VEK fondiĝis jam en 1949 ĝi pasivis plurajn jarojn. Tial oni decidis provi reaktivigi ĝin kun novaj, utilaj celoj: krei arĥivon de homoj, kies profundaj spertoj pri la lingvo kaj la movado povas utili por doni informojn kaj konsilojn al la nunaj gvidantoj de la movado kaj ties historiistoj.**

**Ĉiuj kvalifikitaj homoj estas invitataj membriĝi en VEK. Kvankam la kotizo estas libervola, la rekomendita sumo egalas tiun de Membro kun Gvidlibro de UEA en la koncerna lando. Bonvolu anonci vin al UEA, kiu sendos al vi enketilon/aliĝilon.**

**uea@inter.nl.net**

***La kuracisto al la kolonelo: "La sola io, kion ni povas konstati estas, ke vi havas akvon en la genuoj".***

***Sed je la Diablo, akvon mi neniam trinkis. Ĝi devas esti malsupren sinkanta, kiam mi brosis miajn dentojn!"***

# Jen io laŭdinda

**De la 14a ĝis la 23a de januaro 2008 en Hillsborough, Aŭklando, Novzelando, la Loka Kongreskomitato por la Oceania kongreso intencas okazigi tri nivelojn da intensa instruado de Esperanto por ke kiom eble plej multaj el ni lernu nian lingvon ĝisfunde.**

***David Ryan***

***Tiu hundo kondutas tre, eĉ treege strange. Ĝi ne nur ĉasas aŭtomobilojn, sed ĝi ankaŭ enterigas ilin en la ĝardeno!***

# Ĉu la angla oficialas en Usono?

**En multaj landoj oni provas protekti la nacian lingvon kontraŭ la angla, dum en Usono oni debatas ĉu la angla estas endanĝerigata lingvo! La usona senato aprobis rezoluciojn deklarantajn ke la angla estas la oficiala kaj "komuna kaj unueciga" lingvo de ĉiu.**

**La rezolucioj havas plejparte neniun signifon. Ili ne povas eniri la leĝaron sen la interkonsento kaj de la Ĉambro de Deputitoj (malsupera domo de Kongreso) kaj de la usona prezidisto. Georgo Buŝ konsentas, sed ne kredas, ke leĝo necesas por oficialigi la anglan.**

**Reagoj pri la voĉdonoj varias de kolero al indiferento kaj amuziĝo. En Kalifornio, apartenanta al Meksikio ĝis 1849, iuj ŝerce scivolas, ĉu la urboj Losanĝeleso kaj Sandiego devos ŝanĝi siajn nomojn al la anglalingvaj ekvivalentoj "La Anĝeloj" kaj "Sankta Jakobo".**

**Komentistoj asertas, ke la voĉdonojn kaŭzis la ŝanĝiĝanta demografio de Usono. Tridek milionoj da usonanoj parolas hejme nur hispane. En Kalifornio kaj Teksaso troviĝas vastaj regionoj, kie oni ne trovas anglalingvajn parolantojn. Tute ne eblas trovi anglalingvan menuon, kaj afiŝtabuloj kaj nomoj de vendejoj estas nure hispanlingvaj.**

***Mike Leon***

# Tamen Plu

**OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, MAJO 2007/ JARKOLEKTO 26**
**Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019**
**esperantobob@iprimus.com.au**
**Disponeblas ankaŭ surrete ĉe la retejo de Esperanto en Sudaŭstralio:http://sa.Esperanto.org.au**

## FORPASIS FIDELA ESPERANTISTO

**Robert George Robertson naskiĝis la 7an de aprilo 1917 en Penrith, Nordanglujo. Poste li gajnis stipendion rajtigante lin studadi en la Universitato de Oksfordo, kie li eniris la inĝenieran fakon. Diligente studinte li diplomitiĝis pri elektroinĝenieraĵoj kaj ekdesegnis maŝinojn por elektro-centrejoj.**

**Nur 23-jara li fariĝis inĝenierleŭtenanto en la aviada fako de la militmaristaro.**

**En 1944 li estis sendita al Aŭstralio kiel staba inĝenieroficiro. En 1946 Robby reiris al Anglujo, kie li laboris en helikopterfabriko de 1946 ĝis 1950.**

**En 1950 Robby decidis enmigri en Aŭstralion. Li lekciis en la Universitato de Teknologio en Sidnejo. Poste li fariĝis Supera lekciisto kaj en 1963, kiel ankaŭ en 1972, li estis asistanta profesoro pri meĥanika inĝenierado. Li emeritiĝis en 1977.**

**En 1965 li eklernis Esperanton en la Manlia Esperanto-Klubo. Mallonge poste li ekinstruis kaj membriĝis en la estraro de la klubo. Li prezidis la Esperanto-federacion de Novsudkimrujo de 1968 ĝis 1970.**

**En 1972 Robby elektiĝis prezidanto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio. Tiun oficon li tenis ĝis 1980. De 1980 ĝis 1998 li prezidis la Manlian Klubon. Samtempe, fakte de 1973 ĝis 1985, li estis fakdelegito de UEA. En 1984 li ricevis la honoran titolon "Fratulo de AEA" pro siaj elstaraj servoj al la asocio. En 2004 li ricevis honoran dumvivan membrecon de AEA.**

**Li prenis parton en multaj aŭstraliaj kaj internaciaj kongresoj. Ofte li prelegis pri Esperanto, kiun li eminente promociis parolante en diversaj komunumaj kluboj; Rotario, Probus, Universitato de la 3a Aĝo ktp.**

**Post longa malsano Robby forpasis la 21an de aŭgusto 2006. Li mankas inter ni! Ĉiuj gesamideanoj de 'Esperanto en Sudaŭstralio' sendas siajn tutkorajn kondolencojn al Margaret kiel ankaŭ al la tuta familio Robertson.**

## Edukado



Se vi vere deziras lerni kiel senerare – kaj senpene – uzadi nian belegan lingvon, tiam trastudu, pli ol nur unu fojon, "Lingvaj Resondoj", la elstaran verkon de nia eminenta, ĉiame mankanta, sed nemalhavebla eksĉefekzamenisto, Marcelo Leereveld, kiu bedaŭrinde nun mankas al Aŭstralia Esperanto-Asocio!!! Li ĉiam instruis en niaj Somerkursaroj kaj aktivis en niaj Kongresoj. Lian verkon mendu ĉe 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur $ 22,00!

## Harmony Day kaj Esperanto

La tago de harmonio estis kreita antaŭ nur kelkaj jaroj. Ĝi celas festi kaj subteni la diversecon en la Aŭstralia socio, la kunlaboradon inter la malsamaj homgrupoj.

La celoj de ni esperantistoj ne malsimilas al tiuj supre menciitaj, ni do decidis provi uzi la okazon por prezenti nin.

Indrani Beharry-Lall alparolis la gvidanton de la biblioteko en Woodville petante fari ekspozicion pri Esperanto. Li jesis kaj tiel ni havis je dispono grandan afiŝtabulon meze de la libreja halo, vizitata ĉiutage de centoj da homoj. Dum preskaŭ tuta marto nia ekspozicio montris partetojn de la Esperanto-movado, lingvo, literaturo, lernebloj. Niaj flugfolioj rajtas esti en du lokoj de la biblioteko nun kaj estontece. Por la lasta triono de la jaro estas planata eĉ aparta prelego pri Esperanto.

*Katja Steele*

*"Vi do naskiĝis ekster geedzeco, ĉu ne?*
*"Jes,* preskaŭ *parte."*
*"Kion vi volas diri per "parte"?*
*"Mia patro estis edziĝinta, sed mia patrino ne!"*

## *Mummy, why can't we all speak the same language"*



Legu ankaŭ la bonan libron "Mummy, why can't we all speak
the same language?" de Nicole Else. Ĝi estas angle verkita kaj celas ĉefe infanojn proksimume 10-jarajn. Ĝi enhavas 15 mallongajn partojn: 1. Languages of the world. 2. Similarities between languages. 3. How languages differ by their grammar. 4. How languages differ by their

**alphabet. 5. Chinese writing. 6. Japanese writing. 7. Writing numbers in different languages. 8. Different ways of writing English: Braille, Morse, shorthand. 9. Phonetic and simplified English spelling. 10. Languages in Australia. 11. Why is translating so hard? 12. The need for a common language. 13. Why can't everyone learn English? 14. What is Esperanto? 15. Why is Esperanto easier to learn?**

**La libro kostas nur $6,95 + afranko $1,95 ene de Aŭstralio. Ĝin donacu al ĉiuj viaj junaj neesperantistaj geamikoj, al bibliotekoj, lernejoj ktp. Mendu ĝin rekte de la verkinto: Nicole Else, 1/359 Pacific Highway, Asquith NSW 2077 aŭ perrete nicole@cryogenic.net. Por pliaj informoj vidu http://members.iinet.net.au/~nicolee/bookad.html**

**Se vi deziras konsili al neesperantistoj lernadi kelkajn vortojn en Esperanto per ludoj, jen alia grava adreso: http://members.iinet.net.au/~nicolee/game.html**

***Eniras virino la oficejon de privatdetektivo.***

***"Mia edzo trompas min", ŝi diras, "mi volas, ke vi sekvu lin tage kaj nokte kaj poste raportu al mi, kial ŝi povas ami iun kia li!"***

# Gravaj Esperanto-eventoj:

**Merkredon la 2an de majo ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**

**Merkredon la 16an de majo ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**

**Sabaton la 26an de majo okazos kantovespero ĉe Indrani ekde la 17a horo.**

**Merkredon la 6an de junio ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**

**Merkredon la 20an de junio ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**

**Dimanĉon la 24an de junio okazos boatekskurso en Adelajdhaveno. La horoj aperos iom poste.**

**Merkredon la 4an de julio ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**

**Merkredon la 18an de julio ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**

**NASK okazigos sian Somerkursaron en Sandiego, Kalifornio, de la 9a ĝis la 27a de julio.**

**La 92a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 4a ĝis la 11a de aŭgusto en Jokohamo, Japanujo. http:www.k4.dion.ne.jp/~uk2007/;http://www.k4.dion.ne.jp/~uk2007/**

**Merkredon la 8an de aŭgusto ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Merkredon la 18an de julio ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Merkredon la 8an de aŭgusto ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Merkredon la 22an de aŭgusto ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Sabaton la 25an de aŭgusto okazos ekskurso al la nacia parko Cleland. La horoj aperos poste. Enirprezo $ 23.**
**Merkredon la 5an de septembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Merkredon la 19an de septembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Sabaton la 22an de septembro ni ekskursos al "Platformo 1". Horoj kaj enirpago aperos poste.**
**Merkredon la 3an de oktobro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Sabaton la 13an de oktobro ni okazigos distraĵojn ĉe Katja kaj Trevor.**
**Merkredon la 17an de oktobro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Merkredon la 7an de novembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Sabaton la 10an de novembro ni renkontiĝos en la nova vendejo "Sunflower Charity Shop", North East Road, vidalvide al "Sanct Agnes Shopping Centre".**
**Merkredon la 7an de novembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Merkredon la 21an de novembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**La Zamenhofa Vespero okazos la 5an de decembro en Clarence Park. Aŭtomobilrestadigado kaj eniro senpagaj!**
**La Oceania Kongreso okazos en Aŭklando, Novzelando. de la 14a ĝis la 23a de januaro 2008**
**La Universala Kongreso de Esperanto okazos en 2008 en Roterdamo, Nederlando. Tiu ne estos senpaga!**

***"Koran dankegon pro la salajroplialtigo, ĉefo. Jen la negativoj de la fotoj, kiujn mi faris dum la firmafesto!"***

## La solvo al la enigmo aprila

**Ni pripensu! Se li inventis centojn da ludoj, tiam Alfredo kaj Sofia pravas, do ni ne povas akcepti tiun solvon.**

**Se li inventis, ni diru, 10 ludojn, tiam Sofia kaj Georgo pravas, do ni ankaŭ ne povas akcepti tiun solvon.**

**Fakte tiu komento validas por ĉiuj nombroj inter 1 kaj cento. Kio do restas? Ni ne povas akcepti iun ajn nombron pli alta ol 1 aŭ egala al 1!**

**La solvo estas do, ke li inventis 0 ludojn. Se li inventis neniujn ludojn, tiam Georgo pravas, kaj nur li!**

***Nicole Else***

***"Diru al mi bubo, kial vi malfermas la fenestrojn? Estas ja nur 12 gradoj laŭ Celsius ĉi tie interne?"***

***"Jes, sed estas 4 gradoj laŭ Celsius ekstere en la ĝardeno ĉu ne? Se ni enlasas tiujn 4 gradojn ĉi tien ni havos16 gradojn kaj ne bezonos hejti tiom multe!"***

## La Oceania Kongreso

**La Oceania Kongreso okazos en Aŭklando, Novzelando, de la 14a de januaro 2008 ĝis la 23a de januaro 2008.**

**La organizantoj intencas inviti eksterlandajn geinstruistojn je diversaj niveloj por oferti kursojn. La Kongreso do tre similos al Somerkursaro kun siaj ekskursoj, prelegoj, distraĵoj ktp. Viaj proponetoj pri ekskursoj kaj aliaj programeroj estos eĉ tre bonvenaj!**

**Eble vi jam nun mendu viajn flugojn por alveni al Aŭklando la 14an de januaro!**

***"Kien vi metis miajn golfludŝtrumpojn?"***
***"Sed karulo, vi ja ne havas golfludŝtrumpojn."***
***"Jes, tiuj kun la 18 truoj!"***

## Du honoraj gastoj kaj kion ni faru en julio?

**Vizitis en marto "Esperanto en Sudaŭstralio" samideano Hans Häglund el Ludvika, Svedujo. Je nia granda surprizo la saman vesperon aperis en la Komunumejo alia skandinava samideano Finnur Larusson el Rejkjaviko, Islando. Tiuj du skandinavaj esperantistoj tre bone regas nian lingvon, kaj aldonis multe da ĝojo al nia kunveno. Finnur fakte estas loĝanto en Adelajdo, ni do esperegas revidi lin multajn fojojn en la Komunumejo en**

**Clarence Park, dum Hans bedaŭrinde devis foriri por labori en Mildura kaj Berry. Poste li iros al Novzelando por ferii iomete kun sia edzino.**



**Tiu Hans proponetis ion, kio ŝajnas al mi eĉ tre bona. Li proponis ke ni ĉiuj profunde pripensu ĉu eblas ion fari en julio pro la datreveno de la Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis ĝuste en Adelajdo de la 19a ĝis la 26a de julio 1997.**

**Ĉu ni adelajdanoj devus okazigi ion eksterordinaran por celebri la 10-jariĝon de tiu glora evento? Mi persone ŝatus aldoni, ke ankaŭ esperantistoj loĝantaj en aliaj ŝtatoj de Aŭstralio serioze pripensu, ĉu valoras ion aranĝi okaze de la datreveno de tiuj gloraj tagoj en Adelajdo, ĉar precipe ili kunhelpis por ĝia sukceso!**

***Annie estis en la dimanĉolernejo kune kun sia amikino Eileen, kiu estas pastrofilino. Konscience Annie enmetis monon en la preĝejan monkolektujon. Hejme ŝin demandis ŝia patrino:***

***"Ĉu ankaŭ Eileen donacis iom da mono?"***

***"Ne, kiel vi povas kredi tion? Estis ja ŝia patro, kiu ĉefaktoris!"***

## UEA centjara en 2008

**En 2008 Universala Esperanto-Asocio estos 100-jara. Por ekhavi grafikan identigilon, kiu kunligu ĉiaspecajn aktivaĵojn tra la mondo okaze de tiu festo, la Estraro de UEA lanĉis konkurson pri jubilea simbolo.**

**La serĉata simbolo emfazu la 100-jaran historion de UEA kaj la daŭran aktualecon de ĝiaj celoj kaj idealoj. Ĝi estu elvoka, laŭeble simpla kaj uzebla presite kaj elektronike. Ĝi estu unukolora aŭ plurkolora, sed ankaŭ unukolore uzebla. La simbolo estos uzata nur lige kun la festado de la 100-jariĝo de UEA kaj ĝi ne anstataŭos la**

**ĝeneralajn movadajn simbolojn (verda stelo, simbolo de la Jubilea Jaro 1987 k.a.).**

**En la konkurso rajtas partopreni ĉiuj, ankaŭ neesperantistoj. Oni rajtas partopreni per pli ol nur unu konkursaĵo. La gajninto ricevos premion de 500 eŭroj. La rajtoj pri la premiita konkursaĵo, inkluzive de ĝia eventuala adapto, apartenos al UEA. Pri la aljuĝo decidos la Estraro de UEA.**

**Oni sendu la konkursaĵon ĝis la 30a de junio 2007 al Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Roterdamo, Nederlando; aŭ rete al <simboloCHEco.uea.org>**

***Kuŝas la maljuna grandbienulo tre malsanega en sia lito. Li alvokas al si sian fidelan koĉeron.***

***"Steele", li lacege diras, "nun mi devas prepari min por la plej lasta vojaĝo. Ĝi estos longa, eĉ pli longega kaj malfacilega ol iu ajn vojaĝo, kiun ni du kune faris…"***

***Tuŝita de la seriozeco de la momento kaj provante iel konsoli la grandbienulon, Steele forviŝas larmeton el la okulo dirante:***

***"Jes, sed sinjoro grandbienulo, mi certas ke ĝi iros malsupren!"***

## La bulteno "Familia Esperanto" koloras

**Post dujara interrompo reaperis "Familia Esperanto" sub la sceptro de nova redaktoro, *Claude Rouget* el Norvegujo. "Familia Esperanto", kies subtitolo estas "Cirkulaĵo por Esperantlingvaj paroj kaj familioj", estas oficiala organo de Rondo Familia de UEA. La nova numero estas kolore ilustrita, 20-paĝa, kaj enhavas i.a. raportojn pri novjaraj Esperanto-aranĝoj, inviton al la Internacia Infana Kongreseto en Jokohamo, porinfanajn rakontojn kaj versaĵojn, spertojn de diverslandaj Esperanto-familioj kaj resuman raporton pri la pasinta jardeko de Rondo Familia.**

**La bulteno legeblas en la retejo de Rondo Familia, http://uea.org/rondo_familia, kie oni povas legi ankaŭ ĝiajn antaŭajn numerojn. Por familioj, kiuj ne havas aliron al**

**komputiloj kaj reto, oni konsideras ankaŭ paperan eldonon. Por ebligi tion subtenaj kotizoj de 10 eŭroj aŭ pli estas bonvenaj al la UEA-konto idoj-p de la Rondo.**

**Rondo Familia estis fondita en 1994, la Internacia Jaro de la Familio, por ligi esperantistajn familiojn. Ĝi registras familiojn kun aŭ sen infanoj, sendepende de ilia movada engaĝiĝo. La Rondo estas gvidata de komisiono, kies kunordiganto estas *Amri Wandel*, kaj aliaj membroj redaktoro *Claude Rouget, Jouko Lindstedt* kaj *Bert Schumann*. *Lindstedt* estas administranto de la retlisto denask-1,www.Helsinki.fi/~jslindst/denask-l.html, kaj *Schumann* komisiito pri Internacia Infana Kongreseto, http://www.uea.org/kongresoj/iik.html**

***"Panjo, kio okazas al aŭtomobilo, kiam ĝi estos tiom malnova, ke ĝi ne plu povas veturi?"***

***"Tiam venos iu ruzulo kaj vendos ĝin al Paĉjo!"***

## "Feliĉan Paskon en Kristo resurektinta"

**La 8an de aprilo 2007 la papo Benedikto la 16a bondeziris Esperante al pluraj miloj da homoj en la Placo Sankta Petro en Vatikano.**

***Iam estis – tiel komenciĝas ĉiuj bonaj fabeloj, ĉu ne? – tre trankvila kaj eĉ tre nerva kaj maltrankvila viroj. Kune ili luprenis apartamenton.***

***Iun tagon la eĉ tre nerva kaj maltrankvila viro kuŝismaltrankvile en la bankuvo. Trankvile envenis la tre trankvila viro kun tekulero en la mano. Tre trankvile li elprenis tekuleron da akvo el la bankuvo kaj trankvile eliris. Tio okazis plurajn fojojn, kaj subite la eĉ tre nerva kaj maltrankvila viro eĉ pli maltrankviliĝis. Kiam la tre trankvila viro trankvile eniris la sepan fojon, demandis la eĉ tre nerva kaj maltrankvila viro maltrankvile: "Kio en la mondo okazas?"***

***"Ho", respondis la trankvila viro trankvile, "brulas en la kuirejo…!"***

# Tamen Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, JUNIO 2007/ JARKOLEKTO 26
Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019
esperantobob@iprimus.com.au
Disponeblas ankaŭ surrete ĉe la retejo de Esperanto en Sudaŭstralio:http://sa.Esperanto.org.au

## Ĉu ankaŭ vi respektas "ESA"?

**Ĝis nun por 2007 sian kotizon al "Esperanto en Sudaŭstralio" pagis Audrey kaj Bob Felby, Katja kaj Trevor Steele, Pat Palmer, Indrani Beharry-Lall, Eileen Jones, Margaret Furness, Nancy Roy, Annie kaj Ashley, kaj Sandor kaj Helen.**

**Se vi ankoraŭ ne pagis, bonvolu tion fari al nia kasistino: Indrani Beharry-Lall!**

***La aŭtomobilo de la kuracisto malsanis, kaj ĝi kaj la kuracisto staris en la aŭtomobilriparejo. Iom post iom la kuracisto ekperdis sian paciencon.***

***Ĉu vi ankoraŭ ne trovis kio malbonas al la aŭtomobilo? li demandis al la aŭtomobilriparisto. Ĉu vi estas certa, ke vi vere ellernis ĉion lernendan pri aŭtomobiloj?***

***"Jes kompreneble, diris la aŭtomobilriparisto. Sed estas multa pli malfacile estis aŭtomobilriparisto ol simpla kuracisto. Viaj malsanuloj povas diri al vi, kie doloras, kaj krome, vi riparas nur du modelojn."***

## Edukado



**Se vi vere deziras lerni kiel senerare – kaj senpene – uzadi nian belegan lingvon, tiam trastudu, pli ol nur unu fojon, "Lingvaj Resondoj", la elstaran verkon de nia eminenta, ĉiame mankanta, sed nemalhavebla eksĉefekzamenisto, Marcelo Leereveld, kiu bedaŭrinde nun mankas al Aŭstralia Esperanto-Asocio!!! Li ĉiam instruis en niaj Somerkursaroj kaj aktivis en niaj Kongresoj. Lian verkon mendu ĉe 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur $ 22,00!**

*"Ĉu vi neniam deziris edziniĝi, onklino Nancy?"*

*"Kio, ĉu edziniĝi? Neniam! Mi havas fornon fumantan, hundon grumblantan, murmurantan kaj furzantan, papagon sakrantan, kaj katon elestantan ĉiun nokton – kial en la mondo mi edziniĝu?"*

## Mummy, why can't we all speak the same language"



**Legu ankaŭ la bonan libron "Mummy, why can't we all speak the same language?" de Nicole Else. Ĝi estas angle verkita kaj celas ĉefe infanojn proksimume 10-jarajn. Ĝi enhavas 15 mallongajn partojn: 1. Languages of the world. 2. Similarities between languages. 3. How languages differ by their grammar. 4. How languages differ by their alphabet. 5. Chinese writing. 6. Japanese writing. 7. Writing numbers in different languages. 8. Different ways of writing English: Braille, Morse, shorthand. 9. Phonetic and simplified English spelling. 10. Languages in Australia. 11. Why is translating so hard? 12. The need for a common language. 13. Why can't everyone learn English? 14. What is Esperanto? 15. Why is Esperanto easier to learn?**

**La libro kostas nur $6,95 + afranko $1,95 ene de Aŭstralio. Ĝin donacu al ĉiuj viaj junaj neesperantistaj geamikoj, al bibliotekoj, lernejoj ktp. Mendu ĝin rekte de la verkinto: Nicole Else, 1/359 Pacific Highway, Asquith NSW 2077 aŭ perrete nicole@cryogenic.net. Por pliaj informoj vidu http://members.iinet.net.au/~nicolee/bookad.html**

*"Kiel progresas la maldikiĝo de via edzo?"*

*"Bone, eĉ bonege", respondas la edzino. "La grandega ŝipego tatuita sur lia brusto, estas nun nura remboato!"*

# Gravaj Esperanto-eventoj:

**Sabaton la 9an de junio okazos kantovespero ĉe Indrani je la 17a horo.**

**Merkredon la 6an de junio ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**

**Merkredon la 20an de junio ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**

**Dimanĉon la 30an de junio okazos boatekskurso en Adelajdhaveno. Por pli da informoj bonvolu kontakti ges-rojn Mortimer 8449 5764.**

**Merkredon la 4an de julio ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo. Margaret Furness parolos pri la 82 Universala Kongreso, kiu okazis ĝuste en Adelajdo.**
**Merkredon la 18an de julio ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**NASK okazigos sian Somerkursaron en Sandiego, Kalifornio, de la 9a ĝis la 27a de julio.**
**La 92a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 4a ĝis la 11a de aŭgusto en Jokohamo, Japanujo. http:www.k4.dion.ne.jp/~uk2007/;http://www.k4.dion.ne.jp/~uk2007/**
**Vendredon la 3an de aŭgusto je la 18.30a horo pri Esperanto parolos Trevor Steele en la biblioteko de Woodville.**
**Merkredon la 8an de aŭgusto ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Merkredon la 8an de aŭgusto ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Merkredon la 22an de aŭgusto ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Sabaton la 25an de aŭgusto okazos ekskurso al la nacia parko Cleland. La horoj aperos poste. Enirprezo $ 13,50.**
**Merkredon la 5an de septembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Merkredon la 19an de septembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Sabaton la 22an de septembro ni ekskursos al "Perono 1". Ni estu ĉe la perono jam je la 10a horo. Enirprezo $ 7,00. Se Margaret Furness ne ferios, ni kafumos ĉe ŝi en ŝia nova domo!**
**Merkredon la 3an de oktobro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Sabaton la 13an de oktobro ni okazigos distraĵojn ĉe Katja kaj Trevor.**
**Merkredon la 17an de oktobro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Merkredon la 7an de novembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Sabaton la 10an de novembro ni distros unu la aliajn en la hejmo de Katja kaj Trevor, 9 Vicar Street, Gilles Plain, S.A. 5086.**
**Merkredon la 21an de novembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**La Zamenhofa Vespero okazos la 5an de decembro en Clarence Park. Aŭtomobilrestadigado kaj eniro senpagaj!**
**La Oceania Kongreso okazos en Aŭklando, Novzelando. de la 14a ĝis la 23a de januaro 2008**

**La Universala Kongreso de Esperanto okazos en 2008 en Roterdamo, Nederlando. Tiu ne estos senpaga!**

*Anglo kun amikino en Skotlando verkis al ŝi leteron, en kiu li proponis, ke ili geedziĝu. Ŝi ne respondis.*

*Multajn jarojn poste ili rerenkontiĝis, kaj li malĝoje demandis”*

*“Vi do laciĝis pro mi, ĉu ne?”*

*“Ne, sed vi forgesis enmeti respondafrankon!”*

## La Sveda Verkista Asocio

**Ni membroj de la Sveda Verkista Socio estis petataj inviti ĉiujn de ni konatajn kolegojn – beletrajn verkistojn, fakverkistojn kaj literaturajn tradukistojn – al la verkista mondkongreso WALTIC 2008, kiu okazos en Stokholmo venontjare, hazarde en la sama kongresejo, en kiu okazis la UK en 1980.**

**La retpaĝo de la kongreso – http://www.congrex.se/waltic2008/ - estas portempe nur anglalingva, sed aldoniĝos ankaŭ aliaj lingvoj.**

**Gravas ke kiom eble plej multaj esperantlingvaj verkistoj kaj tradukistoj montros intereson kaj petos informojn, ĉu ili povos finfine veni aŭ ne, por ke oni konsciiĝu pri la ekzisto de Esperanta literaturo, kaj pri la uzebleco de Esperanto por la tutmonda verkistaro.**

**Sveda Verkista Asocio, kiu iniciatis kaj aranĝos la kongreson, havas multajn enmigrintajn membrojn, do viajn leterojn vi povas skribi en pluraj lingvoj, do ankaŭ en Esperanto. La ĉefa laborlingvo estos la angla, sed oni esploros la eblecon havi dum la kongreso samtempan tradukadon al kelkaj lingvoj.**

**La adreso estas: Sveriges Författarförbund, Box 3157, S-103 63 Stockholm, Svedujo, tel. +46 8 545 132 00, retpoŝto secretariat@Waltic.com**

*Kun kolegaj salutoj, Gunnar Gälmo*

*Finfine okazis la granda vendo en la grandmagazeno. Meze en la homamaso iris viro melankolie aspektanta. Finfine li aliris la informejon dirante:*

*“Mi perdis mian edzinon.”*

*"Jes, sinjoro, funebraj vestoj situas sur la unua etaĝo maldekstre!"*

## Helpopeto el Kinŝaso, Kongolando

**Mi scias, ke multaj esperantistoj tre okupataj tamen kaj malgraŭe povas helpi nepagipovajn landojn sendante al ili eĉ malnovajn revuojn, flagojn, flagetojn, stelojn, vortarojn ktp.**

**Do se plaĉus al vi liberigi viajn tirkestojn kaj bretarojn, bonestu sendi viajn superfluaĵojn al tiuj, kiuj urĝe bezonas ilin, precipe niaj afrikaj samideanoj.**

**S-ro Monshet Nhy Wa Dana, CILU B.P. 7598,
Boulevard et Building du 30 juin, Kinshasa, Demokratia Respubliko Kongo.
mailto:<monshetnhywadana@yahoo,fr>monshetnhywadana@yahoo.fr**

***Pastro Øberg estis tre ekscitita iun vesperon dum la tendokunveno. Li supren levis siajn brakojn al la ĉielo kaj rigardante la parohanojn li kriegis: "Vi ĉiuj sekvos min survoje supren al Jesuo!"***

***Tiam la maljunulo Olsen sin starigis kaj timeme demandis: "Pardonu min, sed se vi ĉiuj supren iros, restos neniu, kiu helpos min malstarigi la tendon?"***

## La tradicia konkurso "Liro"

**La Ondo de Esperanto refoje invitas vin partopreni en la tradicia literatura konkurso "Liro".**

**Liro- 2007 havas kvin branĉojn: 1. Originala prozo. 2. Originala poezio. 3. Tradukita poezio: Poemoj de Saŝa Ĉjornyj (Aleksandr Glikberg), okaze de lia 75a mortodato. 4. Tradukita prozo el la rusa lingvo: "Аптекарша" de Anton Ĉeĥov. 5. Tradukita prozo el la angla: Eveline de James Joyce el la novelaro "Dubliners".**

**En la branĉoj 1-3 oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj. Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la**

**sekretario de Liro, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrado, abon. Jaŝĉik 1205, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 15a de oktobro 2007.**

**Viajn konkursaĵojn subskribu per kaŝnomo kaj aldonu slipon kun indiko de la kaŝnomo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso. Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn ankaŭ rete, en apartaj mesaĝoj, al la adreso sezonoj@yahoo.com. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.**

**La originalajn tekstojn de la tradukendaj verkoj petu ĉe la sekretario kontraŭ afrankita koverto (por Ruslando) aŭ internacia respondkupono. La elektronikaj tekstoj estas elŝuteblaj ĉe: http://Esperanto.org/Ondo/Liro2007.htm.**

**La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2007. La organizanto ĝis la 1a de januaro 2010 havos la rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en La Ondo de Esperanto kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la verkinto, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizanto en okazo de libroforma eldono.**

**Pri la Liro legu: http://Esperanto.org/Ondo?Ind-liro.htm.**

***Sukcesojn! Halina Gorecka, sekretario de Liro-2007***

***"Ŝajnas al mi, ke nun mi devas vendi mian malnovan aŭton!"***

***"Sed kial?"***

***"Ĉar ĉiam, kiam mi restadigas ĝin ie, venas policisto min demandante ĉu mi jam raportis la akcidenton!"***

## Parolu, mondo!

**"Parolu, mondo" estas nova radioprogramo dissendata de 'Radio Boa Nova' www.radioboanova.com.br, ĉiun dimanĉon je la 22a horo GMT (la 18a horo en Brazilo).**

**Ĉiu povas atingi la programon musumante sur la butono "On-line" kaj poste sur unu el la du butonoj, kiuj**

**indikas la nomon de la sonprogramo Windows Media Player.**

**Sep tagojn post la ordina dissendo, la RRBN-teamo lasos la programon sonregistritan en la radioarĥivo por interreto, kaj tien oni povas atingi musumante la butonon Off-line, elektante la vorton Domingo (dimanĉo en la portugala), kaj elektante la aŭdilforman ikonon ĉe la dekstra flanko de la programo "Fala Mundo", en la linio 18h00 (18a horo).**

***Luko Jasumura, Radioprogramo "Parolu, Mondo!"***

## *Okazis en tramo en 1954*

***A. Mi estas tre grava persono, la prezidanto de la estraro de la Ŝtata Biblioteko.***

***L. Mi estas ŝimkovrita, malnobla, malpuraĉulo. (La ulo daŭre ridas al la prezidanto).***

***A. Kio estas al vi?***

***L. Mi scias ion, kion vi ne scias!***

***A. Kion vi scias?***

***L. Mia edzino lavadas viajn tolaĵojn, kaj ĝuste nun mi surhavas vian kalsonon!***

***Kontribuita de Arturo Mortimer***

***La juna, energia pastro diplomate pridemandas sian paroĥanaron pri tio, kiom populara li estas.***

***La juna fraŭlino Pia, diras ruĝiĝante:, "Sinjoro pastro, vi estas tute mirinda. Antaŭ ol vi venis ĉi tien, ni apenaŭ sciis, kio estas peko!"***

## La ĉina prezidisto rekomendas Esperanton

**Nuntempe preparatas la Ĉina Esperanto Kongreso, okazonta en la urbo Guanzhou (Kantono), dum oktobro. Dum tiucela estrarkunveno oni komentis, ke la urbaj aŭtoritatuloj estu malfermaj kaj helpemaj, kaj interalie oni montris al ili gazetaran eltondaĵon, en kiu legeblas artikolo pri la vizito de la prezidisto de Ĉinujo, Hu Jingtao, la 21an de decembro 2004. Dum vizito al iu fabriko li diris jene: "Ni**

**ne nur bone lernu "Pu Tong Hua", ni devas plu lerni Esperanton". Kiel ĉiu scias, Ĉinujo vere estas lingva mozaiko.**

**Uzatas tie tre multaj lingvoj kaj dialektoj. Homoj el diversaj regionoj kaj malsamaj urboj parolas sian propran dialekton. Sed necesas, ke ĉiuj konu "Pu Tong Hua", la oficiala ŝtata lingvo, devige lernenda de ĉiuj.**

**Ankaŭ Guangzhou havas sian propran dialekton, "Guangdong Hua". Neniuj aliaj ĉinoj ĝin komprenas.**

**Dum sia parolado la prezidisto rekomendis la pluan uzadon de "Pu Tong Hua", kiel lingvo unuiganta ĉiujn ĉinojn, kaj la ellernadon de Esperanto unuiganta la tutan mondon.**

***Augusto Casquero***

***Sonas la telefono en la fajrobrigadejo, kaj histeria virina voĉo kriegas:***

***"Rapidu, rapidu, brulas ĉe ni!"***

***"Ĉu vi jam provis surverŝi akvon?" respondis trankviliga vira voĉo!***

***"Jes, sed tio neniel helpis!"***

***"Do, ni ne bezonas veni, ĉar ni povas fari nenion alian!"***

***Surprizis juveliston vidi viron flugantan tra la fenestro de la juvelvendejo.***

***"Kion en la mondo vi faras?" la juvelisto lin demandis.***

***"Mi petas vian pardonon", respondis la viro, "mi forgesis malteni la brikon!"***

***Du bonaj amikoj mortis. Unu el ili iris ĉielen, la alia inferen. Post iom da tempo ili sukcesis kontakti unu la alian. Ili parolis pri tempoj pasintaj kaj pri vivo sur Tero ĝenerale. Fine la plej Diama el ili demandis la alian:***

***"Kia estas la vivo tie malsupre?"***

***"Bone, eĉ bonege! Ni laboras 6 horojn ĉiutage, havas 2 libertagojn ĉiusemajne, 3 monatojn da ferio ĉiujare! Kia estas la vivo ĉe vi?"***

***"Ne tro bona! Mi laboras minimume 10 horojn ĉiutage ses tagojn ĉiusemajne."***

***"Tio ne estas bona! Kial vi laboras tiom?"***

***"Pro manko de laboristoj!"***

# Tamen Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, JULIO 2007/ JARKOLEKTO 26
Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019
esperantobob@iprimus.com.au
Disponeblas ankaŭ surrete ĉe la retejo de Esperanto en Sudaŭstralio:http://sa.Esperanto.org.au

*"Paĉjo!"*
*"Silentu, bubaĉo!"*
*"Jes, sed Paĉjo!"*
*"Silentu, mi diris, ĉu ne ? Ni manĝas!"*
*"Jes, sed aŭskultu, Paĉjo !"*
*"Je la Diablo, bubaĉo, ĉu vi nenion komprenas ? Ĉe la manĝotablo vi ne parolu escepte se iu vin demandas pri io!"*
*"Paĉjo, ĉu vi ne povas min demandi, ĉu la kristnaskoarbo brulas ?"*

## Edukado



**Se vi vere deziras lerni kiel senerare – kaj senpene – uzadi nian belegan lingvon, tiam trastudu, pli ol nur unu fojon, "Lingvaj Resondoj", la elstaran verkon de nia eminenta, ĉiame mankanta, sed nemalhavebla eksĉefekzamenisto, Marcelo Leereveld, kiu bedaŭrinde nun mankas al Aŭstralia Esperanto-Asocio!!! Li ĉiam instruis en niaj Somerkursaroj kaj aktivis en niaj Kongresoj. Lian verkon mendu ĉe 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur $ 22,00!**

*Staris en la malfermita pordo la direktoro, kiam la plej juna kunlaboranto alvenis tro malfrue iun matenon.*
*"Vi devus esti alveninta je la oka horo!"*
*"Nu, kio okazis tiam ?"*



## Mummy, why can't we all speak the same language"

**Legu ankaŭ la bonan libron "Mummy, why can't we all speak the same language?" de Nicole Else. Ĝi**

**estas angle verkita kaj celas ĉefe infanojn proksimume 10-jarajn. Ĝi enhavas 15 mallongajn partojn: 1. Languages of the world. 2. Similarities between languages. 3. How languages differ by their grammar. 4. How languages differ by their alphabet. 5. Chinese writing. 6. Japanese writing. 7. Writing numbers in different languages. 8. Different ways of writing English: Braille, Morse, shorthand. 9. Phonetic and simplified English spelling. 10. Languages in Australia. 11. Why is translating so hard? 12. The need for a common language. 13. Why can't everyone learn English? 14. What is Esperanto? 15. Why is Esperanto easier to learn?**

**La libro kostas nur $6,95 + afranko $1,95 ene de Aŭstralio. Ĝin donacu al ĉiuj viaj junaj neesperantistaj geamikoj, al bibliotekoj, lernejoj ktp. Mendu ĝin rekte de la verkinto: Nicole Else, 1/359 Pacific Highway, Asquith NSW 2077 aŭ perrete nicole@cryogenic.net. Por pliaj informoj vidu http://members.iinet.net.au/~nicolee/bookad.html**

**Se vi deziras konsili al neesperantistoj lernadi kelkajn vortojn en Esperanto per ludoj, jen alia grava adreso: http://members.iinet.net.au/~nicolee/game.html**

***Malgranda knabo post vizito al sendoloriga dentkuracisto raportis al siaj kamaradoj:***

***"Estas nur mensogo ke li estas sendolora. Li enmetis siajn fingrojn en mian buŝon, kaj kiam mi mordis lin, li kriegis same kiel ĉiuj aliaj !"***

# Gravaj Esperanto-eventoj:

**Dimanĉon la 4an de julio ni boatekskursos en Adelajdhaveno je la 13.30a horo. Prezo nur $ 3.50 !**

**Merkredon la 4an de julio ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo. Venu vi ĉiuj, ĉar Margaret Furness parolos pri la 82a Universala Kongreso, kiu okazis ĝuste en Adelajdo !!!**

**Merkredon la 18an de julio ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**

**NASK okazigos sian Somerkursaron en Sandiego, Kalifornio, de la 9a ĝis la 27a de julio.**

**La 92a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 4a ĝis la 11a de aŭgusto en Jokohamo, Japanujo. http:www.k4.dion.ne.jp/~uk2007/;http://www.k4.dion.ne.jp/~uk2007/**

**Vendredon la 3an de aŭgusto en la biblioteko de Woodville pri Esperanto parolos Trevor Steele je la 18.30a horo. Ĉiuj bonvenos !!!**

**Sabaton la 4an de aŭgusto TEVA havos tablon ĉe la Movada Foiro en Jokohamo okaze de la UK. Respondeculo estos Francesco Maurelli, kiu kun la Landa Reprezentanto Nori (Yoshinori Saito) prezentos TEVA disvastigante informmaterialon.**
**Merkredon la 8an de aŭgusto ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Merkredon la 22an de aŭgusto ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Sabaton la 25an de aŭgusto okazos ekskurso al la nacia parko Cleland. La horoj aperos poste. Enirprezo $ 13,50.**
**Merkredon la 5an de septembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Merkredon la 19an de septembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Sabaton la 22an de septembro ni ekskursos al "Perono 1". Ni estu ĉe la perono jam je la 10a horo. Enirprezo $ 7,00. Se Margaret Furness ne ferios, ni kafumos ĉe ŝi en ŝia nova domo!**
**Merkredon la 3an de oktobro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Sabaton kaj dimanĉon la 6an kaj 7an de oktobro AEA okazigos sian ĝeneralan jarkunvenon en Brisbano.**
**Sabaton la 13an de oktobro ni okazigos distraĵojn ĉe Katja kaj Trevor.**
**Merkredon la 17an de oktobro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Merkredon la 7an de novembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Sabaton la 10an de novembro ni distros unu la aliajn en la hejmo de Katja kaj Trevor, 9 Vicar Street, Gilles Plain, S.A. 5086.**
**Merkredon la 21an de novembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**La Zamenhofa Vespero okazos la 5an de decembro en Clarence Park. Aŭtomobilrestadigado kaj eniro senpagas!**
**La Oceania Kongreso okazos en Aŭklando, Novzelando, de la 14a ĝis la 23a de januaro 2008.**
**La Universala Kongreso de Esperanto okazos en 2008 en Roterdamo, Nederlando. Tiu ne senpagos!**
**Tuj poste la Internacia Vegetarana Unio (International Vegetarian Union IVU) festos sian centjariĝon en Dresdeno, Germanujo. Ĉeestos multaj TEVA-anoj !**
**Ankaŭ TEVA (Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio) festos sian centjariĝon en 2008.**

*Emilo edzinigis la novan instruistinon de la vilaĝo. Ŝi estis malbela kiel la prapeko, sed kantis kvazaŭ anĝelo, ĉar ŝi kunkantis en la preĝeja ĥoro.*

*La matenon post la geedziĝo vekiĝis Emilo. La unua, kion li vidis, estis la novbakita edzino. Terure ŝokita pro la vidaĵo li elkriis:*

*"Kantu, virino, kantu !"*

# Kanto-vespero

**Iĝis jam tradicio, ke unu fojon en la jaro ni renkontiĝas en la domo de la muzikema Indrani en Woodville. Ke ankaŭ la aliaj ŝatas kanti pruvas la fakto, ke ni kunvenis multnombre. Ĉeestis Bob kaj Audrey, Katja kaj Trevor, Brendan kun Carol, Annie kaj Ashley, Libby kaj Arturo, Nancy, Pat kaj Eileen.**



**Ni alvenis al la domo de Indrani sabate, la 9an de julio, je la 5a horo posttagmeze. Laŭ la anticipe preparita programo de la gastigantino kaj akompanate de ŝia pianludado kaj banĝo de Bob, ni kantis elektitajn kantojn, kiuj venis el diversaj landoj.**

**Tiam ni faris paŭzon. En la kuirejo atendis nin tablo plena de apetitigaj manĝaĵoj, kunportitaj de ĉiu el ni. Aparta regalaĵo estis la hejme faritaj ĉokoladoj de Indrani.**



**Ankaŭ la dua, pli longa muzika parto, enhavis kantojn el diversaj landoj, kaj Trevor malkovris, ke en ĉiu el tiuj landoj estis iam universala kongreso de Esperanto.**

**Ĉu ni kantis bele? Pli-malpli. Evidente ke ni pli bone konas la eŭropdevenajn kantojn ol la aziajn. Sed ĉiun el ili ni kantis volonte kaj kun ĝuo. Estis tre agrabla vespero – ni konsentis, forlasante Indrani nur post la 8a horo vespere.**

***Katja***

***Aĉetinto: "Vidu, hieraŭ mi aĉetis ĉi tiun ĉemizon. Hejmen veninte mi trovis ĉi tiun longan ŝiraĵon en ĝi. Nun mi postulas, ke vi repagu al mi mian monon !"***

*Vendinto: “Mi bedaŭras, sed ni neniam redonas monon.”*
*Aĉetinto: “Sed en via fenestro estas skribite “Mono redonita se ne kontentigita.”*
*Vendinto: “Jes, certe, sed ni eĉ tre kontentas !”*

## Ni helpu niajn geamikojn !!!

**Kiel sciate ankaŭ ni esperantistoj en Sudaŭstralio ŝatas helpi tiujn, kiuj helpon bezonos.**

**Laŭ instigo de nia kara Katja ni ĉiun kunvenon en Clarence Park kolektas monon por inda esperantisto en Afriko. Ĉi tiun fojon ni kolektas por bonega esperantisto, Birindwa Mushosi, kiu nun trovas sin senlabora, ĉar la registaro pro etna aparteno lin maldungis el lia posteno - en iu porpastra seminariejo - por trovi laboron por burundiaj rifuĝintoj el Tanzanio. Decas aldoni, ke Birindwa fondis Esperanto-klubon kun multaj, eĉ multegaj Esperanto-lernantoj.**

**Kvankam Birindwa havas tre altajn studnivelojn li tamen ne plu havas laboron. Li ne loĝas en rifuĝejo sed luprenas propran loĝejon, en kiu li instruas pri Esperanto.**

**Birindwa preferas ne loĝi en la rifuĝejo, kiu en Burundio situas sescent kilometrojn for de la ĉefurbo. La vivkondiĉoj en la rifuĝejo ne estas elteneblaj kvankam la registaro provizas nutraĵojn. Ekzemple komunikado kun la ekstera mondo tute ne ekzistas!**

**Birindwa instruas Esperanton por tute ne forgesi ĝin. Krome li deziras regi nian lingvon plej perfekte. Sed en lia lando Esperanton ne eblas plustudi tre altnivele por diplomitiĝi, kaj cetere ne troviĝas multaj spertaj esperantistoj el kiuj oni povas lerni.**

**Estas en Burundio tre malfacile retumi, sed tre gravas al Birindwa la retumado. Sen ĝi li ne povas ion ajn scii pri la Esperanto-movado. Ĝuste tial ne taŭgas al li loĝi en la rifuĝintejo, ĉar tie estas eĉ ne retkafejoj.**

**Mi tutkore konsentas kun Katja, ke tiu nia amiko, Mirindwa, certe meritas nian helpon, kaj mi instigas ĉiujn malavare kontribui al la plifaciligo de lia vivo.**

*“Nur la plej spertaj kaj lertaj homoj serĉas laboron. Kio okazis al tiuj, kiuj ne lertas kaj spertas ?”*

*“Ili jam trovis laboron !”*

## Aŭskultu ! Aŭskultu !
## La alaŭdo

**Estus bone, se ni KORVOJ povus timigi niajn du federaciajn estrojn tiom, ke ili provizu federacian helpon por la Publikaj Bibliotekoj Aŭstraliaj. Dum 1977, ni KORVOJ sukcesis timigi Don Dunstan entrepreni financan helpon por niaj Ŝtataj Publikaj Bibliotekoj. Ni tion faris minacante malplenigi la Ŝtatan Bibliotekon de Sudaŭstralio.**

**Sed atendu momenton ! Nun estas antaŭelekta tempo kaj sendube Howard kaj Rudd tremas pro la fakto, ke du trionoj el aŭstralianoj apartenas al kaj regule uzas publikajn bibliotekojn. Tiuj 12 milionoj da aŭstralianoj kore amus havi la plej bonajn publikajn bibliotekojn en la mondo ?**

**Mi estas informita, ke kontraŭ nur 600 milionoj da ekstraj dolaroj – nenio por riĉa lando kia Aŭstralio ! – ni povas efektivigi ĉi tiun fieran revon havi la plej bonajn publikajn bibliotekojn en la tuta mondo !**

*Arturo Mortimer*

*“Kiom galanta vi estas, vi kisis mian manon !”*

*“Jes, ie oni ja devas komenci, ĉu ne ?”*

## Gratulon al brava kolegino



**Nia tre ŝatata kaj admirata samideanino, Nicole Else, patrino de elstare inteligenta junulo, Dominic, sukcesis kun honoro en la ekzameno pri Esperanto-instruado en la Universitato de Novsudkimrujo.**

**Nicole prenis parton en kurso por instruontoj kune kun Miranda Lutz kaj Igor Couto. Espereble ankaŭ ili baldaŭ ricevos siajn diplomojn !**

**Pri tio dissendis per la yahoo grupo Esperantoaustralia mesaĝon Renato Corsetti. El Aŭstralio ŝi ĝis nun ricevis gratulmesaĝojn nur de manpleno da esperantistoj, inter kiuj Donald Broadribb, sed krom tio ŝi ricevis tiajn el Grekujo, Portugalujo, Meksikio, Hungarujo kaj Belgujo.**

**Ankaŭ ni membroj de "Esperanto en Sudaŭstralio" aldonas niajn gratulojn al tiuj multaj aliaj. Vi, Nicole, instruu ne nur en Sidnejo, sed precipe dum niaj estontaj somerkursaroj. Elkorajn gratulojn al vi !!!**

**Tiu nia Nicole regule sukcesas en ĉio, kion ŝi faras. Ekzemple la 6an de junio ŝi prelegis al 25 estontaj lingvoinstruistoj en la Sidneja Universitato.**

***Dum la posttagmeza kafotrinkado fiere rakontis s-ino Steele: "Tiun ĉi kafon mia edzo hejmen portis el Brazilo".***

***"Jes, nur imagu kiom bonegaj la termoboteloj estas nuntempe" respondis s-ino Jones imponita* !**

# Japana pasportservano en Aŭstralio

**La 6an de majo skribis Robert Budzul, ke japana pasportservano vizitos Aŭstralion. Unue li flugos al Tasmanio, kaj de tie al Adelajdo. Li demandis, ĉu iu en Adelajdo pretas renkonti la japanan samideanon en Adelajdo.**

**Volontulis Jonatano en Novkastelo samtempe bedaŭrante, ke li ne loĝas en Adelajdo, sed petis, ke adelajdanoj salutu la japanon en la nomo de Jonatano.**

**Ĉu iu bonkora adelajdano pretas renkonti kaj gastigi nian japanan samideanon ???**

***Malvarman kaj pluvegoplenan julian vesperon la pastro kaj la sonorigisto survojis hejmen. Alveninte al la pastroloĝejo, la pastro diris:***

***"Eniru kun mi por trinki grogon"***

***"Ne, dankon" diris la sonorigisto, "mi preferas ne trinki alkoholon. Tio facile iĝos fikutimo".***

*"Kara amiko", diris la pastro, "ĉiun vesperon la pasintajn 40 jarojn mi trinkis grogon, kaj ĝis nun tio ne fariĝis fikutimo!"*

## *El "Letero al mia filo" 1648*

***Ĉu vi ne scias, mia filo, kun kiom malmulte da saĝeco la mondo regatas?***

***Grafo Oxenstierna, 1583 - 1654***

## Ges-roj Libby kaj Arturo Mortimer

**Kun eĉ tre granda ĝojo ni povas raporti, ke ankaŭ Libby kaj Arturo, tre aktivaj membroj de "Esperanto en Sudaŭstralio" pagis siajn kotizojn. Ni tre elkore dankegas ilin pro ilia entuziasmo pri Esperanto !**

***"Mi meblis tute laŭ mia propra kapo" diris Sonja montrante sian novan apartamenton al sia amikino.***

***"Jes, tion mi vidas, aspektas tre malplene ĉi tie !"***

## Tamen Plu dudek kvin jarojn

**Tamen Plu estas la nomo de la oficiala organo de Esperanto en Sudaŭstralio. Nuntempe ĝi eldonatas kiel A3-formata 8-paĝa bulteno, disponebla ankaŭ rete. Same kiel ĉe la starto, ĝia redaktanto ankoraŭ nun estas Bob Felby en Adelajdo.**



**La ĉijara jarkolekto de Tamen Plu estas la 26a. Ĉar ĝi atingadas nin ĉiumonate "aŭtomate", ni ne sufiĉe ĝustatempe konsciiĝis, ke Tamen Plu atingis jam kvaronan jarcenton. Dudek kvin foje 12 aperintaj numeroj (en la komencaj jaroj estis ankaŭ dumonataj numeroj) donas estimindan ciferon 300. Trafoliumante eĉ nur etan parton de ili oni ricevas enrigardon kvazaŭ en familian albumon de la adelajdaj esperantistoj de la lasta kvaronjarcento. Same, kiel estus ĉe fotoalbumo, ankaŭ ĉikaze iuj eventoj pli elstaras ol aliaj, iuj personoj eble mankas de sur la komuna bildo aŭ nur neklare videblas, sed jen aperas ĉarma eta familia**

detalo, alifoje senteblas malakordo, jen faktoj, aliloke impresoj, pensoj… Simple: bunta kalejdoskopo pri nia esperantista vivo.

Bob estas dandevena. Al Aŭstralio li venis en 1974. Jarojn poste enmigris la landon la polo Zbigniew Wybraniecz, kiu rakontis al Bob pri sia iama Esperantumado en la Krakova Universitato. La Esperanto-grupo, kiun li tie fondis, aperigis propran bultenon, nomatan "Tamen". Kial ne fari same ankaŭ en Adelajdo?! Bob, kiu jam en Danujo redaktis Esperanto-bultenon (Frederikssundaj Frenezaĵoj) volonte realigis la ideon kaj baptis ĝin Tamen Plu. Estis 1981.

Ni kune trafoliumu kelkajn el la ĝis nun aperintaj numeroj, rememoru homojn, lokojn, aranĝojn.

Tiutempe la adelajdaj esperantistoj renkontiĝadis en unu el la ejoj de la Universitato de Adelajdo. Krom Bob kaj lia edzino Audrey, kunvenadis George Clarke, Thea van den Boogaard, Peter Ellyard, Bert Onn kaj Beryl Randles. Presi 10 ekzemplerojn de Tamen Plu estis sufiĉe. Kompreneble, oni unue tajpu la tekston per skribmaŝino kaj multobligu ĝin ĉe presisto.

La unuaj jarkolektoj de Tamen Plu estis 2 A4-formataj folioj, kunvinktitaj ĉe unu angulo. Per kaŭĉuka stampilo Bob aldonis antaŭ la titolo verdan stelon kun kanguruo en la mezo. "Distribuata senkoste al la membroj" – estis skribite sub ĝi. Tio validas ankoraŭ.

El la maja-junia numero de la 3a jarkolekto (1984) ni ekscias, ke pluraj kunvenoj okazis en infanvartejo. Oni multe diskutis pri gramatiko. George Clarke iĝis kasisto de la grupo.



En 1991 aperas kiel "editor" la nomo Peter Bird, en marto 1992 anstataŭita de Charles Stevenson.

Komplete anglalingva estas la junia numero de 1992, redaktita de Max Wearing. Sub titolo "Extraordinary issue" en ĝi estas anoncite, ke oni atendas la

viziton de la ĝenerala direktoro de UEA, decidonta pri okazigo de onta UK en Adelajdo.

La aŭgustan numeron de la sama jarkolekto redaktis jam refoje Bob, ĝi kaj kelkaj sekvantaj estas jam dulingvaj, Esperanto-anglaj. Ili enhavas inter alie krucenigmon, desegnitajn ŝercojn, poemojn kaj estas multobligita totokopie.

Ankoraŭ en 1993 ekzistis en Adelajdo nur unu klubo.



En Tamen Plu aperas nomoj kiaj Astrid Riesen, Irene Cuffe, Rochelle Jacquir, Tadeusz Wybraniec, Zbigniew Wybraniec, Peter Bird, Noni Walsh, Pat Nunn, Brian Hancock, Ros Jachson, Ilse Blicavs, Owen Franklin, Colin Giles, Barbara Kwietek. Oni renkontiĝadis en lokoj kiaj indonezia restoracio en Unley, la framasona klubo, la kvakerejo.

Por 1993 oni elektis kiel prezidanton Margaret Furness. Inter la programeroj de tiu jaro estis prezentado de kuirado. Bob kaj Audrey instruis la samideanojn pri vegetara kuirarto.

Samtempe ekaperas (kaj daŭre enestas) en Tamen Plu ŝercoj. "Mi trovis iun ŝerclibron kaj komencis traduki el ĝi en Esperanton" – klarigas la redaktanto, kiu evidente ege ĝuas tiun taskon.

En la novembra eldono de la sama, 13a jarkolekto, aperas interesa informo: "AEA pagis $ 600 por montri Esperanto-ekspozicion en la ekspoziciejo de la Adelajda kongresejo en Norda Teraso. Preparis ĝin Gerald kaj Ruth Tumman en Melburno. La prezentadon prizorgis Virginia Lampe."

La novembra numero de 1995 estas unu A4- paĝa. Ni legas: "Temporary editor Margaret Furness".

Aprilo 1996: La prezidanta iĝis Brendan Linnane. Max trovis novan lokon por renkontiĝi: "Proscenio" en Blyth strato. Al la "Nigra Truo", kiel la esperantistoj nomis la lokon, oni venadis pli ol unu jaron.

**En 1997 la grupo renkontiĝadas refoje en la kvakerejo. Tiam Brendan Linnane ne nur prezidas, sed ankaŭ redaktas Tamen Plu. Tiu jaro estas la jaro de la UK en Adelajdo. En la marta bulteno aperas listo de membroj de la Landa Kongreskomitato de la UK, inter ili Max Wearing kaj Brendan Linnane kiel vicprezidantoj. Maje aperas la pli ol 2-paĝa raporto de la LKK-prezidanto Kep Enderby.**

**La aŭgustan numeron de 1998 redaktas ree Bob. Samloke aperas la informo, ke la "Sudaŭstralia Esperanto-Societo" ŝanĝas sian nomon al "Esperanto Sudaŭstralio". Ŝanĝita estas ankaŭ la statuto kaj "ekde la 16a de julio 1998 ni estas leĝe registritaj". Aldonindas, ke pliboniĝis la grafika flanko de la bulteno, Bob ekuzis novan komputilan programon.**



**La esperantistoj dividiĝis je diversaj grupoj. Sub la gvidado de Owen Franklin iuj kunvenadis ĉiun mardon en la kaftrinkejo de la civitisma centro de Charles Sturt; ankaŭ marde, en la Ŝtata Biblioteko, sub la gvido de Max Wearing oni studis "Paŝoj al plena posedo", merkredvespere estis kunveno en la biblioteko de West Torrens, alia grupo iradis al la ejo en Tynte strato.**

**Ĉefe je instigo de Sandor Horvath la adelajdanoj ekorganizis vintran kursaron. La raporto pri la dua tia aranĝo, okazinta en Hackham – elementa lernejo, aperis en la julia eldono de Tamen Plu en 2006. La biografioj de 11 el la klubanoj, prezentitaj dum la klubaj kunvenoj, aperadis sur la paĝoj de la bulteno inter aŭgusto 2005 kaj novembro 2006. Ili estis represitaj de la tutlanda revuo Esperanto sub la Suda Kruco.**

**La lasta numero de Tamen Plu en papera formo estis sendita-transdonita al 20 unuopuloj, sed en la reto al pli ol 100 esperantistoj aŭ Esperantaj instancoj ne nur aŭstraliaj. Do, malgraŭ stumbloj, gratoj, seriozaj vundoj, hezitoj, duboj, malakordoj – ni, kaj kune kun ni ankaŭ la bulteno, tamen iras pluen.**

**Bob estas rapida, jam en la antaŭa monato la aktuala numero de Tamen Plu pretas. La redaktanto mem distribuas ĝin, transdonante ĝin al la unuopuloj laŭeble persone. Eĉ se dum la historio de la bulteno redaktadis ankaŭ kvin aliaj esperantistoj, la plejparto de ĝi, certe almenaŭ 22 jarkolektoj, venis el la "plumo" de Bob. Tiu, kiu iam redaktis ion, scias, ke necesas multe da tempo por skribi, kolekti, redakti, kopii, distribui… Kaj temas ne nur pri la uzitaj horoj kaj energio, sed precipe pri la volo, pri la intereso, eĉ amo al la laboro. Tion ĉion Bob donacis al ni silente, sen fanfaronado aŭ postulo pri pago. Ni deziru al li firman sanon kaj multan energion, ke li ankoraŭ longe povu "Tamen plui" je ĉies utilo kaj kontento.**



**Bob, koran dankon al vi pro la farita laboro!**

***Katja***

***Sinjorino Kso estis naskonta kaj demandis sian kuraciston. "Ĉu mia edzo rajtos ĉeesti la naskiĝon?"***

***"Jes", respondis la kuracisto, "estas nur bone, se ankaŭ la patro ĉeestos." "Hu, ne !" diris sinjorino Kso, ni ne permesu tion, se ankaŭ la patro ĉeestu ili interbatalos !"***

**Mankas kelkaj numeroj de Tamen Plu. Se iu el vi havas ilin – kaj ne plu bezonas ilin – bonvolu sendi ilin al Katja, kiu pretas enarĥivejigi ilin ! Jen do la mankolisto: 1982, numeroj 1 ĝis 12. 1983, 1 – 4 – 5 – 6- 7 -8 - 9 – 10 - 11 – 12. 1984, 1 – 2. 1985, 1 ĝis 12. 1986, 1 ĝis 12. 1987, 1 ĝis 12. 1988, 2 – 3 – 4 – 5 – 6 – 7 – 8 – 9 – 10 – 11 – 12. 1989, 1 ĝis 12. 1990, 10 – 12. 1991, 1 - 2 – 3 – 7 – 8 – 9. 1992, 5 - 6- 11. 1993, 2 – 3 – 6. 1994, 5 – 6 – 7. 1995, 6 – 8 – 9 – 10 - 11. 1996, 3 – 5. 1997, 6 – 10 – 11 – 12. 1998, 1 – 2 – 4 -7 - 8 – 9 – 11 – 12. 1999, 8. 2000, 2. 2003, 2 – 3 – 4 – 5 – 6 – 7 – 8 – 9 – 10. 2005, 4.**

# Tamen Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO AŬGUSTO 2007/ JARKOLEKTO 26
Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019
esperantobob@iprimus.com.au

*Juĝisto: "Ĉu vi kulpas aŭ ne ?"*
*Akuzito: "Ne !"*
*Juĝisto: "Ĉu vi iam antaŭe sidis en malliberejo ?"*
*Akuzito: "Ne, ĉar neniam antaŭe mi ŝtelis ion !"*

## Edukado

**Se vi vere deziras lerni kiel senerare – kaj senpene – uzadi nian belegan lingvon, tiam trastudu, pli ol nur unu fojon, "Lingvaj Resondoj", la elstaran verkon de nia eminenta, ĉiame mankanta, sed nemalhavebla eksĉefekzamenisto, Marcelo Leereveld, kiu bedaŭrinde nun mankas al Aŭstralia Esperanto-Asocio!!! Li ĉiam instruis en niaj Somerkursaroj kaj aktivis en niaj Kongresoj. Lian verkon mendu ĉe 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur $ 22,00!**



*"He, he", kriegis la laborgvidanto. "Ĉesu elĵeti tiom da tero supren !"*

*"Sed mi fosas longan fosaĵon, kaj ien mi ja devas ĵeti la elfositan teron, ĉu ne ?"*

*"Do, fosu truon, kaj enmetu la teron en ĝin !"*

## Mummy, why can't we all speak the same language"



**Legu ankaŭ la bonan libron "Mummy, why can't we all speak the same language?" de Nicole Else. Ĝi estas angle verkita kaj celas ĉefe infanojn proksimume 10-jarajn. Ĝi enhavas 15 mallongajn partojn: 1. Languages of the world. 2. Similarities between languages. 3. How languages differ by their grammar. 4. How languages differ by their alphabet. 5. Chinese writing. 6. Japanese writing. 7. Writing numbers in different languages. 8.**

**Different ways of writing English: Braille, Morse, shorthand. 9. Phonetic and simplified English spelling. 10. Languages in Australia. 11. Why is translating so hard? 12. The need for a common language. 13. Why can't everyone learn English? 14. What is Esperanto? 15. Why is Esperanto easier to learn?**

**La libro kostas nur $6,95 + afranko $1,95 ene de Aŭstralio. Ĝin donacu al ĉiuj viaj junaj neesperantistaj geamikoj, al bibliotekoj, lernejoj ktp. Mendu ĝin rekte de la verkinto: Nicole Else, 1/359 Pacific Highway, Asquith NSW 2077 aŭ perrete nicole@cryogenic.net. Por pliaj informoj vidu http://members.iinet.net.au/~nicolee/bookad.html**

**Se vi deziras konsili al neesperantistoj lernadi kelkajn vortojn en Esperanto per ludoj, jen alia grava adreso: http://members.iinet.net.au/~nicolee/game.html**

***Eksedziga juĝisto: "Ni decidis ĉiun monaton aljuĝi al via edzino 600 dolarojn".***

***Edzo: "Mi tre ĝojas, vi estas tro amikema. Do ankaŭ mi provos doni al ŝi iom !"***

# Gravaj Esperanto-eventoj:

**La 92a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 4a ĝis la 11a de aŭgusto en Jokohamo, Japanujo. http:www.k4.dion.ne.jp/~uk2007/;http://www.k4.dion.ne.jp/~uk2007/**

**Merkredon la 1an de aŭgusto ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**

**Vendredon la 3an de aŭgusto en la biblioteko de Woodville parolos Trevor Steele je la 18.30a horo. Ĉiuj bonvenos !!!**

**Sabaton la 4an de aŭgusto TEVA havos tablon ĉe la Movada Foiro en Jokohamo okaze de la UK. Respondeculo estos Francesco Maurelli, kiu kun la Landa Reprezentanto Nori (Yoshinori Saito) prezentos TEVA disvastigante informmaterialon.**

**Merkredon la 15an de aŭgusto ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**

**Sabaton la 25an de aŭgusto okazos ekskurso al la nacia parko Cleland. La horoj aperos poste. Enirprezo $ 13,50.**

**Merkredon la 5an de septembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**

**Merkredon la 19an de septembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**

**Sabaton la 22an de septembro ni ekskursos al "Perono 1". Ni estu ĉe la perono jam je la 10a horo. Enirprezo $ 7,00. Se Margaret Furness ne ferios, ni kafumos ĉe ŝi en ŝia nova domo!**
**Merkredon la 3an de oktobro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Sabaton kaj dimanĉon la 6an kaj 7an de oktobro AEA okazigos sian ĝeneralan jarkunvenon en Brisbano.**
**Merkredon la 17an de oktobro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Merkredon la 7an de novembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Sabaton la 10an de novembro ni distros unu la aliajn en la hejmo de Katja kaj Trevor, 9 Vicar Street, Gilles Plain, S.A. 5086.**
**Merkredon la 21an de novembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**La Zamenhofa Vespero okazos la 5an de decembro en Clarence Park. Aŭtomobilrestadigado kaj eniro senpagas!**
**La Oceania Kongreso okazos en Aŭklando, Novzelando, de la 14a ĝis la 23a de januaro 2008.**
**La Universala Kongreso de Esperanto okazos en 2008 en Roterdamo, Nederlando. Tiu ne senpagos!**
**Tuj poste la Internacia Vegetarana Unio (International Vegetarian Union IVU) festos sian centjariĝon en Dresdeno, Germanujo. Ĉeestos multaj TEVA-anoj !**
**Ankaŭ TEVA (Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio) festos sian centjariĝon en 2008.**

***"Sinjoro instruisto, ĉu skarlatino danĝeras ?" Mia fratino infektiĝis de ĝi !"***

***"Jes, skarlatino estas tre danĝera ! Vi tuj iru hejmen, kaj ne revenu, antaŭ ol vi estos tute certa, ke ankaŭ vi ne estas infektita!"***

***Post kiam la lernanto estas for, la klaskamarado Brendan levas sian manon dirante: "Sinjoro instruisto, lia fratino transloĝiĝis al Melburno post sia edziniĝo pasintan jaron !"***

# KKS de UEA laboris en Jokohamo

**Clay Magalhaes kaj KKS de UEA vizitis Japanujon kaj laboris de la 1a ĝis la 4a de junio kun la Landa Kongresa Komitato de la 92a UK en Jokohamo. La 3an de junio okazis la 7a LKK-kunsido kun 30 membroj de LKK kaj**

**kunlaborantoj, en kiu estis traktitaj kelkdekoj da eroj da preparlaboroj. Clay vizitis la urbodomon, Pacifiko-Jokohamon, Halon Minatomirai, Gubernian Muzikan Halon kaj kunsidejon de Jokohama Esperanto-Rondo, kaj diskutis pri diversaj preparlaboroj. Kun li LKK povis multe akceli la preparadon de la kongreso.**

**Jokohamo subvencias la Universalan Kongreson. La urbo Jokohamo decidis subvencii la UK-on per 11000.00 enoj (6.875 EUR). LKK informiĝis, ke tiu sumo estas multe pli alta ol ordinaraj subvencioj de la urbo. Ĝi utiligeblu al reklamiloj/informiloj pri la UK kaj la publikaj programeroj, kiel ankaŭ al la urbestra akcepto, kiu okazos la 9an de aŭgusto en la urbestra domo.**

**Mendeblas ankoraŭ ĉirkaŭ 40 lokoj en nekredeble malmultekosta amasloĝejo!**

**LKK estas ankaŭ amasloĝejagento de la "Urba Centro de Eksterdoma Aktivado por Junuloj en Mituzawa-koen". Sen matenmanĝo de la 3a ĝis la 12a de aŭgusto (9 noktoj kaj 10 tagoj) kostas nur 4.800 enojn (30 EUR). Ĝis nun mendis ĉirkaŭ 30 kongresanoj el 12 landoj. La urbo Jokohamo permesis malfruigi la limhoron de 22:00 al 23:00, kiam la pordo fermiĝos, kaj uzi pluan ĉambron por 25 personoj. Kontaktu: loĝiga servo de LKK, logxej092@gmail.com**

***Iomete tro ebrieta eniras buson Jonatano. Iomete maljuna sinjorino sentas lian elspiron kaj diras:***

***"Fi, vi estas ebriega !"***

***Jonatano rigardas la sinjorinon dirante:***

***"Fi, vi estas ne nur malbela, eĉ ne malbelega, sed fimalbelegaĉa… kaj bone komprenu ĉi tion, morgaŭ mi estos sobra !"***

## Biblioteka apogo

**Esperanto-bibliotekoj, kiuj ne finance apogatas de ŝtata, urba aŭ aliaj publikaj instancoj povas esti apogataj de la fondaĵo "Roma kaj Poul Thorsen". Sendu priskribon pri via loka Esperanto-biblioteko kun listo de dezirataj libroj**

**laŭ ordo de prefero. Sed petu nur librojn, ĉar diskoj, vidbendoj kaj aliaj nelibraj varoj ne estos konsiderataj.**

**Petojn sendu al la Centra Oficejo de UEA <direktoro@co.uea.org > antaŭ la 15a de oktobro 2007.**

***Indiano eniris la urban registrejon dirante: "Mi deziras ŝanĝi mian nomon !"***

***"Bone, eĉ bonege", kio vi nomatas ?"***

***"La usona lokomotivo n-ro 49, kiu transiras la prerion je sunleviĝo, kies fumo kovras la prerion dum la vaporsiblilo rompas la silenton de la nokto" !***

***"Jes, mi bone, eĉ tre bonege komprenas kial vi deziras ŝanĝi vian nomon. Per kiu nomo vi deziras anstataŭigi ĝin ?"***

***"Ĉu-ĉu !"***

## Poemkonkurso en Viktorio

**Dimanĉon la 24an de junio la viktoria esperantistaro renkontiĝis antaŭ la statuo kreita de Paul Montford pri Adam Lindsay Gordon proksime al la parlamentejo en Melburno. Aŭdiĝis alparoloj en kaj la angla kaj Esperanto. Florkronoj estis metitaj kaj bobeloj blovitaj sub klara, blua vintra ĉielo.**

**Skota sakŝalmisto muzikis.**

**Post tio ni daŭrigis nian promenadon al la Reĝa Historia Societo de Viktorio, kie ni ĝuis prelegon pri Gordon kaj paroladon de Susan Pender, kiu transdonis la premion, malgranda bronza statueto pri araba ĉevalo, al la gajninto de nia inaŭgura, ĉiujara Esperanto-konkurso, Gaye Philips loĝanto en Annerley, Kvinslando pro ŝia poemo "La Saltego". Honora mencio menciatis de nia juĝanto, emerita profesoro Ronald Gates, al Marcelo Leereveld pro lia poemo "Ĉevaloj kaj Homoj". Jennifer Bishop akceptis la unuan premion nome de Gaye Philips, kiu bedaŭrinde ne povis ĉeesti.**

**La eventon organizis la Memoriga Komitato pri Adam Lindsay Gordon, kaj la konkurson aranĝis la Esperanto-Federacio de Viktorio.**

*Malgranda knabo falis sur la strato kaj iom vundis sian genuon. Li terure sakris.*

*"Vi ne sakru", diris sinjorino ŝokita, "sakrante vi neniam eniros la ĉielon !"*

*"Sed mi ne iros ĉielen, mi iros al la vendejo por aĉeti terpomojn !"*

## Slovaka somerkursaro

**De la 21a ĝis la 27a de julio, ĉijare okazos en Slovakujo Somerkursaro de Esperanto – "Slava Esperanto-Studado". Tiu ideo, fari komunan somerarانĝon, naskiĝis al gejunuloj dum la novjara AGO-SEMAJNO en Nowy Sacz, Polujo. La kursaron aranĝos ĉiun jaron junulaj organizaĵoj de "slavaj landoj". La aranĝo celas konantigi la - ne nur slavajn – partoprenantojn, sed ĉiujn kun slavaj kulturoj, ĉiujare en malsama slava lando.**

**La ĉijara SES okazos en belega loko, fakte en la hotelo ESPERANTO en Pribylina en Nordslovakujo, en la montaro Altaj Tatroj.**

**Ĉiun antaŭtagmezon de la 9a ĝis la 13a horo okazos instruado. Posttagmeze okazos ekskursoj al muzeoj, grotoj, krome okazos montgrimpado, naĝado en varmaj banejoj, ludoj, kreivaj metiejoj, tenisludado, saŭno, biciklado, ĉevalrajdado, vesperaj kaj noktaj amuzaj programoj.**

**La fame konata redaktanto de "Esperanto" de UEA, Stano Marchek, instruos la komencantojn. Irina Goncharova el Moskvo instruos la progresintojn.**

**Oni povos loĝi en komfortaj hoteloj aŭ tendumi en apudhotela tendumejo.**

**Por via aliĝilo musumu sur http://ses.esperanto.sk/index.php?akcia=nova&jazyk=eo**

## *El "Aritmetiko por ĉiuj"*

***Se unu virino povas naski infanon post naŭ monatoj, kiom da infanoj povas 27 virinoj naski post 3 monatoj ?***

# El la verkoj de Poul Thorsen

**Laŭdire la Inferon**
**neniam la danoj envenos.**
**Ilian gorĝan kveron**
**eĉ la Diablo ne komprenos.**

## Esperanto en Sudaŭstralio

**elkore gratulas al Arturo kaj Libby Mortimer pro la 38a datreveno de ilia geedziĝo.**

***La serĝento furioze, - ĉar tio estas lia devo, ĉu ne – rigardis la soldaton, kiu ne montris intereson pri perforto kaj aliaj militistaj aferoj.***

***"Kion vi faras en via civila vivo ?"***

***"Ho, mi laboras en oficejo."***

***"Bone, vi do pintigas krajonojn, alportas poŝtaĵojn kaj senpolvigas bretojn, ĉu ne ?"***

***"Ne, tion faras por ni maljuna serĝento !"***

# Rondo Kato

**Clay Magalhaes, nia konstanta kongresa sekretario kaj antaŭa estrarano de Rondo Kato, promesis gvidi nian kunvenon ĵaŭdon la 9an de aŭgusto je la 16a horo en salono "NITOBE'. Plue en la faka forumo informos pri Rondo Kato s-ino Shigeko Ooba nia japana kontaktulino, kaj nia fidela membro Ana Montesino. Do, kongresanoj katamantaj, vi uzu tiujn eblecojn por ekkoni nian organizaĵon !**



**Ankaŭ Åke kaj mi ŝategus ĉeesti, sed nia mono ne sufiĉas. Plue ni nun hejme havas sestagaĝajn katidojn, kiuj nur hodiaŭ malfermis siajn okulojn.**

***Ingrid Näsholm***

*"Maljuna Jones asertas, ke li havas sian aŭton ses jarojn, kaj neniam pagis eĉ unu cendon por riparoj. Ĉu vi kredas tion ?"*

*"Jes, certe, ĉar estas mi, kiu riparas lian aŭton !"*

## Monŝanĝado

**Estas pli bone ŝanĝi vian monon al japana mono antaŭ ol vi ekiros Jokohamon por kongresumi.**

**Pli bone estas ŝanĝi monon en internaciaj flughavenoj, kie eblas ŝanĝi dolarojn, frankojn, kronojn, eŭrojn, pundojn, ŭonojn, juanojn ktp. En urbaj bankoj, hoteloj ktp. plejofte ne eblas ŝanĝi ĉiujn monojn !**

**En japanaj flughavenoj eblas monon ŝanĝi ĉiutage inter la 6a kaj 23a horoj. En grandaj bankoj kaj poŝtoficejoj oni povas ŝanĝi sian monon nur inter la 9a kaj 15a horoj, kaj ne semajnfine, tio inkluzivas kaj sabaton kaj dimanĉon !**

## Novaĵoj el la Libroservo

**La libroservo de AEA nuntempe ĝisdatiĝas siajn servojn kiel ankaŭ sian retbutikon. Fakte jam funkcias NOVA RETBUTIKO ĉe la ĉiama retadreso: http://libroservo.esperanto.org.au Bedaŭrinde la malnovaj kontoj de klientoj de la antaŭa retbutiko ne plu ekzistas. Tial ni petas vin ĉiujn, bonvolu reviziti nin, starigonte novan konton. La procedo tre simplas, facilas kaj rapidas. Baldaŭ vi ĝuos novajn servojn antaŭe ne ekzistantajn.**

**Apenaŭ naskiĝis la nova surreta katalogo, tial nur malmultaj eroj troviĝas en ĝi. Ni intencas ĉiun semajnon aldoni novaĵojn kaj tial ni invitas vin sendi viajn proponetojn al ni pri tio, kio interesas vin, ekz. libroj, kompaktdiskoj, dvd-oj, esperantaĵoj ktp., kaj ni klopodos enmeti ilin en la katalogon. Kiel ĉiam, sendu viajn proponojn retmesaĝe al libroservo@esperanto.org.au**

**Bonvenigante ĉiujn al la "Nova Libroservo de AEA ni dankas vin pro via pacienco dum la periodo de ŝanĝado !**

*"Ĉu vi ne hontas reveni hejmen je la 8a horo ?"*
*"Ĉu je la 8a horo, kaj vi ankoraŭ kuŝas en la lito ?!"*

# Tamen Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO SEPTEMBRO 2007/ JARKOLEKTO 26
Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019
esperantobob@iprimus.com.au

## Refoja krurrompiĝo



**Nia estimata, sed evidente akcidentalloga amikino Eileen, dum laborado en sia ĝardeno, akcidente falis kaj refoje rompis al si sian kruron.**

**Kompreneble ni ĉiuj simpatias kun ŝi kaj deziregas al ŝi tre baldaŭan resaniĝon. La sorto ŝajnas tre kruela al ŝi, sed tamen ŝi – kiel ĉiam ridas, eĉ ridegas !**

**Ĉar ŝi ne povas eliri el sia domo, ŝi malĝojas ke ŝi ne plu povas preni parton en nia ĉiuĵaŭda legorondo en la Ŝtata Biblioteko en Nordteraso. Tial ni decidis okazigi la legorondon en ŝia belega hejmo ĵaŭdon la 16an de aŭgusto, la saman tagon kiam Pat 74-jariĝis. Do tie ni do festis ŝian naskiĝtagon kaj gratulis kaj bondeziris al ŝi por la venontaj 74 jaroj !**



Pat

***Subite knaris la voĉo de unu el la flugmaŝinkelnerinoj en la laŭtparolilo. La pasaĝeroj aŭdis la jenan:***

***"Sinjorinoj kaj sinjoroj, ĉi tiun fojon mi havas por vi kaj bonajn kaj malbonajn novaĵojn. Unue la malbonajn. Ambaŭ pilotoj estas ebriegaj, la radio ne plu funkcias, kaj ni jam perdis la konekton kun la flughaveno. Ni flankeniĝis 200 kilometrojn de nia celo, kaj ni eniros en terure malbonan veteron super Alpoj. Bedaŭrinde ni ne havas sufiĉe da benzino por surteriĝi en alia flughaveno".***

***Tiam ŝi rapidege diris:***

***"Kaj jen la bonaj novaĵoj: sed ni flugas eĉ tre rapidege !"***

# Edukado

**Se vi vere deziras lerni kiel senerare – kaj senpene – uzadi nian belegan lingvon, tiam trastudu, pli ol nur unu fojon, "Lingvaj Resondoj", la elstaran verkon de nia eminenta ĉefekzamenisto, Marcelo Leereveld, kiu bedaŭrinde nun mankas al Aŭstralia Esperanto-Asocio!!! Lian verkon mendu ĉe 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur $ 22,00!**



***Viro aĉetis papagon. Lia intenco estis instrui al ĝi paroli la internacian lingvon, Esperanto !***

***Hejmen veninte li komencis: "Diru 'saluton al vi, kamarado'. La papago nur sidis tie nenion dirante. "Diru 'saluton al vi, kamarado' ripetis la viro, sed kompreneble vane. Post centoj da provoj instrui al la papago bazan Esperanton, la viro cedis kaj provis strangoli la papagon ĵetonte ĝin en la kokinejon. Iom pli poste en la vespero li eniris la kokinejon. Tie li vidis la sekvan:***

***Meze de la kokinejo staris la papago tenante la lastan vivantan kokinon ĉirkaŭ la kolo kriante: "Diru 'saluton al vi, kamarado'.***

# Mummy, why can't we all speak the same language"



**Legu ankaŭ la bonan libron: "Mummy, why can't we all speak the same language?" de Nicole Else. Ĝi kostas nur $6,95 + afranko $1,95 ene de Aŭstralio. Ĝin donacu al ĉiuj viaj junaj neesperantistaj geamikoj, al bibliotekoj, lernejoj ktp. Mendu ĝin rekte de la verkinto: Nicole Else, 1/359 Pacific Highway, Asquith NSW 2077 aŭ perrete nicole@cryogenic.net. Por pliaj informoj vidu http://members.iinet.net.au/~nicolee/bookad.html**

**Se vi deziras konsili al neesperantistoj lernadi kelkajn vortojn en Esperanto per ludoj, jen alia grava adreso: http://members.iinet.net.au/~nicolee/game.html**

***"Tre ofte mia edzino eliras kun siaj amikinoj. Tiam mi eliras kun miaj".***

# Gravaj Esperanto-eventoj:

**Merkredon la 5an de septembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Merkredon la 19an de septembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Sabaton la 22an de septembro ni ekskursos al "Perono 1". Ni estu ĉe la perono jam je la 10a horo. Enirprezo $ 7,00. Se Margaret Furness ne ferios, ni kafumos ĉe ŝi en ŝia nova domo!**
**Merkredon la 3an de oktobro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Sabaton kaj dimanĉon la 6an kaj 7an de oktobro AEA okazigos sian ĝeneralan jarkunvenon en Brisbano.**
**Merkredon la 17an de oktobro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Merkredon la 7an de novembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Sabaton la 10an de novembro ni distros unu la aliajn en la hejmo de Katja kaj Trevor, 9 Vicar Street, Gilles Plain, S.A. 5086.**
**Merkredon la 21an de novembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**La Zamenhofa Vespero okazos la 5an de decembro en Clarence Park. Aŭtomobilrestadigado kaj eniro senpagas!**
**La Oceania Kongreso okazos en Aŭklando, Novzelando, de la 14a ĝis la 23a de januaro 2008.**
**La Universala Kongreso de Esperanto okazos en 2008 en Roterdamo, Nederlando. Tiu ne senpagos!**
**Tuj poste la Internacia Vegetarana Unio (International Vegetarian Union IVU) festos sian centjariĝon en Dresdeno, Germanujo. Ĉeestos multaj TEVA-anoj !**
**Ankaŭ TEVA (Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio) festos sian centjariĝon en 2008.**
**En 2009 la Universala Kongreso de Esperanto okazos en la belega urbo Bjalistoko, Polujo.**

*La granda indianestro sendis sian filon al la medicinulo, ĉar laŭ la indianestro estis tre grava afero.*

*Diris la indianestrofilo: "Granda indianestro, neniu furzo."*

*Miksis la medicinulo kelkajn herbojn bonajn por la stomako, kaj hejmen sendis la knabon dirante: "Se tio ĉi ne helpos, vi devos reveni !"*

*La sekvantan tagon la knabo revenis dirante: "Granda indianestro, neniu furzo."*

*La medicinulo trovis herbon, kiu sendube devus refunkciigi la indianestran stomakon, sed eĉ malgraŭ tio la knabo revenis la sekvan tagon dirante:*

*"Granda indianestro, neniu furzo."*

*La medicinulo konstatis, ke necesas uzi multe pli fortajn rimedojn. Li miksis la plej fortegan medikamenton, kiun li neniam antaŭe kuraĝis uzi, kun la plej fortaj spicoj troveblaj sur la prerio, kaj sendis la indianestridon hejmen al la indianestra tendo.*

*La sekvantan tagon la knabo ne revenis.*

*Kelkajn tagojn poste la medicinulo renkontis la indianestridon en la arbaro. Li demandis lin ĉu la indianestro resaniĝis. Respondis la knabo: "Granda fekaĵo, neniu indianestro !"*

## La nova estraro de Universala Esperanto-Asocio

**Renato Corsetti ne plu ĉefestras la asocion. Lundon la 6an de aŭgusto, en Jokohamo, la Komitato elektis Probal Daŝgupto kiel prezidanton de Universala Esperanto-Asocio.**

**Vicprezidantoj fariĝis Ranieri Clerici kaj Claude Nourmont. Ĝenerala sekretario nun estas Barbara Pietrzak.**

**Tri pliaj estraranoj estas Loes Demmendaal, Hori Jasuo kaj José Antonio Vergara. Do, sep anoj en la estraro !**

*Kuŝis en malsanulejo la edzo de la virino, kiun ni renkontos tuj poste. Li havis seriozajn kontuzojn en la kapo.*

*"Sed kiamaniere via edzo tiom serioze vundiĝis?" demandis unu el la kuracistoj.*

*"Li ludis flugmaŝinon, kaj trinkis benzinon!" respondis la edzino.*

*"Jes, sed tio neniel kaŭzas kontuzojn en la kapo!" respondis la kuracisto.*

*"Jes, ĉar li teren falis kiam lia benzinujo malpleniĝis!"*

## 6a Novjara Renkontiĝo 2007/08

**La sesa Novjara Renkontiĝo (NR) de Esperantoland okazos de la 27a de decembro 2007 ĝis la 3a de januaro 2008 en Föckinghausen proksime al Meschede. Aliĝis jam partoprenantoj el naŭ landoj – venos entute proksimume 150 gastoj el eble dekkvino da landoj – familioj kun infanoj, paroj kaj unuopuloj.**

**De la 3a ĝis la 6a de januaro estos kelkaj aldonaj tagoj en la sama domo – por tiuj, kiuj volas iom pli longe ĝui la internacian atmosferon de la renkontiĝo.**

**Refoje estos diversaj programeroj: prelegoj kaj kursoj, ekskursoj kaj promenoj. Dum la vespero okazos koncertoj, eble teatraĵo kaj diversaj aliaj eventoj. Certe estos ankaŭ multaj eblecoj por persone konatiĝi inter la partoprenontoj – ekzemple en nia kafejo.**

**Refoje ni ofertos konversacian rondon kaj kursojn por komencantoj kaj progresantoj. Dum la NR eblos eklerni Esperanton kaj tuj apliki ĝin neformale en internacia atmosfero.**

*Policano haltigas aŭtomobilon kaj tre ĝentile diras: "Vi estas aŭtomobilveturiganto n-ro 10.000 sur ĉi tiu vojo. Jen por vi $1.000. Ĉu mi rajtas demandi, por kio vi intencas uzi la monon ?"*

*"Ho, mi intencas provi akiri aŭtomobilveturigpermesilon", respondis la viro ĉe la aŭtomobildirektilo.*

*La virino, verŝajne lia edzino, kiu sidis tuj apud li, diris: "Ne kredu lin, li ĉiam diras tiom da stultaĵoj, kiam li estas ebria !"*

***Tiam aldonis sian opinion la surda avo de sur la malantaŭa sidloko: "Ĉu mi ne diris, ke ni ne venos tre malproksimen en ŝtelita aŭtomobilo ?"***

# Mondlingvoj aŭdeblaj

**Estas konata fakto ke t.n. artefaritaj lingvoj tre interesas esperantistojn, precipe tiujn, kiuj estas bone edukitaj.**

**Ankaŭ ni, ordinaraj esperantistoj, de tempo al tempo montras tian intereson, kaj mi mem devas konfesi, ke iam mi ekstudis kelkajn el ili. Estas tre interese tion fari, sed decas aldoni, malŝparo de tempo. Mi ekstudis tion laborante nokte en iu kablofabriko. Mia sperto estas, neniam laboru en kablofabriko, fakte neniam laboru en fabriko. Mi legis kelkajn fabelojn de H.C. Andersen en Ido, kaj kelkajn gazetojn en Interlingua, sed ne memoras multon el tio, kion mi legis. Sed tio ne gravas ! Neniu el tiuj lingvoj havas regulan elparolmanieron, kaj eĉ iliaj adeptoj ne scias kiel interkomunikiĝi buŝe. Pli bone taŭgas al ili simpla skribado unu al la aliaj !**

**Tamen kaj malgraŭ ĉio, kiel jam dirite, la afero interesas. Tiuj el vi, kiuj vere interesiĝas pri tiaj aferoj, povas nun aŭdi la prononcon de kelkaj el tiuj lingvoj, Esperanto estas nur unu el ili, sed ĝin vi espereble jam bone elparolas. Samideano Andreas Künzli elparolos ilin por vi se vi musumos sur http://14199.com/f686e4 Tiam vi aŭdos la lingvojn Volapük, Ido, Occidental, Nyelvek, Interlingua kaj Interlingue.**

***Unu patrino al alia: "Li estas tre dolĉa, via etulo, sed laŭ mia modesta opinio, li tute ne similas al sia patro."***

***"Tiam vi devus aŭdi lin, kiam oni provas depreni de li la botelon !"***

## Universala kongreso en Bjalistoko

**Dum la Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo estis decidite, ke la 94a Universala Kongreso de Esperanto okazu en Bjalistoko, Polujo en 2009.**

**Zamenhof fariĝos 150-jara la 15an de decembro 2009. Li naskiĝis en Bjalistoko, kaj estas nur dece kaj respektoplene, ke la Kongreso okazu tie.**

**Tiucele vojaĝis sinjoro Tadeusz Truskolaski, la urbestro de Bjalistoko, al Jokohamo faronte antaŭ la kongresanaro diskurson en perfektega Esperanto, dum kiu li pledis ke la Kongreso en 2009 okazu en lia urbo. Ĉiuj konsentis kaj lia invito estis varme akceptita. La notico kaj la diskurso de la urbestro-prezidanto aŭdeblas en http://polskieradio.pl/podcast/39/files/2007081005070228.mp3**

***Dario Rodriguez***

***"Estas tre malfacile por mia edzino fari decidojn. Ĉu ŝi rajtos ŝanĝi la surtuton, se ĝi ne plaĉos al ŝi ?"***

***"Jes, kompreneble !"***

***"Kiom da fojoj ?"***

## Montrante la flagon

**Disvastigita estis Esperanto dum sporta evento en Brazilo. La atleto, Walter Fontes partoprenis en la 20a Mararmea Stratkurado kunportante la Esperantan flagon. Tiu historia evento okazis la 5an de aŭgusto en Rio de Ĵanejro. Laŭ la stratkuristo, tiu iniciato estis konsekvenco de debatoj estigitaj kadre de la ronda tablo titolita "Esperanto en sportoj", dum la 42a Brazila Kongreso de Esperanto.**

***Fabiano Henrique***

***Instruistino provis instrui al siaj gelernantoj pri la cirkulado de la sango. Por iomete plifaciligi la lecionon ŝi diris: "Jen, mia kara klaso. Se mi starus sur mia kapo, la sango, kiel vi bone scias, enkurus ĝin ruĝigante mian tutan kapon."***

***"Jes", respondis la klaso.***

*"Do kial, dum mi restas staranta, la sango tute ne eniras miajn piedojn ?"*

*"Ekkriis eta knabo: "ĉar viaj piedoj ne estas malplenaj !"*

## Pri Esperanto en Kaliningradskaja Pravda

**En la "Kaliningradskaja Pravda", la plej legata tagĵurnalo en la kaliningrada regiono de Ruslando, aperis la 11an de aŭgusto mallonga artikolo "Solo en Esperanto". La kaliningrada ĵurnalistino, Irina Klomoviĉ, rakontis pri la partopreno de Aleksander Korĵenkov kaj Natalja Striĵnjova en la festivalo "Arta Lumo" en Kuopio, Finnlando. Aparte ŝi substrekis, ke en Kuopio Natalja unuafoje prezentis solkoncerton en Esperanto kaj en aliaj lingvoj. Ĝi estas la dua lastatempe …**

*Aleksander Korĵenkov*

*Malgranda knabino parolis al sia instruisto pri balenoj. Asertis la instruisto, ke baleno ne povas engluti homojn, ĉar kvankam ĝi estas grandega mamulo, ĝia gorĝo estas tro malgranda.*

*Diris la malgrandulineto, ke Jona englutatis de baleno.*

*Iritite la instruisto ripetis, ke baleno ne povas engluti homon. Tio tute ne eblas.*

*Diris la malgranda etulino: "Kiam mi eniros Ĉielon, mi demandos al Jona".*

*Diris la instruisto, "sed kio, se Jona iris Inferen ?" Respondis la dolĉulino: "Tiam vi demandu lin !"*

## Nova retejo pri gazetoj

**La Esperanta Gazetejo, www.gazetejo.org, kolektas informojn pri Esperantaj gazetoj. Ĝi ebligas al uzantoj ĝui plej diversajn gazetojn kaj estas ankaŭ bona reklamilo por gazetredaktantoj kaj eldonistoj. Nun serĉatas gazetredaktantoj, kiuj volas profitigi sian gravan kaj laŭdendan laboron al la tuta esperantistaro. Bonvolu viziti la gazetejon, kaj helpu nin riĉigi kaj diskonigi ĝin !**

**Boris-Antoine Legault**

# Tamen Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO OKTOBRO 2007/ JARKOLEKTO 26

Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019 esperantobob@iprimus.com.au

## Granda honoro al honorinda aŭstraliano



Dum la ĉijara Universala Kongreso en Jokohamo la Internacia Esperanto-Instituto nomumis Jennifer Bishop kiel Honoran Membron. Estis okazigita festmanĝo, dum kiu transdonatis al ŝi la dokumento atestanta la honorigon. Por la okazo ŝi ricevis ankaŭ donacon de IEI.

Ni membroj de "Esperanto en Sudaŭstralio" ŝatus aldoni niajn plej sincerajn gratulojn al nia honorata kaj honorinda samideanino. Laŭ nia opinio neniu meritas tiun honoron pli ol Ĵeni, kiu ĉiam laboras honeste kaj energie por antaŭen igi Esperanton. Gratulojn al vi Ĵeni, ni deziras al vi multan sukceson en via grava laboro por la homaro !

## Edukado



Se vi vere deziras lerni kiel senerare – kaj senpene – uzadi nian belegan lingvon, tiam trastudu, pli ol nur unu fojon, "Lingvaj Resondoj", la elstaran verkon de nia eminenta ĉefekzamenisto, Marcelo Leereveld, kiu bedaŭrinde nun mankas al Aŭstralia Esperanto-Asocio!!! Lian verkon mendu ĉe 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur $ 22,00!

## "Mummy, why can't we all speak the same language"



Legu ankaŭ la bonan libron: "Mummy, why can't we all speak the same language?" de Nicole Else. Ĝi kostas nur $6,95 + afranko $1,95 ene de Aŭstralio. Ĝin donacu al ĉiuj viaj junaj neesperantistaj geamikoj, al bibliotekoj, lernejoj ktp. Mendu ĝin rekte de la verkinto: Nicole Else, 1/359 Pacific Highway, Asquith NSW 2077 aŭ perrete nicole@cryogenic.net. Por pliaj informoj vidu http://members.iinet.net.au/~nicolee/bookad.html

# Gravaj Esperanto-eventoj:

**Merkredon la 3an de oktobro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**

**Sabaton kaj dimanĉon la 6an kaj 7an de oktobro AEA okazigos sian ĝeneralan jarkunvenon en Brisbano.**

**Merkredon la 17an de oktobro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**

# Ni estis en Japanujo

**La ĉijara UK estis la 92a. Por partopreni ĝin el Adelajdo vojaĝis al Japanujo Indrani kaj. Kaj por ŝi kaj por mi ĝi estis la 8a monda Esperanto-kongreso, kiun ni partoprenis.**

**Indrani pasigis en Japanujo du semajnojn antaŭ la kongreso kaj grandparte helpe de lokaj esperantistoj konatiĝis kun Kioto, Naro, Okajamo, Hiroŝimo, Peppu kaj Tokoŝivo. Postevente ni kune turismis aldonajn du tagojn en Tokio.**

**Sed kion diri pri la kongreso mem? Bone organizita, elstara per la precizeco kaj afableco de la gastigantoj. Azieca – ni aldonu – laŭ la nombro de japanaj partoprenantoj (proksimume 950) kaj laŭ la enprograme prezentitaj kulturaj eroj. Eĉ ni du iomete azianiĝis, almenaŭ laŭ la eksteraĵo, vestinte nin en tradician japanan veston "jukata" (speco de kimono) kaj dum duonhoro pavumante sur la koridoroj de la kongresejo. Kredu aŭ ne, pluraj esperantistoj petis nin pozi por komuna foto.**

**La azieco manifestiĝis ankaŭ en la novelektita estraro de UEA: ĝia prezidanto fariĝis la hinda (barata) Probal Daŝgupto. Mi kun kontento konstatis, ke li havas bonan senton por humuro.**

**La UK-organizantoj konsciis, ke esperantistoj el aliaj aziaj landoj malfacile akiros enirvizon al Japanujo. Nepre laŭdindas ilia aparta invito (kaj financa subvencio) al 20 geesperantistoj ĝuste el aziaj landoj. El inter tiuj Indrani konis de antaŭe kelkajn nepalanojn, mi ĝojis revidi Venki, kiu estis nia gastiganto antaŭ 3 jaroj en Barato. Al la UK venis ankaŭ 1 mongolino, 12 Irananoj, iu el Taĝikujo – sed ne afrikanoj. Entute ni reprezentis 57 naciojn.**

**Venontjare atendos nin Roterdamo kaj poste la naskiĝurbo de L. L. Zamenhof – Bjalistoko.**

**K. Steele**

# La mistero pri la malaperinta vagonaro

**Laŭ iu fama tagĵurnalo londona okazis grava kaj terura krimo, eĉ sanga krimo, en la ĉefurbo de Anglujo, io, kio nur malofte okazas, ĉu ne? La krimulo estis la fifama kaj frenezega profesoro Jakobo Moriarti, la ĉefa malbonega malamiko de Sherlock Holmes, kaj de la tuta homaro. Vera Napoleono de krimo li estis. La frato de Sherlock Holmes, Mycroft Holmes, mi bedaŭrinde ne plu memoras lian mezan nomon, dubis, ĉu Sherlock estas sufiĉe inteligenta por solvi la krimon, kaj tial li decidis mem provi solvi ĝin.**

**Unue li iris fiakre de 221B Baker Street al la subtera fervojstacio Baker Street. Ĉar tiu situas ne tre malproksime de 221B Baker Street, li kelkajn minutojn poste, fakte estis dudek, da atendado sur la perono, prenis la subteran vagonaron, kiu iras de stacidomo Baker Street al stacidomo King's Cross. Tie li esperis trovi la krimulestron, aresti lin kaj, se eble, ekzekuti lin per ŝnurego, laŭ la maniero de la tiamaj angloj.**

**Nu, okazis tio, ke tuj ekster la subtera stacidomo King's Cross li vere renkontis la fikrimulaĉon. Post la kutimaj anglaj interŝanĝoj de ĝentilaĵoj li do klopodis aresti lin, sed ho ve, tio neniel estis tiom facila, kiom li unue kredis. La aĉulo sin defendis, io, kio ne devus esti permesita en civilizita socio. Dum la interbatalo, verŝajne ĉar la profesoro, same kiel Miranda kaj Antono, batalis per rapiro, ĉar vere li ne estis tre kuraĝa, Mycroft perdis sian maldekstran kruron. Tio ne estis bona, almenaŭ ne laŭ li, ĉar nun li devis daŭrigi la bataladon starante sur nur unu piedo, kaj krome sango elfluis tre rapide el lia pantalona kruringo farbante la belegan londonan trotuaron ruĝa, malbonodora kaj glata, eĉ glatega!**

**Finfine li perdis ankaŭ la dekstran kruron, kio devigis lin stari sur siaj genuoj, kiuj baldaŭ doloris, batante la krimulon, io, kio ne estas tre facila, ĉar tiam li ne plu povis batadi lian vizaĝon, sed nur lian dikan ventron, kiun li tamburis per ambaŭ siaj pugnoj.**

**Li memoris, ke iam kaj ie li legis ion pri tio, ke al londonanoj ĉiujare amputatas unu kruro, nu, tiu ĉi historio okazis antaŭ multe pli ol cento da jaroj, ĉu ne? hodiaŭ la londonanj, kiel vi bone scias, perdas unu kruron ĉiutage, sed preskaŭ neniam temas pri la sama londonano. Tial Mycroft ne povis kompreni, kial al li devas esti amputita ambaŭ kruroj unu preskaŭ tuj post la alia. Eble li ne sciis multon pri la Leĝo de Karmo, kiu ordonas "neniam piedfrapu krimulon, precipe ne ĉefkrimulon, ankaŭ ne ĉefkrimulestron kaj certe ne la frenezan**

**profesoron Moriarti fimalbelegaĉan!" Tiajn aferojn oni tiam ne pridiskutis en la klubo 'Diogeno'.**



**Nu, kiel konate, policistojn oni ne vidas, kiam oni bezonas ilin, kaj same estis en Londono ankaŭ tiutempe. Eĉ la eta komisaro Lestrade ne aperis sur la trotuaro. La bedaŭrinda rezulto estis do, ke la honora membro de la klubo 'Diogeno' mortis tie apud la stacidomo King's Cross pro sangomanko, kaj ne pro la manko de kruroj.**



**Kelkajn tagojn poste Sherlock ekrimarkis la neĉeestadon de Mycroft. Li legis en tagĵurnalo kelkajn tagojn aĝa, sed kompreneble kun bildoj, eĉ multaj, ke serioza krimo, kun sangelverŝo, eĉ sangelverŝado, okazis en Londono, la ĉefurbo de Anglujo. Li ekbruligis sian pipon, fi, ĝi fetoris, neniam mi komprenos ke tabakfumo povas esti konsiderata granda ĝuado, sidigis sin, agordis sian violonon, atente nombrante ektrovis ke mankas unu kordo, fakte la A-kordo, tre strange, ĉar plej ofte estas la E-kordo, kiu rompiĝas, ĉu ne? almenaŭ neniam la G-kordo, ĉar ĝi estas tro dika, kuris en la straton, trovis muzikilvendejon, tio ne facilas en Baker Street, sed Sherlock estis ja, kiel ni ĉiuj scias, geniulo, oni povas legi pri li en la famaj verkoj verkitaj de Conan Doyle. En tiu tiame ne ekzistanta muzikilvendejo li aĉetis novan A-kordon, sufiĉe multekostan en tiuj tagoj, surmetis ĝin sur la violonon, agordis ankaŭ ĝin dum sinjorino Hodson prenis maton de sur la ŝtuparo, donis ĝin al Watson, kiu enmetis ĝin en ambaŭ siajn orelojn, kiel li faris tion, mi ne scias, same kiel mi ne scias, kie kaŝis sin sinjorino Hodson dum Sherlock ekludis iun pecon, kiun li povis parkere memori.**

**Dum la violonludado li ekmeditis. Dum la meditado venis en lian kapon mensa bildo pri Mycroft fiakrante de 221B Baker Street al la subtera stacidomo Baker Street, de kie li prenis la subteran vagonaron, iris al King's Cross, kie li renkontis la ĉefkrimulon Montesori, kaj provis aresti lin en la nomo de la leĝo. De la Glora Brita Leĝo!**

**Tuj Sherlock malsupren kuris laŭ la ŝtuparo, iris sur la straton, kiu hazarde nomatis, sed tion vi jam scias, fakte ĝi ankoraŭ nomatas Baker Street. Li fiakris de 221B Baker Street al la subtera stacidomo Baker Street, kaj de tie li intencis iri subtervagonare al la stacidomo King's Cross. Sed kio vere okazis? Jes, vi, kiuj atente legadis ĉi tiun historion jam scias, ĉu ne? Estas eĉ tre terure. De la subtera stacidomo Baker Street li ne povis daŭrigi, ĉar la subtera vagonaro ne venis, kiel ĝi**

**povus? Ĝi ne plu troviĝas, kaj kial ĝi ne plu troviĝas? Ĉar Mycroft prenis ĝin!**

**Do, ĉi tie finiĝas mia historio. Se Mycroft, la geniulo kaj honora membro de la klubo 'Diogeno' estus veturinta per la subtera vagonaro anstataŭ preni ĝin, mia historio daŭrus multe pli longe!**

***Inspirita de Conan Doyle***

## Lasta provo plibonigi publikajn bibliotekojn

**La sekvantan mi skribas por CROW (concerned residents of the western suburbs of Adelaide).**

**Tio ĉi estas nia lasta provo plibonigi niajn bibliotekojn antaŭ la baldaŭa federacia elekto, kaj post 33 jaroj da kampanjado, ni ankoraŭ deziras federacian subtenon financan por la 1.600 publikaj bibliotekoj aŭstraliaj.**

**La fakto restas, ke Aŭstralio nun estas inundita de mono, tre facile ni povus toleri la elspezon por la plej bonaj publikaj bibliotekoj en la tuta mondo. Do, tion ni faru !**

***Arturo Mortimer***

# Mia vivo

## (Helen Palmer)

**Mi naskiĝis en Anglujo kiel la dua el kvar gefiloj de Pat kaj Jack Palmer. Mi vivis tie la unuajn kvar jarojn de mia vivo kaj havas multajn rememorojn pri tiu tempo. Ekzemple, mi memoras trovi la razilon de mia patro (…mi staris sur seĝo, lavĉambra ŝranko…jen) la sango fluis kaj ĝis hodiaŭ mi havas la cikatron. Aŭ bela estas la memoro pri mia ludurso de tiuj jaroj…**

**En 1964 mia patro klopodis trovi novan laboron kaj trovis ĝin en Kanbero, Aŭstralio. Li studis astronomion kaj ekhavis laboron pri komputiloj. Kial? Ĉar oni uzas multe da matematiko en astronomio. La samjaran oktobron ni ĉiuj (tiam ni estis familio de kvin) perŝipe translokiĝis al nova kontinento. Mi tre admiras miajn gepatrojn pro ilia kuraĝo replanti sian junan familion en nova lando.**

**Ĉar mia patro estis arda katoliko, mi ekfrekventis katolikan lernejon (Rosary Demonstration School Watson) kun katolika preĝejo.**

**Mi tre ŝatis miajn fruajn lernejajn jarojn, fakte ĉiujn miajn infanajn jarojn. Mi ofte aŭdas la aliajn paroli pri siaj infanjaraj problemoj en la familio kaj en la lernejo. Tiam mi ofte embarasiĝas, ĉar mi memoras preskaŭ nur bonajn tempojn. Bonŝance, ĉu ne? La lasta membro de nia familio – mia fratino Ruth, naskiĝis en Aŭstralio kiam mi estis sepjara.**

**Tiam mi faris multajn interesajn kaj diversajn aferojn. Al tiuj aldoniĝis skoltinidoj kaj skoltinoj, naĝado, velboatado, muzikumado… Mi komencis iradi al kamparo/sovaĝejo por tendumi, marŝi, orientiĝi laŭ kompaso kaj mapo. Mi ŝatis ankaŭ la retpilkludadon kaj poste en miaj fraŭlinaj jaroj la korbopilkadon. Ĝin mia patro ne ŝatis, ĉar parte pro ĝi mi forestis dum semajnfinoj, multe trinkis kun miaj tiamaj amikoj, festadis. Do fakte li pravis! Tio estis parto de mia plenkreskiĝo, sed tio pasis for.**

**Post la elementa lernejo mi studis nur duonan jaron en kolegio – sciencon. Sed mi ne estis kontenta, do mi foriris. Dum la sekva duonjaro mi laboris volontule por intelekte malavantaĝintoj en Melburno. Kaj vekiĝis en mi sopiro al vojaĝado. Mi akceptis tedan laboron en iu butiko, ŝparis monon kaj forvojaĝis – unue al Anglujo, kie mi havis parencojn. Post iom da tempo mi laboris volontule por mense malsanaj infanoj en la bela montara Lago-regiono. Por gajni monon mi povespere laboris en la proksima drinkejo.**

**Ses monatojn poste mi iris al Steiner-komunumo apud Aberdeen en Skotlando por ankaŭ tie zorgi pri infanoj kun intelektaj problemoj.**

**En tiu bela loko laboris sufiĉe granda komunumo, konsistanta el multnacianoj. En "mia" granda konstruaĵo estis brazilanoj, danoj, germanoj, francoj, sudafrikano, finno kaj svedo. La infanoj estis el Skotlando kaj Anglujo. Mi restis tie unu kaj duonan jarojn kaj poste feriis kun miaj novaj amikoj en Eŭropo. Post kiam mi hejmen iris mi baldaŭ kunloĝis kun mia nova amanto Wolfgang Spielmeyer, kiun mi ekkonis en Skotlando. Ni decidis geedziĝi por ke li ricevu restadpermeson en Aŭstralio, (ankaŭ por ke ni povu resti kune).**

**Ni laboris en diversaj lokoj kaj klopodis gajni studlokon en Sudaŭstralio. Li sukcesis. Mi ne. Mi estis ŝokita. Ni ambaŭ komencis aktivi en la kontraŭurania movado en Adelajdo. Unu jaron poste mi komencis miajn flegistinajn studojn.**

**Kvar jarojn poste Wolfgang kaj mi decidis disiĝi. Mi estis tre malfeliĉa kaj decidis translokiĝi. Tiam mi trovis "Seli-Hoo", kiu poste fariĝis mia hejmo. Mi renkontis miajn postajn kundomanojn en Roxby Downs dum protesto kontraŭ la grandega uraniminejo).**

En “Seli-Hoo” loĝis ankaŭ Sandor kaj Ashley. Sandor ekestis mia “litvarmigilo” en 1987. Mi ricevis mian flegistinan diplomon kaj eklaboris en Kanbero, kien mi iris jam kune kun Sandor. Mi ankaŭ ekestis vicpatrino al Petra, la filino de Sandor. Bona, malbona, feliĉa kaj malfeliĉa parenco. Post Kanbero mi laboris ankaŭ en Adelajdo kaj havis multe da aventuroj kun Sandor. Petra malrapide kreskis. La komunuma kunvivado en “Seli – Hoo” daŭris, mi aĉetis parton de la domo.

En 1993 malsaniĝis mia fratino. Ŝi havis kanceron. Nia familio kunvenis en Kanbero por helpi kaj kunesti kun ŝi en malsanulejo kaj en nia iama hejmo. Mia fratino mortis en aŭgusto 1994.



Post ŝia morto mi decidis vivi mian vivon plenplene. Mi ĉesis labori en malsanulejoj kaj komencis labori kiel estro de la butiko de la Sudaŭstralia Sovaĝeja Societo, kie mi ankaŭ volontulis. Interesa laboro kun multaj diversaj taskoj: aĉeti la varojn, fari la librotenadon, korespondi ktp. Mi lernis multon pri la malgranda komercado kaj ni gajnis multe da mono por la Societo kaj la sovaĝejo, kiun mi amas. Mi kaj Sandor ofte iris al sovaĝaj lokoj – ni marŝis, biciklis, mi tre ĝuis esti ekstere en tiu bela lando.

En proksimume 2000 mi decidis labori en tiu bela sovaĝa naturo kaj duontempe mi komencis studi por esti mediogardisto. Mia unua tia posteno estis la Nacia Parko “Kakadu” en Nordteritorio, tropika lando. Ĝis nun mi laboris tie jam kvar fojojn. Mi laboris ankaŭ en la Montaroj Flinders en Sudaŭstralio kaj pri koaloj sur Kanguruinsulo.

Miaj postenoj kutime daŭras 2-5 monatojn. Kelkfoje mi faris ankaŭ iomete da volontula laboro. Multe da varieco. Sed mia hejmo daŭre estas “Seli-Hoo” en Adelajdo, Sudaŭstralio. Kelkfoje Sandor vizitis min en ‘miaj parkoj’. Estas bona vivo.

Kaj nun pri Esperanto: Sandor, mia amanto, parolas 6 lingvojn kaj defiis min lerni aliajn lingvojn, ne simple esti laca, aroganta parolanto de la angla. Mi decidis lerni Esperanton. Mi lernis malrapide (malrapide, ĉar mi ne dediĉis multe da tempo al la lernado). En 2000 mi ĉeestis mian unuan Esperantan somerkursaron en Sidnejo, poste du aliajn en Melburno. Mia lernado estis nur tiu dum la kursaroj kaj iom da parolado hejme kun Sandor. Per tiuj somerkursaroj mi trovis kelkajn eksterlandajn amikojn, ekzemple Grazina el Litovujo (ŝi instruis Esperanton al mi en Melburno). Ankaŭ mia patrino Pat lernis

**la lingvon. De tempo al tempo mi renkontiĝadis kun adelajdaj esperantistoj, mi iris kun Sandor al Universala Kongreso en Zagrebo (kaj al la SAT-kongreso en Nagykanizsa, Hungarujo). En 2004 la Aŭstralian somerkursaron organizis ni, la adelajdanoj. Tio estis multe da laboro, sed mi ĝenerale ĝuis tion – mi ĉiĉeronis, gvidis jogoekzercadon…**

**Sed la plej bona tempo por ĝui, lerni kaj uzi Esperanton estis por mi 2005. Tiam Pat, Sandor kaj mi havis grandan feriadon en Eŭropo. Ni feriis kun Esperanto-amikino Sabine en ŝia orienta parto de Germanujo. Ni iris al la UK en Vilno, Litovujo. Por Pat ĝi estis la unua UK, ŝi ĝuis ĝin kaj poste vizitis siajn parencojn en Anglujo. Sandor kaj mi biciklis en la norda parto de Litovujo kun Esperanto-amikino Grazina. Ni babilis, klaĉis ĉiutage. Poste ni iris al somerkursaro en Bretonujo, Francujo kaj vizitis francan Esperanto-amikon. Ni uzis la Pasportan Servon kaj gastis ĉe ĉarmaj esperantistoj. Je la fino de nia trimonata ferio mi miris, ke mi estis en Anglujo nur du semajnojn kaj preskaŭ la tutan ceteron de la tempo mi uzis la lingvon Esperanto por vivi kun homoj en Eŭropo.**

**Do, mia Esperanto estas uzata ĉefe por babili, mi ne ofte legas aŭ skribas ĝin. Por mi ĝi ĝuste tiel gravas, pleje utilas.**

**Iam mi demandis francan esperantiston, kio laŭ li estas la diferenco inter la angla kaj Esperanto (li bone parolas ambaŭ lingvojn). Li respondis, ke kiam li laboris en Hispanujo, en sia libera tempo li klopodis viziti hispanajn esperantistojn. Li legis en la lasta UK-ĵurnalo la adreson de unu tia, iris tien, frapis sur la pordon. La virino malantaŭ la pordo demandis, kiu estas tie. Li respondis, ke li estas esperantisto el Francujo, kiu estas en la urbo nur unu tagon. Ŝi bonvenigis lin, ili trinkis teon kaj babilis. Li diris al mi: "Se mi estus dirinta 'mi parolas la anglan lingvon' – tio ne estus okazinta".**

**Do, por mi Esperanto temas pri amikeco, justeco kaj intereso.**

# Tamen ✦ Plu

**OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO. NOVEMBRO 2007/ JARKOLEKTO 26**
**Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019**
**esperantobob@iprimus.com.au**
**Legeblas ankaŭ interrete:www.gazetejo.org**

***Parolis la pastro al la paroĥanaro: "Mi povas mencii, ke la preĝejo ricevis tre multekostan donacaĵon, sed ke la donacinto deziras resti anonima".***

***Tiam starigis sin Jones dirante: "Jes, mi opinias, ke tio estas la plej bona!"***

## La jarkunveno finiĝis

**Laŭ tiuj, kiuj ĉeestis la AEA-jarkunvenon en Brisbano, ĝi estis granda sukceso.**

**Jen la nova estraro: Prezidanto: Igor Couto. 1a vicprezidanto: Jonathan Moylan. 2a vicprezidanto: John Abood. Sekretario: Miranda Lutz. Kasisto: Steve Pitney. Vicsekretario: Gordon Coleman. Vickasisto: Jenny Bishop.**

**La kunveno okazis en amikema kaj pozitiva atmosfero. Oni entuziasme diskutadis - ĉu en Esperanto? - kaj ĉiuj estis feliĉaj. Baldaŭ la asocio estos kompanio limigita de garantio !**

***Virinon renversis biciklisto. "Ho, vi estas tre bonŝanca, sinjorino", diris la biciklisto.***

***"Kion vi diras ?" respondis la virino. "Ĉu estas bonŝance, ke vi renversis min per via biciklo ?"***

***"Jes, ĉar hodiaŭ estas mia libertago, la aliajn tagojn mi veturigas ŝarĝaŭtomobilon !"***

## Edukado



**Se vi vere deziras lerni kiel senerare – kaj senpene – uzadi nian belegan lingvon, tiam trastudu, pli ol nur unu fojon, "Lingvaj Resondoj", la elstaran verkon de nia eminenta ĉefekzamenisto, Marcelo Leereveld, kiu bedaŭrinde nun mankas al Aŭstralia Esperanto-Asocio!!! Lian verkon mendu ĉe 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur $ 22,00!**

*“Kion oni ricevos, se oni seksumigos kanguruinon kaj virelefanton?”*

*“Grandajn truojn en Aŭstralio!”*

## Mummy, why can’t we all speak the same language”

**Legu ankaŭ la bonan libron: “Mummy, why can’t we all speak the same language?” de Nicole Else. Ĝi kostas nur $6,95 + afranko $1,95 ene de Aŭstralio. Ĝin donacu al ĉiuj viaj junaj neesperantistaj geamikoj, al bibliotekoj, lernejoj ktp. Mendu ĝin rekte de la verkinto: Nicole Else, 1/359 Pacific Highway, Asquith NSW 2077 aŭ perrete nicole@cryogenic.net. Por pliaj informoj vidu http://members.iinet.net.au/~nicolee/bookad.html**



*Dudek jarojn post sia edziĝo li telefonis al la kuracisto: “Doloras al mia edzino en la dekstra flanko, ĉu povas esti apendicito?”*

*“Ne, mi forprenis ŝian apendicon antaŭ multaj jaroj”.*

*“Jes, sed mi refoje edziĝis”.*

## Japana gasto al Adelajdo

**La UEA-delegito de Oosaka, Japanujo, s-ro Nisio Tutomu, vizitos nian belegan Adelajdon de la 16a ĝis la 23a de novembro.**

**Nisio prenos parton en konferenco pri patentoj, sed liberos ĝuste la 21an kaj 22an de novembro, do li ĉeestos nian kunvenon en Clarence Park, post iom da turistumado dum la tago. La 22an li vizitos verŝajne Kanguruinsulon al Valon Barosan, ĉar tie okazos varmaerbalonado !**

*En porinfana programo en la televido aliris la mikrofonon malgranda knabino. Diris la intervjuanto: “Kaj kio estas via nomo, malgrandulino?”*

*Silento.*

*“Vi povas diri vian nomon, ĉu ne. Kaj poste vi kantos.”*

*Refoja silento. La intervjuanto ne sentis sin tro feliĉa.*

*“Kial vi diras nenion, malgranda amikino?”*

*Tiam malfermis sian buŝon la malgrandulino: “Ĉar mia patrino diras, ke mi ne rajtas paroli kun viroj, kiuj malbonodoraĉas de tabako kaj biero!”*

## Gravaj Esperanto-eventoj:

**Merkredon la 7an de novembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.**
**Sabaton la 10an de novembro ni distros unu la aliajn en la hejmo de Katja kaj Trevor, 9 Vicar Street, Gilles Plain, S.A. 5086.**
**Merkredon la 21an de novembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo. Partoprenos ankaŭ Nisio Tutomu.**
**La Zamenhofa Vespero okazos la 5an de decembro en Clarence Park. Aŭtomobilrestadigado kaj eniro senpagas!**
**La Oceania Kongreso okazos en Aŭklando, Novzelando, de la 14a ĝis la 23a de januaro 2008.**
**La Universala Kongreso de Esperanto okazos en 2008 en Roterdamo, Nederlando. Tiu ne senpagos!**
**Tuj poste la Internacia Vegetarana Unio (International Vegetarian Union IVU) festos sian centjariĝon en Dresdeno, Germanujo. Ĉeestos multaj TEVA-anoj !**
**Ankaŭ TEVA (Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio) festos sian centjariĝon en 2008.**
**En 2009 la Universala Kongreso de Esperanto okazos en la belega urbo Bjalistoko, Polujo.**

***"Kiel vi povas vidi, mi kreskigis mian barbon. Ĉu laŭ vi mi nun estas pli bela?"***

***Jes, certe, ĉar nun oni vidas malpli de via vizaĝo!"***

## En la Libroservo de AEA

**En la Libroservo de AEA eblas aboni la revuon "Juna Amiko". Mi scias, ke estas multaj gejunuloj ne nur en Sudaŭstralio, sed en la tuta Aŭstralio, kaj kompreneble en la tuta mondo.**

**Nu, ne nur tiuj, sed ankaŭ ni maljunuloj, kiuj sentas nin ankoraŭ iomete junaj, povas pliriĉigi sin mense, legante tiun ĉi elstaran revuon, kiu aperas tri fojojn jare. La abonprezo por unu jaro estas nur A$ 22.00.**

**Alia grava, interesa kaj aboninda revuo estas la mondfama "Monato". "Monato" aperas ĉiun monaton escepte de aŭgusto, verŝajne pro la okazanta Universala Kongreso, ĉu ne? Jarabono de ĝi kostas nur A$ 90.00. La abonprezo por 2008 estos iom pli alta, sed se vi abonos antaŭ la 8a de novembro, vi ricevos ĝin kontraŭ la nuna prezo!**

**Por pli bone kompreni la supre skribitan bonestu viziti nian retbutikon ĉe: http://libroservo.esperanto.org.au.**

***Maljuna ĉasisto al kuracisto: "Mi edziĝis antaŭ nur ses monatoj, kaj mia juna edzino jam naskis infanon. Kiel eblas ?"***

***Kuracisto: "Aŭskultu kara amiko. Kiam vi ĉasas sovaĝan beston en la arbaro, kaj la besto teren falas antaŭ ol vi eĉ unu pafon pafas. Kion vi pensas, ke okazis ?"***
***Ĉasisto: "Ke iu alia pafis antaŭ mi !"***
***Kuracisto: "Jes, ankaŭ mi tion pensas !"***

## Pri portado kaj surhavado

**Laŭirante la vojon, fakte estis Rundle Mall, antaŭ kelkaj tagoj, mi, per miaj okuloj, subite vidis viron portantan ŝuojn. "Nu", vi diras, ĉu estas io eksterordinara pri tio, ke viro portas ŝuojn? Eble ne, sed tiu ĉi viro, kvankam li portis ŝuojn, laŭiris Rundle Mall nudpiede.**

**Estis tre bela tago, kiajn oni trovas nur en Adelajdo, la urbo, en kiu la suno preferas brili, briladi eĉ brilegadi. Ofte ĝi tion faras la tutan tagon, tre malofte dum la noktoj, kvankam ankaŭ ili povas estis varmegaj. Do, la viro tute ne bezonis ŝuojn sur siaj piedoj, ĉar liaj plandoj estis malpuraj kaj haŭtdikaj. Eble tial li ŝuojn ne surhavis. Tamen li portis ŝuojn, kial? Jes, sed la ŝuoj, kiujn li portis, estis por lia edzino, ĉu mi forgesis mencii, ke li estas edziĝinta? Lia nudpieda edziniĝinta edzino sidis nudpiede hejme atendante la revenon de sia edzo, kiu estis en la ŝuvendejo, da kiuj estas multaj en Rundle Mall. Neniu el tiuj ŝuvendejoj estas preferinda al alia ŝuvendejo, ĉar ili ĉiuj estas multekostaj, kaj la plej multaj el iliaj ŝuoj malaltkvalitaj. La ŝuoj ne estas kunkudritaj, sed nur gluitaj, tial estas multaj nudpieduloj en Adelajdo. Sed ni ne pensu pri tio. Ankaŭ lia edzino, kiu sidis hejme atendante lian revenon tre longan tempon, ne pensis pri tio. Plej verŝajne ŝi trinkis tason da teo, ĉar teon ŝi preferis al kafo. Ŝi trinkis senkafeinan teon kun sukero kaj lakto, kaj sen artefarita dolĉigilo!**

**Post longa atendado de la edzino, la edzo revenis hejmen. Lia edzino, mi ne scias ŝian nomon, sed tio ne gravas, ĉar mi scias ankaŭ ne la nomon de ŝia edzo, tre ekscitiĝis vidante la belegajn gluitajn ŝuojn tro multekostajn, kiujn li hejmen portis al ŝi. Ŝi tuj surmetis ilin ekironte por promeni en Rundle Mall kune kun sia senŝua edzo, kies nomon mi ne scias. Kelkajn kvaronhorojn poste la novaj ŝuoj ne plu estis portataj en Rundle Mall, kvankam nur la sennoma edzo estis nudpieda, ĉar ŝi ja surhavis la ŝuojn. Ĉu vi komprenas tion? Kaj la edzo portis plankhorloĝegon sur unu el siaj ŝultroj, la dekstra. Lia mono ne permesis al li aĉeti brakhorloĝeton surhaveblan sur la manradiko, sur la dekstra manradiko, ĉar li estas maldekstrulo.**

***"Kio en la mondo estas tio, ĉu vi ankoraŭ vivas?"***
***"Jes, kial mi ne vivu?"***
***"Ĉar pasintan semajnon mi renkontis Trevoron, kaj li parolis pri vi tre bele!"***

## Pri memmortigintoj

**Nova libro "Memmortigo kaj ĝiaj konsekvencoj" estas ĵus lanĉita de Eldonejo Lorenz. Temas pri Esperanta traduko de fama brazila libro spiritisma. Ĝin verkis Gerson Simões Monteiro, la prezidanto de Radio Rio de Ĵanejro. La libro prezentas raportojn de memmortigintoj, elprenitajn el verkoj de inter aliaj elstaraj spiritismaj verkantoj Allan Kardec, Chico Xavier kaj Yvonne Pereira. Laŭ la tradukinto Givanildo Costa, ĝi "estas grava verko por debatoj kaj plonĝo en gravajn temojn pri la spirita mondo, fronte al la realaĵo de la statistikoj, kiuj montras la timigan realigon de la memmortigo en la aktuala socio". Memmortigo kaj ĝiaj konsekvencoj" enhavas 80 paĝojn kaj estas aĉetebla ĉe Eldonejo Lorenz ĉe la retpoŝta adreso editora_lorenz@uol.com.br.**

***Fabiano Henrique***

***Riĉa maljunulino diris al la kuracisto: "Mi petas vin, bonestu plibeligi min?"***


***Rigardinte la maljunulinon la kuracisto respondis: "Mi bedaŭras, sed mi ne rajtas senkapigi miajn klientojn!"***

## Bonvenon al Novaj Forumoj

**Je granda ĝojo de la plej multaj el ni aperis nova forumo http://australiaforumo.freeforums.org/ en kiu oni povas sin libere esprimi. Espereble en ĝi la interŝanĝado de opinioj okazos amikece kaj ĝentile, ĉar malĝentilaĵoj kaj malamoj ne estas rekomendataj inter ni en la aŭstralia Esperanto-movado. La celo estas ke ni ĉiuj laboru kune por efektivigi la revojn de Zamenhof, ĉu ne? Li certe ne volis, ke ni malamikiĝu.**

**Sed kompreneble, se la plejmulto tion ankoraŭ ne komprenas, tio povas ankaŭ esti la komenco de dissplitiĝo en du grandajn grupojn aŭstraliajn.**

***La irlanda verkisto, Georgo Bernardo Shaw (1856-1950) iam diris: "Pro la strangeco de la angla lingvo la vorto "fish'" povus literumati "GHOTI" … se oni elparolas GH kiel en "enough", O kiel en "women" kaj TI kiel en "nation".***



## Biografio de Libby Mortimer

**En la tempo, kiam komenciĝis la dua mondmilito, miaj gepatroj vizitis Germanujon. Ili volis preni parton en la Vinkongreso en Bad Kreuznach, sed anstataŭe la juna paro havis nur 24 horojn por fuĝi el la subite malamika lando. Antaŭe ili**

**jam pasigis unu jaron en Usono en la Universitato de Kalifornio, al kiu mia patro gajnis stipendion. Li estis vinsciencisto. Post du monatoj ĉe nia onklo de la patrina flanko en Irlando miaj gepatroj sukcesis eniri ŝipon, kiu reportis ilin al Adelajdo. Mi naskiĝis do en Adelajdo en 1940, en 1944 naskiĝis mia frato.**

**Mi estas la kvina generacio de nia familio, naskiĝinta en Adelajdo. La patrina praavo de mia patro venis tien el Skotlando en 1839. La patro de mia patro alvenis el Svislando en 1880, sed tiuj geavoj mortis kiam mia patro estis nur knabo. La aliaj geavoj – la geavoj de mia patrino, naskiĝis en Irlando, sed mia patrino kaj ŝiaj ses gefratoj naskiĝis jam en Adelajdo.**

**Ni loĝis en Fullarton sufiĉe proksime al la laborejo de mia patro – al Waite Instituto, kie scientistoj faris agrikulturajn esplorojn. Mia patro faris esplorojn pri vinoj kaj la bakteriaj malsanoj, kiuj difektadas ilin. Li ankaŭ verkis libron pri tiuj temoj.**

**Niaj gekuzoj loĝis sufiĉe proksime. Kun ili mi studis en la lernejo P.G.C. – de miaj 5 ĝis 17 jaroj. Mi havis kelkajn tre bonajn amikinojn, kun kiuj mi ĝis nun fojfoje renkontiĝadas por kunmanĝi.**

**Mi studis sufiĉe bone por trapasi la ekzamenojn. Mi ĝuis ĉefe la lecionojn pri modernaj lingvoj. Pri la franca mi interesiĝis ĉiam, ĉar mia avo devenis el la franca parto de Svislando kaj parolis france. Kiam kiel 10-jara mi komencis lerni la francan en la lernejo, mi tre ĝojis. Mi estis bonŝanca, ĉar ankaŭ miaj amikinoj ŝatis tiun lingvon kaj dum la tagmanĝaj paŭzoj ni kun ĝuo paroladis ian francan – se ni ne konis iun vorton, ni kreis ĝin. Mi ĝuis paroli ankaŭ artefaritajn amuzlingvojn kiaj ekz. "porklatino". Poste mi studis dum du jaroj la germanan kaj la italan, sed daŭre preferas la francan.**

**Post la morto de mia svisdevena avo la patrina avino de mia patro, kiu konis la francan lingvon, ekkorespondis kun la svisaj geonkloj. Post kiam tiu generacio formortis kaj eksplodis la dua mondmilito, neniu korespondado okazis. Tial, kiam en 1954 mia patro vojaĝis al Eŭropo por renkonti aliajn fakulojn kaj fari esplorojn, li vizitis ankaŭ kuzinon en Svislando. Li konis la nomon de kuzo Pietro, trovis lian adreson en telefonlibro kaj prezentis sin al li. Pietro konsterniĝis kiam mia patro diris? "Mi estas via kuzo el Aŭstralio." La respondo estis? "Mi havas neniun**

**kuzon en Aŭstralio!", ĉar li sciis nenion pri siaj aŭstraliaj parencoj. Ĉiuj informoj pri ĝi perdiĝis dum proksimume 20 jaroj! Sed Pietro tre ĝojis pri la renkontiĝo kun mia patro, ili ekkorespondadis kaj mi kaj la filino de Pietro tenas la ligojn ĝis nun. Estis por mi granda ĝojo mem viziti la landon de miaj prapatroj kaj ekkoni la ĉarman kuzon Pietro kaj lian familion en 1966 kaj poste kun Arturo en 1981, 1990, 1997. Pietro mortis en 1981, sed la ligoj inter niaj familioj estas nun fortaj.**

**Mi daŭrigis la studadon por fariĝi instruistino de *junaj infanoj (3-5-jaraj).* Perŝipe mi vojaĝis al Londono, post kiam mi elspezis la monon de 2 jaroj da instruisteco. Mi restis en Eŭropo du jarojn – laborante, vojaĝante kaj ĝuante la renkontiĝojn kun gekuzoj en Anglujo, Skotlando kaj precipe en Svislando, kie mi povis praktiki la francan.**

**Reveninte hejmen mi elektis labori en librovendejo kaj du jarojn poste en biblioteko, kie mi renkontis mian ĉarman karan Arturon, vidvon kun kvin gefiloj. Ĉiam mi volis membri de granda familio kaj estis tial tre kontenta edzigi lin. Du jarojn poste naskiĝis nia filo Tom kaj tri jarojn poste Penny.**

**Unue ni loĝis en Elizabeth, sed la domo estis tro malgranda. Bonŝance en Largs Bay ni trovis malnovan kaj sufiĉe grandan domon kun kvin dormoĉambroj por la tuta familio kaj la hundo Sableto. Tie ni loĝis kontente dum 31 jaroj. Ni tre ĝuis esti ĉe la marbordo. Fakte mi ĉiam ĝuadas naĝadon kaj en la maro kaj en naĝejoj. Nun mi ekzercas min en naĝejo tri fojojn ĉiusemajne.**

**Post mia edziniĝo mi laboris konstante, sed ne gajnis monon. Nur dum kelkaj jaroj en la 1990-aj jaroj mi sporade laboris en librovendejo en Semaphore. Tiu laboro estis por mi perfekta: dum du horoj sidi inter tiom da interesaj libroj kaj esti vizitata de ĉarmaj aĉetontoj estis mia ideala laboro! Bedaŭrinde tiu vendejo estas forvendita.**

**Nun ni loĝas kontentaj en malpli granda domo proksime al pluraj el niaj gefiloj. Arturo kaj mi havas sep genepojn. La plej aĝa, Catherine (24-jara) jam edziniĝis kaj la plej juna, Chloe, havas 3 kaj duonan jarojn.**

**Mi estas kontenta – mi havis kaj havas bonan vivon. Mi estas kristano, membro de la U.C. en Port Adelaide. La fido je Dio helpas min en la vivo kaj mi esperas, ke ĝi faros min pli konscia pri la stato de la Tero kaj pli kompata al la homaro.**

**Ekstudi Esperanton estis la ideo de Arturo. Ĉar mi tiom ŝatas lingvojn, kompreneble ankaŭ mi devis komenci la lecionojn – unue de Max Wearing – kaj estis bona ideo. Ni trovis novajn geamikojn kaj tre interesajn informojn pri la mondo. Danke al vi ĉiuj!**

***La edzino de Martino trovis grandegan amason da malplenaj vinboteloj en lia ŝranko.***

***"Ĉu vi povas diri al mi, de kie venas tiuj multaj malplenaj vinboteloj, ĉu vi aĉetis ilin?"***

***"Ne, respondis Martino sincere. Neniam en mia vivo mi aĉetis malplenan vinbotelon!"***

## Biografio de Arturo Mortimer

**Mi naskiĝis en 1931.**

**El la komenco de mia vivo mi memoras tri sonojn. La unua estis la sono de mia patro ludanta pianon. Li ludis "Traümerei" de Schumann. Tiam estis la voĉo de mia patrino. Ŝi voĉlegis por eta mi "Dr. Doolittle goes to the moon". Ŝi estis tre laca post la severa laboro de la tago. Kaj mi memoras ankaŭ la malrapidan sonon de la laktisto kaj lia ĉevalo – klop, klop! laŭ la strato, kaj tiam la sekvanta bela sono de la lakto, elverŝiĝanta el la barelo en la laktujon. Efektive en la lernejo estis tiam eĉ ŝerco pri pasteŭrizita lakto, nova afero – tiam!**

**En 1949 mi eklaboris en la Ŝtata Biblioteko de Sudaŭstralio. Mia unua tasko esti kompleta malŝparo de tempo – mi devis aldoni nomojn en la katalogon, ekzemple, Oscar Fingal O' Flahertie Wills Wilde, kiam la simpla "Oscar Wilde" sufiĉus.**

**En 1962 mi iris al Darwin, kie mi estis estro de la Nordteritoria Biblioteka Servo. En 1964 mi ekestris en WRE, Salisbury, la tiean bibliotekon. En 1968 mia laborejo estiĝis "The Institute of Technology".**

**La plej grava tempo de mia vivo estis en 1974. Mi komencis uzi ĉiun, precipe mian familion kaj amikojn, por granda celo: akiri federacian helpon por la publikaj bibliotekoj de Aŭstralio. Do, mi fosas mian sulkon ĉiame kaj konstante ….**

# Tamen ★ Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, DECEMBRO 2007/ JARKOLEKTO 26
Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019
esperantobob@iprimus.com.au
Legeblas ankaŭ interrete: www. gazetejo.org

*"Pardonu, ĉu tiu infano sur la scenejo estas knabo aŭ knabino?"*
*"Li estas knabo."*
*"Kiel vi povas esti certa?"*
*"Ĉar li estas mia filo."*
*"Ho, vi do estas lia patro".*
*"Ne, mi estas lia patrino!"*

*Grafo Gábor*

## Gravaj Esperanto-eventoj:

**Merkredon la 5an de decembro ni festos en Clarence Park la 148an datrevenon de Lazaro Ludoviko Zamenhof je la 18a horo.**
**Sabaton la 15an de decembro la Melburna Kafoklubo aranĝos grandegan feston ekde la 11.30a horo en la Estrarejo de Fort Knox Self Storage, 707 Heidelberg Road, Alphington, Viktorio.**
**De la 14a ĝis la 23a de januaro 2008 okazos la Oceania Kongreso en Aŭklando, Novzelando.**
**La Sepa Tutamerika Kongreso okazos de la 12a ĝis la 18a de julio 2008 en la belega urbo, Montrealo, Kanado.**
**En 2008 la Universala Kongreso de Esperanto okazos en la belega ĉefurbo de Esperantujo, Roterdamo, Nederlando.**
**Tuj poste la Internacia Vegetarana Unio festos sian centjariĝon en belega Dresdeno, Germanujo.**
**Ankaŭ TEVA (Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio) festos sian centjariĝon en 2008.**
**La Universala Esperanto-Kongreso okazos en 2009 en la belega urbo Bjalistoko, Polujo.**

*Virino: Doktoro, doktoro, tiu ĉi suĉinfano tre malrapide kreskas, kaj li pezas malpli ol aliaj suĉinfanoj.*

*Doktoro: "Deprenu, mi petas, kelkajn vestojn, por ke mi vidu vian bruston".*

*Observas, tuŝas, karesas, premetadas la kuracisto la mamojn de la sinjorino. Finfine li diras: "Kara sinjorino, vi ja ne havas lakton en la mamoj". Virino: "Kompreneble mi ne havas lakton en la mamoj. Mi estas la avino, sed koran dankon pro la ekzameniĝado!"*

*Grafo Gábor*

## Vizitantoj el Japanujo

**La 31an de oktobro 'Esperanto en Sudaŭstralio' gastigis kvar japaninojn. Tri lernantinoj kun sia instruistino estis en Adelajdo unu monaton por plibonigi sian anglan lingvokapablon.**



**Indrani renkontis ilin dum sia vizito al Okayama, Japanujo, en julio antaŭ la Universala Kongreso.**

**Kvankam nur komencantoj ili ĝuis nian renkontiĝon kunmanĝante, kunludante kaj kunkantante. Ili mallonge prezentis iom el la japana kulturo – teceremonio kaj ia milita ludo.**

**Entute gaja renkontiĝo por ni ĉiuj.**

***Indrani***

### La Kafoklubo

**La Melburna Esperanto-kafoklubo aranĝos grandegan feston honore al Zamenhof sabaton la 15an de decembro en la Estrarejo de Fort Knox Self Storage, 707 Heidelberg Road, Alphington, Viktorio ekde la 11.30a horo.**

**Festparoladon faros estimata gasto. Oni anoncos la rezulton de la konkurso pri la nova nomo de la biblioteko de AEA.**

**Poste okazos komuna manĝado en apuda restoracio. Pli da informoj haveblas ĉe Carol Lutz (03) 9379 8464, 0409 557 653 aŭ anitasguesthouse@hotmail.com**

*Usona turisto venas al Adelajdo. Staras eta knabo sur la vojo apud la domo de siaj gepatroj.*

*Kriegas la turisto al la knabo: "Kioma horo estas?"*

*Respondas la knabo: "Estas la dek dua horo!"*

*La turisto: "Ĉu nur la dek dua, mi kredis ke estas multe pli malfrue".*

*"Ne", respondas la knabo, ĉi tie en Adelajdo neniam fariĝas pli malfrue ol la dek dua. Post ĝi ni ĉiam rekomencas je la unua!"*

## Edukado

**Se vi vere deziras lerni kiel senerare – kaj senpene – uzadi nian belegan lingvon, tiam trastudu, pli ol nur unu fojon, "Lingvaj Resondoj", la elstaran verkon de nia eminenta ĉefekzamenisto, Marcelo Leereveld. Lian verkon mendu ĉe 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur $22,00!**



***"Kial vi enamiĝis en min?" demandis la edzino tuj post la geedziĝo. Li rigardadas ŝin. "Ĉu ankaŭ vin surprizas tio?"***

## Mummy, why can't we all speak the same language?

**La bonegan libron, verkitan de tre klera esperantistino, Nicole, haveblas nur de la verkinto kontraŭ $6,95 plus afranko $1,95 ene de Aŭstralio. Nicole Else, 1/359 Pacific Highway, Asquith, NSW 2077 aŭ perrete Nicole@cryogenic.net.**



***"Ŝajnas al mi, ke mi konas vin. Kie vi laboras?"***

***"Mi estas aktoro, kaj ŝajnas ankaŭ al mi, ke mi konas vin. Multajn fojojn ni renkontis unu la alian ĉu ne. Kie vi laboras?"***

***"En la grandega vinvendejo en la ĉefstrato !"***

## Asocio perdanta siajn membrojn

**Ŝajnas ke Aŭstralia Esperanto-Asocio perdas pli kaj pli da siaj membroj. Estas granda mistero, sed certe io okazas, kio aŭ forpelas ilin, aŭ igas la la membrojn mem preferi eksigi sin.**

**Regule ni aŭdas pri tiaj eksigoj kaj eksiĝoj. La plej lasta - ĝis nun – estas la honora membro de AEA, Svetislav Kanaĉki, kiu la 16an de julio 2007 decidis eksigi sin.**

**Li tute ne povas konsenti kun la agado de la estraro. Problemo estas la siteno de la prezidanto kiel ankaŭ la fakto, ke oni, se oni aŭdacas fari demandojn, estas tute ignorata de la estraro. La oficialaj dokumentoj de la asocio estas skribitaj en la angla lingvo anstataŭ en la oficiala lingvo de la asocio, Esperanto. Ne nur Svetislav, sen ankaŭ multege da aliaj membroj de AEA ne konsentas, ke AEA estu ŝanĝita al kompanio kun direktoro anstataŭ prezidanto.**

**Ni ĉiuj kunsentas kun Svetislav kaj deziras al li multe pli da feliĉo ekster la asocio (kompanio) !!!**

# Carol Lutz

**Sabaton la 17an de novembro honoris nin Carol Lutz el Viktorio per vizito ne nur al Adelajdo, sed ankaŭ al Esperanto en Sudaŭstralio. Ni renkontiĝis en belega kaftrinkejo en Nordadelajdo, kie ni, krom trinki kafon, rigardis multajn fotojn de niaj gesamideanoj en Viktorio. Post longa konversacio kaj ridado, ni disiĝis, sed ni estis tre ĝojaj, ke ni renkontis tian ĉarman sinjorinon kaj esperantistinon !**

***Maljuna onklino Elsa mortis postlasante tre multe da mono. Renkontiĝis la familio en la advokatejo, kie la advokato ekvoĉlegis la testamenton:***

***"… mi testamentas $250.000 al la venonta naskiĝonto en la familio."***

***Regis iom da embarasa silento en la advokatejo, sed subite sin starigis ekskapitano Lilistelo, malpeze tuŝis la brakon de sia edzino, kaj diris: "Venu, Alma !"***

## Esperanto-sukceso en Woodville

**Vendredon la 2an de novembro okazis io grava en la Biblioteko de Woodville, aŭ kiel preferas nomi ĝin la urbestraro, "la urbego de Karlo Sturt". Lia Esperanta moŝto, Trevor Steele, prelegis pri Esperanto antaŭ amaseto da tri homoj. Almenaŭ unu el tiuj tri intencas lerni la lingvon, espereble eĉ du homoj, sed verŝajne la tria ne volas lerni ĝin !**


**Tio estas progreso por la Sudaŭstralia Esperanto-movado, ĉar antaŭ kelkaj monatoj Trevor provis la saman en la sama loko, kaj venis eĉ ne unu !**

***"Ĉu tiu ĉi estas la plej granda pomo en la vendejo?" demandis la usona turisto prenante melonon.***

***Respondis fruktvendisto Madsen: "Bonestu ne tuŝi la sekvinberojn!"***

# Laŭte

**"Laŭte" estas revuo aperanta ĉiun duan monaton. En ĝi iu ajn rajtas sin tute libere esprimi. Troviĝas en ĝi diskutoj pri sociaj temoj, filozofio, poezio, lingvistiko ktp. ktp. La abono estas nur $27,50. Bonestu sendi vian**



**abonon al Franciska Toubale, 1 Marne Road, Mount Evelyn, Viktorio 3796.**

***Virino falis en la akvon ĉe la kajo, kaj sinjoro etendis sian pluvombrelon al ŝi.***

***"Koran dankon", diris ŝi, "sed mi dubas, ĉu tio helpas, ĉar mi estas jam ĝisoste malseka!"***

# Libroj

**La biblioteko de Norvega Esperanto-Ligo heredis ekzemplerojn de multaj libroj en aŭ pri Esperanto, precipe el la epoko 1910-1980, kaj pretas sendi ilin al interesatoj kontraŭ ege modesta pago, en multaj kazoj oni pagos nur la afrankon.**

**Vizitu www.esperanto.no por vidi liston de la libroj kaj periodaĵoj.**

***Li: "Estas tre mallume ĉi tie. Oni eĉ ne povas vidi manon antaŭ si."***
***Ŝi: "Tio ne gravas, mi scias, kie ĝi estas!"***

# Anna Politkovskaja, unu jaron poste

**Jam antaŭ unu jaro la fama ĵurnalistino Anna Politkovskaja tragike forpasis. Por la okazo la 7an de oktobro 2007 en Bazelo, Svisujo, la PEN-centroj de la svisa, germana kaj Esperanta literaturoj organizis omaĝan vesperon subtene al la esprimlibero. En ĝi partoprenis Irena Breĵna kaj Majnat Kurbanova, du koleginoj kaj amikinoj de Anna Politkovskaja. Ili rakontis pri ŝia maniero aktivi, pri la ĵurnalista laboro sur milita tereno kaj pri la neceso transdoni informojn.**

**La Esperanta PEN estis reprezentata de Annette Muhlemann. La nomo "PEN Esperanto" adekvate reliefis en la grandaj afiŝoj ĉe la teatro kaj tra la urbo.**

***Brendan admiris belegan statuon ĉe skulptisto. "De kie vi havas ĝin?" li demandis al la skulptisto.***

***"Tiun mi elskulptis el granda marmorbloko", respondis la skulptisto.***

***"Ĉu vere?" diris Brendan profunde pensante. "Sed kiel vi povis scii, ke ĝi estas interne?"***

# Pri preĝejoj, pontoj kaj truoj

**Eble vi ĉiuj scias, ke antaŭ iom longe Adelajdo nomatis "la Urbo de Preĝejoj". Tio nun apartenas al la pasinteco. Restas ankoraŭ hodiaŭ kelkaj preĝejoj en nia belega urbo, sed ne multaj. Nuntempe oni povus paroli pri "la Urbo de Pontoj". En Adelajdo troviĝas multaj diversaj pontoj ebligantaj al ni**

adelajdanoj, same kiel al vizitantoj kaj aliaj homoj, kiuj ne konstante loĝas inter ni adelajdanoj, kaj la trafiko, transiri riveron Torrens. Tiu trafiko kelkfoje densas, malofte maldensas. Ni havas eĉ iun ponton, kiun rajtas uzi nur piedirantoj. Malgraŭ tio mi iam vidis malgrandan aŭtomobilon blankan, kiu malŝaltinte siajn lanternojn, iun nokton transiris ĝin.

Ni havas en Adelajdo multajn muzikistojn kaj muzikantojn. Ankaŭ iliaj muzikiloj havas pontojn, almenaŭ pontetojn tie, kie la kordoj transiras ilin. Ilin konstruis la konstruintoj de la muzikinstrumentoj, la t.n. muzikinstrumentkonstruantoj, aŭ eble pli bone, la kordmuzikinstrumentkonstruistoj. Ankaŭ pianoj estas kordinstrumentoj, sed mi devas konfesi, ke mi ne scias ĉu ankaŭ ili havas pontojn aŭ pontetojn. Ili verŝajne havas ion tute alian, pri kio mi scias neniom, ĉar eĉ mi, je via granda surprizo, ne estas ĉion scianta!

Pontetojn konstruas ankaŭ dentoteĥnikistoj. Verŝajne por ke la dentodoloro povu transiri. Tiuj dentopontetoj estas treege multekostaj, ĉar ili estas konstruitaj de dentoteĥnikistoj kiuj, kiel estas sciate, perlaboras multe pli da mono ol ordinaraj pontegokonstruistoj. Ju pli peza la laboro, des malpli da mono oni akiras, ĉu ne?

Parolante pri muzikiloj, kio ni nomu la sontruojn, kiuj troviĝas en la plej multaj kordinstrumentoj? Laŭ “Reader’s Digest Great Illustrated Dictionary” truo estas “Kavo en solidaĵo”, kvankam kordinstrumentoj, almenaŭ la neelektraj, neniel povas esti solidaj. Laŭ “The World Book Dictionary” ĝi estas “malferma loko”. “Webster’s New World Dictionary” opinias eĉ ke ĝi estas “karcero”. PIV opinias ke ĝi estas “malplena interspaco”, sed laŭ mi ĝi estas nenio alia ol “nenio ĉirkaŭata de io”. Kio ĝi, laŭ vi, estas?



Butikumante oni, kompreneble ne ĉiu, sed almenaŭ iu - aŭ eble almenaŭ unu oni, tiu, kiun ni de tempo al tempo renkontas en Esperantujo, iomete haltas por ĝui tason, aŭ eble du, da kafo aŭ teo, ĉu ne? Kun la kafo, aŭ teo, iuj manĝas ion, almenaŭ iom. Kelkaj tre ŝatas manĝi kelkajn pastoringojn aĉeteblajn ĉe la “Reĝo de Pastoringoj”. Mi ne scias, ĉu vi konas tiun majestulon, sed almenaŭ en Aŭstralio li fariĝas ĉiam pli kaj pli riĉa. Estas en la vendejo tiu pastoringoreĝo, mi neniam vidis pastoringoreĝinon, sed plej ofte unu aŭ du pastoreĝidinojn. En la mezo de tiuj t.n. pastoringoj estas truo. Oni diras, ke tiu truo ne bongustas. Fakte ĝi tute ne gustas, ĉar ĝi estas nur “nenio ĉirkaŭata de io”. Ni jam interkonsentis pri tio. Iam mi provis gustumi ĝin, sed tio tute ne eblis. Do la plej multaj pastoringomanĝantoj, kiel ankaŭ pastoringomanĝantinoj, elkraĉas tiun mezaĵon, tiun “nenio ĉirkaŭata de io”. Kaj kial ne, ĝi taŭgas por nenio. Sed malgraŭ tiu ĉi scienca fakto, la pastoringoreĝo inspirita de sia senlima saĝeco decidis, ke ankaŭ “io ĉirkaŭata de nenio” povas vendati. Iun posttagmezon

**rigardante la varojn de lia reĝa moŝto, mi vidis, ke eblas ĉe li aĉeti plastan ujon tute plenan da tiaj "nenio ĉirkaŭata de io" kontraŭ proksimume kvin dolaroj. Kaj mirinde, ĉu ne? Ili vendatas kvazaŭ varmegaj kukoj dum la vintro, kvankam ni aŭstralianoj preskaŭ neniam vidas vintron!**

***Vekiĝas viro en la mateno post tutnokta amorado. Apud li kuŝas la belegulino. Vekiĝas ankaŭ la belegulino, kaj ili ekbabilas. La viro ekvidas foton sur la noktotablo.***

***"Eva", li diras, "Ĉu tiu viro kun barbego kaj lipharoj sur la foto estas via eksedzo?"***

***"Ne", diras ŝi, "tio estas mi antaŭ la operacio!"***

***Graf Gábor***

## La distraĵoj

**Venis 10 esperantistoj al la distraĵoj ĉe Katja kaj Trevor sabaton la 10an de novembro. Trevor kaj Katja gvidis kvizludon pri la verkoj de verkistoj, verkintoj kaj verkantoj. Okazis manĝo- kafo kaj kantadopaŭzoj. Ĉiuj bone amuziĝis kaj ĝuis la posttagmezon.**

***"Dum mi min duŝis", diris virino, "iu surfrapis sur nia ĉefpordo. "Mi tuj volvis bantukon ĉirkaŭ min, kaj iris por malfermi la pordon al viro vendanta latkurtenojn".***

***"Mia trijara filineto, Marta, starante apud miaj kruroj, kriegis: "Panjo, vi ne surhavas kalsonon !"***

***"Sed mi ja surhavas kalsonon", mi respondis.***

***Diris ŝi: "Vi ne surhavas kalsonon !"***

***Mi diris" "Jes, mi surhavas ĝin, ĉit, ĉit! "Ĉu vi volas silenti?***

***"Daŭrigis la etulino: Panjo, mi povas vidi, ke vi ne surhavas kalsonon !"***

***Respondis mi: "Ne, ne, ne !"***

***Konsolis min la penso, ke la latkurtenvendisto estas nur trapasanta nian urbeton, kaj ke mi neniam plu en mia vivo vidos lin.***

***Kelkajn tagojn poste mi babilis kun novalveninta patrino ĉe la porinfana ludgrupo.***

***"Kion faras via edzo por vivteni vin kaj vian filinon", demandis mi.***

***"Li vendas latkurtenojn", respondis ŝi !***

***Alano***

**La suban poemon verkis Marcel Leereveld kiel konkursaĵon en la poezia konkurso de la Adam Lindsay Gordon Commemorative Comittee. Li gajnis la duan premion ! La 1an gajnis Gaye Phillips !**

# Ĉevaloj kaj homoj

## Kantebla laŭ la melodio "La Espero"

***Nur iomete reviziita de Bob Felby por ke ĝi estu pli facile kantebla***

**1**

**En junaĝ' mi zorgis pri ĉevaloj**
**dum militaj soldatprepariĝoj.**
**Eĉ pri ili en besthospitaloj**
**interesis min karakteriĝoj.**

**2**

**Du ekstremoj en memoro restis,**
**ĉar mi ofte trakti ilin devis.**
**Ja montriĝis kiom malsamestis**
**la ĉevaloj, dum piedon levis.**

**3**

**La unua, ĉe hufpurigado**
**mian vangon kisis tute kore.**
**Pensis dua nur pri mortigado,**
**huffrapante min kun fort' rigore.**

**4**

**Dum l'unua en la cirko ludis**
**antaŭ ol eniri la armeon.**
**La alia hufmortigon studis**
**kaj sukcesan la kadavrokreon.**

**5**

**La unuan regis amikeco,**
**renkontata ankaŭ ĉe la homoj.**
**Dum la dua pensis pri venĝeco,**
**lernadita en la hipodromoj.**

**6**

**Mi konkludis: 'homaj karakteroj**
**tre similas tiujn de la bestoj.**
**Kaj ke la ĉevalaj manieroj**
**montras nin kun niaj am' kaj pestoj.**

***"La sovaĝegaj bestegoj kuŝis ekster nia tendaro en la ĝangalo. Tial ni ne kuraĝis eliri por serĉi manĝaĵon. Tie ni sidis sen manĝaĵo, kaj fine ni estis devigitaj manĝi niajn ŝuojn !"***

***"Kaj vi restas la sola vivanto. Sendube vi havis la plej fortan fizikon."***

***"Ne, sed la plej grandajn piedojn !"***

***Staris la cirkodirektoro antaŭ la renversita cirkotendo kriegante: "Ve al tiu, kiu donis al la elefanto ternigan pulvoron !"***